

esperanto

MARTO 1990 • 83-A JARO • N-RO 1011 (3)

ISSN 0014-0635



- **UEA renovigas la strategion en Eŭropo kaj Azio**
- **Reveno al Rumanio: kion esperi post la revolucio?**
- **SPECIALE: 12-paĝa kongresa kaj kalendara sekcio!**

Kulturo, evoluo – kaj la kuba sono

Enhavo

- 41 Kunsido de la Estraro de UEA, 23-25 februaro: Subteno al la regionoj – inkluzive Eŭropon (Mark Fettes)
- 42 Neil Salvesen forpasis
- 43 Landa agado: En Braŝovo ree, tamen sen ĉampano (István Ertl); Timiŝoara denove viglas (Ignat Bociort)
- 45 Vojaĝimpresoj: Pionire trans la siberian ponton (So Gilsu)
- 46 Faka agado: Ekologio kaj kulturo en rusa kadro (L. V. Medvedev)
- 48 Tradukoj: Kune kun Havel (Wojciech Usakiewicz)
Kulturo: Nek estrarano nek redaktoro (Thomas Bormann)
Nekrologo: Paul Ariste (1905-1990)
- 49 Al Kubo kongrese! (Orlando Raola González)
- 50 Kubanoj sin prezentas: 500 jaroj da miksetna kunvivado (Maritza Gutiérrez)
Zamenhof pri Kubo (Raúl Juárez Sedeño)
- 51 Karnavalumi kun la "kuba sono" (Maritza Gutiérrez)
- 52 Kulturo: José Martí, poeto kun popolo (Arnoldo Aguila)
- 53 Insulo de la Junularo: Edukejo de Kubo kaj la mondo (José René Fernández)
Kongresa temo: Pri kultura evoluo – Havane kaj Uneske
- 54 La renkontiĝo inter du mondoj (Federico Major)
- 55 Kongresa Komunikado de la 75-a Universala Kongreso en Havano
- 56 Kalendaro (internaciaj Esperanto-aranĝoj ĝis januaro 1991)
- 61 Informado 3: Seppppppp (Ivo Durwael)
Jaro de Eroŝenko, ne nur por ni!
- 62 Reagoj: UEA ne forlasis nin (Prof. Toma Macovei); Konstrui sur lingva stabilo (Eskil Svane); Persona partoprenigo (Manuel Moraleda); Rekonstrui el nulo (Andrej Ananjin); Por plia profesieco (Douglas Kershaw); Ĉu nur por nobeloj? (Gilbert Gerrier)
- 63 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
- 64 Recenzoj: *Postmilita japana antologio*, komp. Odagiri H., Miyamoto M. kaj Konisi G. (Gerrit Berveling); *Koreaj eseoj, noveloj kaj popolrakontoj, 1932-1967*, trad. Hajpin Li (Adolf Burkhardt); *Itala antologio, ekde la 13-a ĝis la 19-a jarcentoj*, red. Giordano Azzi (Martin Haase); *Antologio de maltaj poetoj*, trad. Carmel Mallia (N. Laanoja)
- 66 Foliume (pripresaj raportetoj)
Loke – Fake (mallongaj novaĵoj)
- 67 La membraro de UEA en 1989: Bona bazo por kresko

Vi trovos,

ke la kongreso en Havano kaj ties temo trateksas ĉi tiun numeron – ne ĉiam eksplicite. Recenzoj pri kvar antologioj, ekzemple, reprenas la fadenon de kultura diverseco. Sur aliaj paĝoj temas pri evoluo kaj evoluhelpo, ne nur en Rumanio. Sed specialan atenton ni tamen dediĉas, laŭ la tradicio, al la kongresa lando, kaj pro la estrara aprobo de pli ampleksa jarkolekto ni povas regali vin per eĉ pli bunta gamo da temoj kaj fotoj pri ĝi ol kutime. Se tion vi ĝuas – tiam resendu vian aliĝilon kaj rezervu vian flugon! Gastamaj klimato kaj popolo atendas vin.

Pardonon, cetere, pro la ĉagrena malfruo ĉi-numera. Ĝi ŝuldiĝas al grafika plibeligo de la pretigata Jarlibro.... Kaj leginte la ŝokan informon sur paĝo 42, bonvolu ankoraŭ pacienci kun ni en la venontaj monatoj. Tia perdo ne facile kompensigos.

La kovrilo: Julio estas karnavala monato en Kubo, same kiel por ni esperantistoj. Atendu amason da muziko en ambaŭ festivaloj. (Foto: Mayito & Marucha)

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj.
Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 48,75; US\$ 23; GM 43; enoj 3600; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1540, 1/2 p. 850, 1/4 p. 470, 1/8 p. 260, 1/16 p. 150. Movada rabato 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +3110 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefakso: +3110 436 17 51.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: vakas.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigado, planado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. (01) 542 0302; telefakso (01) 383 4108.

Vicprezidanto (regiona agado, turismo, Fondumo Zamenhof): s-ro Roman Dobrzyński, u. Majdańska 13 m 91, PL-04-088 Warszawa, Pollando; tel. (22) 10 35 05.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj, esperantologio): d-ro Ulrich Lins, Gemarckenstr. 150, D-5000 Köln 80, FR Germanio; tel. (0221) 680 32 50.

Ĝenerala Sekretario: s-ro Osmo Buller, Suksitie 4 B 15, SF-93400 Taivalkoski, Finnlando; tel. (988) 51 003; telefakso (988) 51 681.

Estrarano (informado): s-ro Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, B-2520 Edegem, Belgio; tel. (03) 440 30 92.

Estrarano (financo, junularo): s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Estrarano (landaj kaj fakaj asocioj): s-ro Oszkár Princz, Sallai u. 4. II.3, H-1136 Budapest, Hungario; tel. (HEA) (1) 15 60 244.

Estrarano (azia agado, aplikado en scienco): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 11, Seoul - 158-600, Korea Respubliko; tel. (02) 646 5413; telefakso (02) 275 0633.

Estrarano (kulturo): s-ino Spomenka Štimec, Nova Ves 87, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio; tel. (041) 42 92 51.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 8 Villa Stendahl, F-75020 Paris, Francio; tel. (1) 43 66 63 47; telefakso (1) 43 66 09 92.



Kunsido de la Estraro de UEA, 23-25 februaro:

Subteno al la regionoj – inkluzive Eŭropon

Pasis nur kvin monatoj de post la unua plenkunsido de la nova estraro de UEA. Tamen en tiu mallonga periodo malfermiĝis kvazaŭ nova epoko por la esperantiste plej forta kontinento. Neniu scias ankoraŭ, kiel la politikaj ŝanĝoj en Eŭropo influos la movadon; sed influon ili certe havos. Eĉ se tiu temo malmulte okupis la estraranojn dum la kunsido mem, ekstere ĝi ĉefrolis en la konversacioj kaj rakontoj. Kaj ankaŭ el la protokolo eblas ĉerpi kelkajn punktojn.

Estas jam klare, ke UEA ne atendu eksplodan kreskon de sia membraro eĉ en tiuj landoj, kie la valuto fariĝis konvertebla. “Ne plu ekzistas transpagproblemoj, nur pagproblemoj,” resumis hungara estrarano Oskár Princz. Li antaŭvidas en plej bona kazo nur stabilan membronombron tie. La monproblemo ankaŭ malhelpas vojaĝi, malgraŭ la forigo de kelkaj burokrataj baroj. Tial la ĝenerala sekretario Osmo Buller, kun la subteno de la estraro, lanĉos en la nordiaj landoj proponon pri financa kunlaboro, tiel ke la esperantistoj de la baltaj respublikoj pagu en sia valuto por partopreno en okcidentaj aranĝoj, kaj inverse. La okcidentgermana movado cetere jam pioniris tiun sistemon kun siaj orientaj najbaroj.

Sian konon de la situacio en Sovetunio kaj orienta Eŭropo alportis ne nur niaj pola, hungara kaj jugoslava estraranoj, sed ankaŭ nia koreo So Gilsu, veninte al la kunsido rekte el dumonata vojaĝo tra Sovetunio kaj orienta Eŭropo: pri liaj spertoj vi povos legi alipaĝe. Roman Dobrzyński pludonis la informon, ke Pola Esperanto-Asocio, kiu ĉi-jare estus devinta organizi la tradician Konsultiĝon de la E-asocioj de la socialismaj landoj, anstataŭe invitos ĉiujn eŭropajn asociojn plus UEA kaj SAT al tritaga konferenco antaŭ la jarfino. Dobrzyński ankaŭ vojaĝos baldaŭ al Rumanio laŭ komisiono de la Pola Televido. Liaj kontaktoj tie espereble plifirmigos la rilatojn inter UEA kaj la renaskiĝanta landa movado.

Renovigo en Eŭropo kaj Azio

Ankaŭ sur la tereno de eksteraj rilatoj, la evoluo en Eŭropo alportas ŝanĝojn. UEA havas novan komisiiton por rilatoj kun Eŭropa Konsilio, s-ron Rainer Heckhausen. Kvankam UEA de pluraj jaroj havas konsultajn rilatojn kun la Konsilio, kiu rapide akiras la rolon de centra diskutforumo en Eŭropo, tiu ĉi estas la unua fojo kiam ĝi havas reprezentanton tie. Estrarano Grégoire Maertens siaflanke raportis

La flagoj antaŭ Eŭropa Konsilio en Strasburgo, iam nur 14, eble baldaŭ superos 30. Ĉu UEA sukcesos aŭdigi sian voĉon en tiu multlingva diskutejo, kie nur la franca kaj la angla estas oficialaj?

progreson en la restarigo de Eŭropa Esperanto-Centro, kiu zorgas pri kontaktoj kun eŭropaj parlamentanoj en Bruselo.

La estraro esprimis sian subtenon al la diversaj iniciatoj kiuj aperas por kunlaborigo de la eŭropaj Esperanto-asocioj.

Aliaj aspektoj de la regiona agado signife rolis en la tagordo. Dobrzyński vojaĝis en Sudameriko en oktobro-novembro; laŭ li, la 75-a UK en Havano plu stimulos la komencitan kunagadon de la latinamerikaj landaj asocioj, kiuj jam havas projekton de komuna revuo. En Afriko la estraro konstatis la progreson de la movado en pluraj landoj. Ĝi ankaŭ sendis salutan leteron al la 1-a Togolanda Kongreso, kun apartaj bondeziroj por la organizontoj de la 1-a Afrika Kongreseto fine de la jaro.

Pli ampleksan diskuton vekis la raporto de So pri la situacio en Azio. Okaze de la Konferenco pri la Instruado de Esperanto, novembre en Nanning, li povis interparoli kun 25 gvidantoj de Esperanto-kursoj ĉe diversaj universitatoj k.s. en Ĉinio, kaj ankaŭ renkonti kelkajn gvidantojn de la ĉina movado. La eksploda periodo de la movado tie klare ĉesis, kaj daŭre malfortas la organizaj kaj praktikaj rimedoj por teni la dek- aŭ centmilojn da kursfinintoj. Nur en kelkaj regionoj, notinde Ĉingdao kaj Ĉongĉing, la asocioj sukcesas aranĝi ian konstantan agadon.

La granda bezono en Ĉinio estas do pli altaj lingva kaj organiza niveloj. Feliĉe Ĉina Esperanto-Ligo komencas vastigi sian rolon kiel enlanda kunordiganto. Kun ĈEL So interkonsentis pri kelkaj paŝoj, inkluzive de plivas-tigo de la delegita reto kaj la starigo de unujara kurso por gvidantoj ĉe Universitato Ĉingdao. Oni ne plu parolas pri Azia Centro, sed pri plifortigo de la ekzistantaj asocioj, pliklerigo de iliaj membroj, kaj plimultigo de kontaktoj kun eksterlandaj esperantistoj, precipe koresponde.

Aliloke en Azio la bezonoj ne tre malsamas. Ĉe la asocioj aliĝintaj al UEA So lanĉis projekton pri interŝanĝo

de prelegvojaĝantoj. Al aliaj landoj, kie la movado estas malforta aŭ ne ekzistas, li antaŭvidas la sendon de "vizitantaj delegitoj" kiuj instruu la lingvon kaj kuraĝigu la fondon de kluboj kaj asocioj. Tipo de tia delegito estus Joachim Werdin, kies pasintjara esplorvojaĝo vekis grandan intereson. UEA plu subtenos la agadon de Werdin, rekomendante lian koncentriĝon al la plej promesplenaj landoj de sud-orienta Azio. Ĝi pretas subvencii ankaŭ aliajn agadojn laŭ tiu modelo, same kiel studvojaĝojn de aziaj gvidantoj al Eŭropo, laŭ la limigitaj eblecoj de sia buĝeto.

Promesplena agado de TEC

La plimulto de la estraranoj povis raporti modestan progreson pri la eltrovo de komisiitoj kaj ekstrakto de siaj novaj laborterenoj. Plena listo de komisiitoj aperos en la Jarlibro 1990, do ni ne plutraktos la temon ĉi tie. La estrarano pri kulturo, Spomenka Štimec, kunlaboras kun la Centra Oficejo por okazigi renkontiĝon de eŭropaj Esperanto-centroj en Roterdamo, la lastan semajnfino de marto; ŝajne partoprenos pli ol deko da centroj, kun la celo eltrovi novajn manierojn kunlabori. Kunlaboron stimulas ankaŭ

Ivo Durwael: kun la Oficejo li lanĉis cirkuleron por aktivuloj pri informado, *Influo*, kaj jam elformiĝas kampanjeto por "regionigo" de novaĵoj pri la UK en Havano, sub gvido de Ulrich Matthias (FR Germanio).

La provoj de So kontakti la sciencajn E-instituciojn ĝis nun ne sukcesis, sed li alportis al la kunsido tre favoran raporton pri la organiziĝo kaj programo de Terminologia Esperanto-Centro, kies novan oficejon li vizitis en Zagrebo. Laŭ la peto de TEC la estraro decidis aligi UEA (senpage) al Internacia Normiga Organizo; ĝi krome aŭspicias la unuan grandan projekton de TEC, pri la konstruo de ĝenerala bibliografio de Esperanto. Estas decidite apartigi sumon el la Kapitalo por financi la katalogadon de la Biblioteko Hodler, kunordigotan de vicprezidanto Ulrich Lins.

La estraro donis sian aŭspicion ankaŭ al du atentindaj jubileoj. Pri la Jaro de Eroŝenko (1990) kaj la Jaro de Baghy kaj Kalocsay (1991) vidu paĝon 61.

Kompreneble la temo financo ne restis ekster la diskutoj. Bela surprizo estis neatendite granda gajno el la Brajtona UK, kiu ŝuldiĝis nelaste al la kurzfalo de la pundo. Laŭ la kongresa

regulato, el la profito de ĉ. 145 000 gld. 55% eniros la fondaĵojn kaj rezerveojn de la Asocio. Tio tamen ne mildigas la fakton, ke la spezokonto de UEA amasigis grandan deficiton en 1989.

Fronte al la mondefio

La estraro elektas trakti la malekvilibron en la spezoj kiel stimulon por la starigo de pli forta bazo por UEA. Diversmaniere la estraranoj kontribuas al la membrokampanjo, kiu jam en multaj lokoj allogis la kunlaboron de unuopuloj kaj asocioj. Ili ankaŭ ne lasis, ke la pasintjara deficitito malhelpu kelkajn kuraĝajn decidojn, i.a. la pliampleksigon de la revuo per 24 paĝoj jare. Aperos ankaŭ speciala katalogeto pri la plej gravaj lastatempaj eldonaĵoj, kiu espereble plibonigos la iom laman rezulton de la Libroservo.

La tre harmonia kaj laborema etoso de la kunsido spegulis ne nur ĝian aferecan gvidon de John Wells, sed ankaŭ rimarkindan engaĝiĝon de ĉiuj anoj de la nova teamo. Tiu montriĝas ankaŭ per la fakto, ke ili senescepte antaŭvidas partopreni en la 75-a UK en Havano kaj aktive kontribui al la programo.

Mark Fettes

Neil Salvesen forpasis

La Centra Oficejo de UEA suferis teruran kaj subitan baton, kiam la 16-an de marto forpasis ĝia direktoro Neil Salvesen, pro akuta pulminflamo. Li estis nur 45-jara.

Neil okupis la postenon de direktoro dum iom pli ol du jaroj. En tiu periodo li gajnis la admiron kaj amikecon de la kolegoj en la oficejo kaj tra la movado pro sia administra talento, rafinita kulturo, vastaj scioj kaj granda persona engaĝiĝo en la laboro. La trankvila kaj stabila situacio en la oficejo (denove laŭdita en la lasta estrarkunsido) grave ŝuldiĝis al lia propra trankvila kaj stabila gvidstilo. Enhejmiĝinte en siaj taskoj, li pli kaj pli energie entreprenis novajn: la membrokampanjo, evoluigo de Volontula Servo, lanĉo de novaj fondaĵoj, freŝaj eldonprojektoj, renkontiĝo de Esperanto-centroj (nun prokrastita), kaj aliaj paŝoj por la efektivigo de la Strategia Plano de UEA.

Naskita la 16-an de junio 1944 en Londono, Salvesen diplomiĝis pri

historio en Kemбриĝo, sed li pasigis la plejparton de sia adolta vivo en Manĉestro, kie li okupis diversajn gvidajn postenojn en la Unuiĝo de Brita Teksaĵ-industrio. Esperanton li eklernis en la 60-aj jaroj, kaj ĝi baldaŭ fariĝis grava parto de lia vivo. Li aktivis en la loka movado en Manĉestro kaj dum pluraj jaroj estis konsilanto de Esperanto-Asocio de Britujo. En 1985-1988 li estis kompetenta sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA.

Neil Salvesen estis granda amanto kaj konanto de la beletro ĝenerale sed precipe de la originala E-literaturo. Tio instigis lin ankaŭ mem kontribui sur tiu kampo, i.a. per originalaj verkoj laste premiitaj en la proza kaj poezia branĉoj de la Belartaj Konkursoj 1989. Tamen, lia reputacio de profunda kaj sentema kritikisto plej bone manifestiĝis en lia eldonserio *Esperantaj Kajeroj*, kiu ekde 1977 laŭ modesta sed absolute fidinda ritmo kreskis je po unu titolo jare ĝis lia morto.



Tiuj dek unu libroj, de Lister, Auld, Boulton, Rossetti, Nervi, Newell, Jervis kaj Daŝgupto, konsistigas modelon de prudenta eldonpolitiko; la zorga atento al editorado kaj prezento memorigas pri la renoma Stafeto-serio.

Per la morto de Neil Salvesen la movado perdis multflankan kaj valoregan aktivulon. Liaj oficistoj-kunlaborantoj perdis ion pli: kolegon kaj amikon.

Landa agado:

En Braŝovo ree, tamen sen ĉampano

Kvarope ni sidis ĉirkaŭ la tablo, en pala lampolumo, dum ekstere friskis printempa, senluma nokto. La urbon kovris tenebro.

“Ĉu vere ne estas troa danĝero, ke vi interparolas kun mi?” mi demandis.

“Ni ĝojas renkonti samideanon,” diris la juna instruisto. “Ekde pasinta majo neniu eksterlandano nin vizitis.”

“Vi eĉ povus verki artikolon pri nia situacio,” aldonis la maljuna muzikisto, veterano de la movado. “Por ni mem estus tro danĝere.”

“Ĉar ni jam diris al vi ĉion,” konkludis lia filino. “La monda movado ŝajne forgesis, ke ankaŭ ni situas en Eŭropo. UEA forlasis nin.”

La urbo estis Braŝovo, en Rumanio;

Eksciinte la refondiĝon de Rumana Esperanto-Asocio, ĝia hungara frat-organizo decidis sendi E-librojn, provizore nur kelkajn dekojn en valizoj kaj dorsosakoj, al la revigliĝintaj rumaniaj kluboj. Sed ankaŭ privata promeso min ligas: antaŭ kvin jaroj ni fiksas pakton kun geamikoj Marcu, ke ni regalos nin per botelo da ĉampano post la morto de la komunistaj imperiestroj.

“Jen la plej juna esperantisto de Braŝovo,” montras Constantin al sia unujara filo Cosmin, kiu ekĉifas kun vere movada vervo la alportitajn E-revuojn. Espereble lia cenzuro estas nun la sola. “Li ne plu memoros la teruran reĝimon.”

“Mi metis la plejlaŭtigitan radion fenestren,” rakontas ŝi. “Mi kriis, ploris, ke ili falis, ke ĉio tio finiĝis... La duan fojon mi ploris pro la ĝojo, kiam alvenis, post tiom da tempo, numero de *Esperanto*. Kaj poste ankaŭ ekfluegis la leteroj...”

Refoje iĝas evidente, ke la plej fervoraj aktivuloj neniam ĉesis aktivaj en Rumanio – elpelitaj el kulturdomoj, ili renkontiĝis en kafejoj. Manke de lernolibroj, s-ro Bitay mem kompilis kompendion kaj multobligis ĝin kaŝe en sia laborejo... Nun, kompreneble, ili planas propran ejon, juran personecon... kaj sendependencon de la landa asocio! Kaj ne nur Cluj, ankaŭ Braŝovo esprimas dubojn pri Rumana Esperanto-Asocio kun centro en Bukareŝto. Laŭ la opinioj de tiuj, kun kiuj mi parolis, la distanco de Timiŝoara/Temesvár (kie loĝas prezidanto Ignat Bociort) kaj Bukareŝto (kun la cetera

*Eĉ sub la diktaturo
la E-rondo en Cluj
sukcesis foje kunveni
(la foto datiĝas de 1988).
Tamen ankoraŭ ne mal-
aperis ĉiuj malhelpoj....*



la nokto fakte somere varmis; la “juna instruisto” laboras ĉe la fervojo kaj nomiĝas Constantin Marcu; la veterano de nia movado, s-ano Ion Sîrbu, same fervojistis antaŭ emeritiĝo; “lia filino” efektive identas al Michaela, la edzino de Constantin. Krom ĉio ĉi, la “verkinto konata al la redaktisto”, István Ertl, klopodis skribi la veron en la artikolo “UEA forlasis nin” en la oktobra n-ro de *Esperanto*. Kiel vi sube konstatos, la singardemo estis nepra, la kamuflado pruviĝis eĉ preskaŭ maltroa.

Du monatojn post la sangoza, tutmonde spektata revolucio, detroniginta la getiranojn Ceaușescu, mi sidas en la sama ĉambro kun la samaj geamikoj. Mi alvenis kun duobla celo.

Tiu reĝimo falis en Braŝovo la 21-22-an de decembro, kiam dekmiloj da homoj spitis manifestacie la blindan perfortemon de kirasaŭtoj kaj mitraloj. Sur la frontpaĝoj de postrevolucia gazeto (unua jarkolekto, unua numero) klare videblas Constantin mem inter la protestantoj. Homoj kuglomortis ne malproksime de li. Li restis viva. Sed onidire en Cluj/Kolozsvár ankaŭ du esperantistoj falis heroe – ni esperu, ke la informo estis misa, ja ne eblis ekscii la nomojn.

Memoroj funebraj, dubaj esperoj akompanas min dum la mallongaj tri tagoj, kiuj permesas viziti krome nur Bukareŝton (kaj s-anon Vochin) kaj gastigi en Cluj/Kolozsvár ĉe la familio Bitay kaj s-anino Sigmund.

estraro), la generacia breĉo en la rumania movado, plus eventuala kompromititeco politika de kelkaj, kiuj nun povos strebi al gvidado de la movado, sumiĝas je tro da faktoroj, kiuj malpromesas unuecon kaj unanimecon.

Anojn de tiu provizora estraro, kiu celas ofici ĝis aranĝota landa kongreso komence de septembro, mi bedaŭrinde ne havis okazon renkonti. De s-ano Vochin, movad-historiisto kaj delonga motoro de la E-agado en Bukareŝto, mi eksciis, ke la oficiala registro de REA, male al antaŭaj informoj, estis okazonta nur la 1-an de marto. Laŭ li, Bukareŝto nature pretas akcepti kaj kunordigi helpsendaĵojn (krom libroj, vortaroj kaj revuoj, precipe tajpiloj

estas bezonataj, ĉar ilin privatuloj tre rare rajtis posedi ĝis nun) je la adreso REA, C.P. 37-146, București, sed ankaŭ li konsideras, ke prefere ol sole Bukareŝto, tri-kvar regionaj centroj disdonu senditaĵojn. Por tio jen du aktivulaj adresoj en Braŝovo kaj Cluj/Kolozsvár: s-ro Ion Sîrbu, Bd. Lenin 92, sc. C, ap. 8, Brașov 2200; s-ino Julia 'Sigmond, C.P. 200 Cluj-Napoca 3400.

Feliĉe (kaj atendeble), etnaj diferencoj ne splitas la movadon. Minoritatoj (precipe hungaroj) reprezentigas proporcie pli alte, sed ĉie kunagadas samklube diverslingvaj samideanoj. La hungaroj havas la avantaĝon de propralingvaj lerniloj, dum rumanaj vortaroj mankas kaj la universitata kurslibro de Bociort ankoraŭ atendas reeldonon.

Sed ĉu la plano de librohelpo ne fiaskos? La tagon de mia forverturo ŝoka sciigo informis, ke individuoj ne rajtas kunporti ian ajn hungarlingvan libron al Rumanio krom la Biblio, nur sendi al la koncerna ministerio (en Bukareŝto!). Jen kio povos bari "importon" de hungaraj lerniloj.

La denovaj streĉoj interetnaj, cetere, tensias kvazaŭ Zamenhof-tempe, malgraŭ la promesoj de la revolucio. "Ĉiutage la registaro faras retropaŝon en la minoritata politiko," plendas hungaroj. Eble eĉ la 60 000-kapa Demokratia Ligo de Rumaniaj Hungaroj, la plej granda socia organizo de la lando nun, ne rajtos partopreni la elektojn kiel partio. Rumanio tre bezonus esperantisman toleremon.

Manko de varoj, koruptado, malorganizo kaj mizero plu karakterizas la landon. "Necesas dua revolucio," diras kelkaj, dum ankoraŭ paffulgo nigras sur ĉefurbaj dom-skeletoj.

Ankaŭ fantomoj de la ĵusa pasinteco ree hantas. Constantin estis telefone minacita, eĉ komence de februaro, por ke li nenion rakontu pri la ĉikanegoj de la sekurpolico Securitate, kiu enketadis lin novembre pri liaj internaciaj kontaktoj. Li publikigis kalumniojn pri Rumanio eksterlande, sonis la akuzo. Objekta pruvo estis numero de *Monato*. (Feliĉe, la oktobra numero de *Esperanto* ne atingis tiujn fervorajn legantojn de la E-gazetaro.) Constantin nun rakontis ĉion al kunlaboranto de tiu revuo...

En la hasto de tiom da farendaĵoj, ni forgesis drinki tiun botelon da ĉampano kun la geamikoj. Nomu min superstiĉa, sed tio ŝajnas al mi signo misaŭgura...

István Ertl (Hungario)

Timișoara denove viglas

La unua libera urbo de Rumanio, jam delonge centro de la Esperanto-movado en nia lando, estis ankaŭ la urbo kie naskiĝis, la 7-an de januaro 1990, Rumana Esperanto-Asocio. La iniciato venis de Kolektivo Esperanto kaj Interlingvistiko (KEI) de la Universitato de Timișoara. Por faciligi ĉiujn kontaktojn, tamen, la estraro troviĝas precipe en Bukareŝto. KEI restas kaj agadas plu en Timișoara, kie laŭ decido de la universitata Senato ĝi ricevis la nomon de Tutlanda Universitata Esperanto-Centro. (Vd. enkadran tekston por nomoj kaj adresoj.)

La 14-an kaj 15-an de januaro, Radio Timișoara aŭdigis radioelsendon kun salutoj en pluraj lingvoj, tri-minuta parolado en Esperanto kaj dek-minuta prezento en la rumana pri la nova asocio kaj ĝiaj idealoj. La urba ekologia gazeto havos ekde sia unua numero kelkajn paĝojn en kaj pri Esperanto. La universitato kaj la ŝtata eldonejo de Timișoara reaperigos grandkvante kaj en multe pli bonaj teknikaj kondiĉoj ol antaŭe *Curs elementar de esperanto* (I. F. Bociort kaj Mioara Dobre). En du-tri monatoj estos preta por eldono la granda Esperanta-rumana vortaro kompilita de KEI.

Oni tre bone konscias, ke E-organizaĵoj ne estas riĉaj entreprenoj. Tial ni faras nur jenajn sugestojn rilate al ebla helpo:

Inviti gejunulojn al viaj sciencaj,

kulturaj, movadaj, turismaj aŭ lingvo-perfektigaj aranĝoj. Tio grave efikos en nia lando, kiu jardekojn mankis al Esperantujo. Nur per nekredeblaj fortostreĉoj, kelkaj povis partopreni iujn eksterlandajn aranĝojn; la eĥo inter la aliaj gejunuloj estos grandega.

E-librojn kaj revuojn ni bezonas por teorie fundamenti la movadon, por kursoj, perfektigaj legaĵoj ktp. En la lastaj jardekoj, rumanoj eksciis nur per hazardo, aŭ la afableco de kelkaj eksterlandaj amikoj, kio "laste aperis". Nur ses jarojn estis aboneblaj periodaĵoj en Esperanto el *iuj* socialismaj landoj. Eĉ malnovaj revuoj tial estus bonvenaj.

Fine, pluraj registaroj, bonfaraj riĉaj medioj kaj internaciaj organizaĵoj demandas, kion sendi al Rumanio. La radiostacio kaj televido de Timișoara petas la esperantistojn konsili la koncernajn bonfarantojn, ke ili sendu al Timișoara profesiajn aparatojn por ties elsendoj: temas pri radioaparatoj UHER aŭ NAGRA, magnetofonoj, sonbendoj BASF aŭ Philips, vidbendoj, teleksilo, fotokopiilo, tajpiloj k.s. Kelkajn el la nomitaj aparatoj nepre bezonas la E-movado mem. La aparatojn taŭgajn nur por la stacioj ni sendos al Radioteleviziunea, str. Cluj 24, R-1900 Timișoara.

Ni tutkore dankas pro la grava helpo al la rumana popolo kaj al progresigo de Esperanto en Rumanio.

Ignat Bociort (Rumanio)

Rumana Esperanto-Asocio, C.P. 37-146, București.

Estraro: Prez.: prof. d-ro Ignat Bociort, Bd. Broilor 7/D, Timișoara. **Vicprez.:** prof. d-ro Aurel Boia, C.P. 17-24, București; d-ro Constantin Dominte, Oteșani 20, bloc T 23 B, ap. 27, București. **Kasisto:** Olga Nica, Cihovschi 11, ap. 5, București.

Tutlanda Universitata Esperanto-Centro: Colectivul de esperanto, Universitatea din Timișoara, Bd. V. Pârvan 4, R-1900 Timișoara. **Estro:** prof. d-ro Ignat Bociort, adreso supre.

Jam multaj asocioj kaj individuoj reagis al la helppetoj el Rumanio. Bulgara E-Asocio transpagis 5 000 levojn al la nova landa asocio pere de la Ruĝa Kruco. Hungara E-Asocio komencis la transsendon de libroj ĝis valoro de 50 000 forintoj. Flandra E-Ligo pagis la abonojn de deko da rumanoj al *Monato*. UEA aligis pli ol 40 aktivulojn el sia Fondaĵo Canuto, kaj jam planas la sendon de libroj je kelkaj miloj da guldenoj. Venis al la CO diversaj adrespetoj kaj donacoj por la konto "Rumanio".

Aliĝu hodiaŭ al tiu solidara agado!

Vojaĝimpresoj:

Pionire trans la siberian ponton

UEA-estrarano So Gilsu, profesoro pri ekonomia historio ĉe Universitato Kuk-ĝe en Seulo, Koreio, eklernis Esperanton en 1966. Intertempe multo ŝanĝiĝis en lia lando kaj en la monda movado. Koreio ne plu troviĝas kvazaŭ rande; ĝiaj kontaktoj kun la najbaraj landoj kaj kun Eŭropo plimultiĝas, ĝi fariĝas alloga celo por vizitoj kaj internacia kunlaboro. Ankaŭ enlande kreskegas la intereso pri la cetera mondo. Instigite de tio, So entreprenis pli ol dumonatan vojaĝon tra Sovetunio, Bulgario, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Pollando kaj orienta Germanio. Renkontante esperantistojn kaj neesperantistojn, gastante en iliaj domoj, intervjuante pli ol 50 familiojn pri ilia ĉiutaga vivo, li amasigis spertojn por la verkado de artikoloj kaj libro en la korea, kio okupos lin dum la venontaj

kaj mi sciis, ke la estrarkunsido venos fine de mia vintra feriperiodo. Fine mi ricevis peton de gazeto, skribi pri la vivo de junaj geedzaj paroj en tiuj landoj. Tio estis tre kuraĝiga, ĉar mi ekhavis konkretan celon. Do, mi komencis esplori la aferon. Fakte surprizis min mem, ke sidante hejme mi povas paroli ekzemple kun Gonĉarov en Moskvo. La preparoj iris tre glate, kun bona kunlaboro de lokaj organizantoj, kaj fakte la antaŭvidita programo preskaŭ perfekte realiĝis.

“Mia vojaĝo komenciĝis per flugo el Japanio ĝis Ĥabarovsk, ĉe la transsiberia fervojo, ĉar bedaŭrinde mi ne rajtis iri al Vladivostok pro sekurecaj kialoj. Cetere nur en tri urboj estas permesate, ke oni eliru la trajnon, tamen ĉie krom en Ĥabarovsk mi trovis esperantistojn. Kompare kun Ĉinio ili sufiĉe bone parolas Esperanton, malgraŭ sia izoliteco kaj la manko de landa asocio. En Irkutsk mi malkovris sciencan kooperativon, kiu aplikas Esperanton malgraŭ tio, ke troviĝas tie nur tri bonaj esperantistoj. Novosibirsk male havas sufiĉe stabilan

sukcesas vivteni sin per tiu laboro. Fakte en la aktivado de Kopso partoprenas ankaŭ la estraranoj de SEU, kiu mem ne tiom viglas. La SEU-prezidanto parolis al mi precipe pri la Eldono de *Moskvaj novaĵoj*; li renkontis malfacilaĵojn ĉe ties ĉefredaktoro, tamen li kontaktis rekte la eldonejon kaj esperas tiel aranĝi la aferon.

“Krom tio en Moskvo mi prelegis en la klubejoj. Post du tagoj en hotelo mi ekgastis ĉe mia filatela korespondanto kaj ankaŭ kun Lev Medvedev, prezidanto de la moskva scienca Esperanto-klubo: tiel mi povis antaŭenigi ambaŭ aferojn. Mi ankaŭ skiis ok kilometrojn, kio por mi estis iom tro!

Streĉaj programoj

“De tie mi flugis al Bulgario, kie oni perfekte aranĝis mian programon. Fakte mi protestis nur ĉar mi devis dormi en hotelo; tamen mi poste tute ignoris la oficialan sistemon, kaj ĉe mia foriro la limkontrolisto ĉagreniĝis sed povis fari nenion... En Plovdiv mi trovis fortan movadon, kaj mi surpriziĝis precipe pri la bonfarto de BEA, ke ĝi estas pli riĉa ol UEA! Pasintjare ĝiaj investoj alportis profiton de miliono da levoj. Ankaŭ Pisanica donas ege fortan impreson, ke la movado havas tian domon. Cetere miaj gvidantoj aranĝis anoncojn en la radio kaj televido pri mia prelego pri la korea kulturo.

“Kontraŭ mia supozo, la Esperantomovado en la jugoslava ĉefurbo Beograd ne estis tiel vigla – sed tre streĉa programo komenciĝis en Sarajevo. Mi alvenis frumatene, je la 9-a mi renkontis profesoron pri ekonomiko, poste gvidanton de la tutlanda Junulara Unuiĝo, tiam venis du ĵurnalistoj por du-tri horoj; je la 14-a mi devis paroli kun studentoj, sekve kun la gvidantoj de la loka E-Ligo, kaj tuj post manĝeto ni devis iri al la universitata E-klubo. Kiam mi revenis, tre malfrue, al miaj gastigantoj, mi trovis ke ili denove aranĝis manĝon por mi... La movado en Sarajevo ŝajnis al mi ege aktiva kaj konkreta, kun bona kunlaboro inter la tri gravaj centroj de agado.

“Ankaŭ en Zagrebo atendis min tre streĉa programo, kun perfekta organizo – precipe de mia prelego ĉe la Komerca Ĉambro, kie oni disdonis la tradukitan tekston, televida kanalo filmis dum unu horo kaj poste intervjuis min... Entute mi faris sep intervjuojn dum du tagoj. La atento kaj la demandoj dum la prelego estis tre



De multaj jardekoj la transsiberia fervojo allogas aventuremulojn. Nun la vigliĝo de la sovetia, ĉina, korea kaj japana movadoj povus fari ĝin ligilo inter la esperantistoj de Eŭropo kaj Azio.

monatoj. Sed kelkajn detalojn, aparte interesajn por esperantistoj, li pretis anticipi malkaŝi por niaj legantoj.

Vigla E-vivo en Siberio

“Estis kelkaj motivoj por entrepreni tian vojaĝon. En Koreio ege populariĝis la afero pri orienta Eŭropo, tamen la ĵurnalistoj skribas nur pri politiko kaj ekonomio, neniam pri la vivo mem de la homoj. Kiam mi fariĝis estrarano de UEA, mi ekpensis, ke mi ankaŭ devus pli konatiĝi kun la movado, renkonti la multajn esperantistojn-sciencistojn en la “soclandoj”,

Esperanto-movadon. Tie la prezidantino kaj delegito bonvenigis min post la noktomezo, kaj du esperantistoj eĉ venis el Tomsk por renkonti min. Kun ili mi ege ĝuis la festadon de la sovetia Novjaro...

“En Moskvo tre impresis min la kooperativo “Kopso”, kiu rikoltas grandan sukceson en la instruado de Esperanto. Mi miris, ke ili elspezis 6 000 rublojn por televidaj reklamoj. Per tio ili allogis 1200 lernantojn, el kiuj ĉiu pagas 30 rublojn por 12 lecionoj kaj preskaŭ 70% pluiras al la progresiga kurso. Kvin personoj

viglaĵ, same en Banja Luka kien mi poste iris.

“En Budapeŝto mi tuj sentis vivantan Esperanto-movadon. Tre imponis la grandega sidejo de HEA, kaj ankaŭ la ekonomia konferenco EKOTRANS, kie oni uzis Esperanton kiel laborlingvon apud la hungara kaj la angla. La salono estis plena, la prelegoj interesaj, kun bona E-tradukado. Surprizis min vizito al la lernejo de Fondaĵo Talento, kie de oktobro 22 infanoj lernas Esperanton 1-2 horojn tage kiel parto de speciala studprogramo. Dum unu horo mi ludis kun la infanoj, kaj mi trovis neniun mankon en ilia lingvoscio. Mi disdonis Esperantajn poŝtkartojn kun iliaj nomoj en la korea alfabeto, kio tre plaĉis al ili... kaj mi ekhavis la ideon en Koreio starigi similan programon. Tre interesa estis ankaŭ la fakmezlernejo “Bogi Ilona”, kies direktoro József Kiss, kvankam neesperantisto, enkondukis Esperanton kiel ĉefan fremdan lingvon en la pasinta jaro; jam du-tri klasoj elektis studi ĝin. Esperanto evidente havas sufiĉe fortan pozicion en la hungara edukistemo.

Kapitalismaj ideoj

“Denove en Ĉeĥoslovakio mi frontis preskaŭ diktatoran, sed tre bonan programon. La administrejo de Slovaka Esperanto-Asocio en Poprad ege imponis: temas nur pri malgranda urbo, sed ties estraro faris tiel bonan ofertan al la esperantistoj, ke ili ne povis rifuzi. Nun al la du konstruaĵoj en la urbocentro aldoniĝis kastelo ĉirkaŭ tridek kilometrojn for. Ĝin ili baldaŭ ekrenovigos, cele al eta konferencejo, espereble ankaŭ presejo. En Bratislava kaj Prago mi prelegis antaŭ neesperantistaj ekonomikistoj, tre sukcese. Ekzemple en Bratislava la vicrektoro unue petis ke mi parolu angle, tamen post mia prelego li mem pardonpetis, ke li ne parolas Esperanton! Do, tio estis vera interŝanĝo de scienco pere de Esperanto.

“Kiam en Prago mi intervjuis reprezentantojn de la Civitana Forumo kaj Publiko Kontraŭ Perforto, ankaŭ ili unue dubis pri la uzo de Esperanto. La tradukado funkciis tre bone, kiel en la aliaj landoj, tamen kiam mi partoprenis en seminario de la ĉeĥa junulara asocio mi trovis eĉ pli bonan lingvonivelon ol ĉe la plenkreskuloj. Ili levis multajn demandojn pri la teknikaj aspektoj de eventuala UK en Prago, ekzemple pri la kapablo elteni ses mil kongresanojn, tial mi plene fidis pri la nivelo de la preparoj.

“En Pollando estis evidente, ke oni tre volas aŭskulti miajn kapitalismajn ideojn. En Varsovio mi havis du grandegajn prelegojn, unu antaŭ la Komisiono pri Ekonomia Planado, la alian ĉe organizaĵo por trejni junajn entreprenistojn, kio ŝajnis al mi multe pli aktuala... En Bydgoszcz okazis Foiro de Esperanto-Turismo, ĉe kiu mi povis detale diskuti la strategion en Azio kun Joachim Werdin. Poste en Bjalistoko mi prezentiĝis en la televido kaj renkontiĝis kun la vicestro de la vojevodio. Pro la enlandaj ŝanĝoj poloj preskaŭ ne havas monon por la Esperanto-centro; ili atendas monon de la esperantistoj, eĉ de Koreio! Tamen Esperanto klare havas lokon en la urba vivo kaj politiko.

“En GDR mi vizitis la filiojn de la Kulturligo en diversaj urboj, sed ili ne povis pozitive aranĝi ion krom kunveno kun la esperantistoj. Tiu situacio estas karakteriza por la lando: preskaŭ ĉio haltis, ĉar ĉiuj atendas la balotojn. Ili cetere konfesis, ke ĝis nun ili tute ne cerbumis pri la financa afero. Tamen estas vere interesa fenomeno en Berlino kaj apud la landlimo, ke esperantistoj el okcidenta Germanio vizitas klubojn en oriento kaj inverse. Ankaŭ mi volis transiri tiun landlimon, do en iu eta vilaĝo mi simple promenis de oriento ĝis okcidento kaj daŭrigis mian vojaĝon...

Pli ligi al la praktikeco

“Dum mia vojaĝo plej gravaj por mi estis la prelegoj – la uzo de Esperanto por praktika scienca aplikado. Tio eblis nur pro la perfektaj lokaj interpretistoj. En Koreio ni povus jam fari tion en kelkaj fakoj – lingvistiko, ekonomio, sed ne multaj. Estas vere, ke la studentoj multe aktivas ĉe ni; tamen profunda studo de la lingvo mankas, cetere tion malhelpas du-trijara militservo. Dum mia vojaĝo mi iomete sondis la eblecojn pli ligi Esperanton al la praktikeco, per interŝanĝo de esperantistoj inter Eŭropo kaj Azio. Granda avantaĝo estas la ebleco loĝi malmultekoste, tamen granda malfacilaĵo estas la vojaĝkosto. Se efektiviĝos planata ŝipa ligo inter Koreio kaj Ĉinio, tiam mi vidas eblecon uzi ĝin kaj la fervojon kiel ponton inter ni kaj orienta Eŭropo. Cetere jam ekzistas 4-5 ŝiplinioj inter Koreio kaj Japanio. Estas ankaŭ signoj ke baldaŭ Aeroflot flugos inter Moskvo kaj Seulo. Espereble ĝis la koreaj kongresoj en 1994 tiu vojaĝo fariĝos pagebla kaj eĉ populara inter esperantistoj.”

intervjuis Mark Fettes

Faka agado:

Ekologio, kulturo en rusa kadro

Laŭ decido de UN/UNESKO la jaroj 1988-1997 estas deklaritaj “Monda Jardeko por Kultura Evoluo”. Ene de ĝi, 1991 estos la Jaro de la Rusa Kulturo (JRK).

La organiza komitato de la Jaro kontaktas la registarojn kaj parlamentojn de multaj landoj, 250 ne-registarajn organizaĵojn, la katedrojn de slavistiko en 70 universitatoj de Eŭropo, Usono kaj Kanado, ĉiujn rusajn fondusojn, arkivojn, bibliotekojn, eldonejojn, muzeojn, galeriojn, ekspoziciojn kaj muzikajn halojn, teatrojn kaj kinejojn, ĉiujn ortodoksajn preĝejojn kaj komunumojn tutmonde. Kun ilia helpo kaj partopreno estas ellaborata kaj efektivigata kompleksa kultura JRK-Programo 1991.

En la monda programo de la Jaro estas 3 ĉefaj celoj:



La unua rusa biblioteko, fondita en 1037 en Sofia-Katedralo, Kievo.

“Unue, en la kunteksto de la tutgloba ekologia krizo doni al la mondo plenan prezenton pri la rusa valoraro – pri la spiritaĵoj valoroj elsuferitaj dum la jarmilo de la rusa kulturo, pri la idealoj kaj kanonoj de la rusa ortodoksismo, arto, literaturo, filozofio kaj scienco.

“Due, restarigi konfidon kaj vivajn kulturajn ligojn inter Rusio kaj la rusa diasporo (tio estas, kun la malnovkreda kaj politika elmigrantaro de la 19-a kaj tri elmigrantaroj de la 20-a jarcento). Sur tiu bazo kreskigi novan fundan unuecon de la nacia konscio

kaj aranĝi intensajn kaj reciproke profitajn kulturajn, ekonomiajn, edukajn, klerigajn, parencajn kaj aliajn ligojn.

“Trie, tio devas konduki al la kreo de nova strukturo de kulturaj, spiritaĵoj, ekonomiaj, teknologiaj ligoj de Rusio kun popoloj kaj landoj sur ĉiuj kvin kontinentoj. Ĉar akcepto de la unueca homaro estas ekologia imperativo de la epoko, la Jaro de la Rusa Kulturo 1991 estos emfaze internacia aranĝo, en kiu estas invitataj partopreni ĉiuj kulturagantoj, ĉiuj teranoj, sendepende de la raso kaj nacieco.

“La kreskigo de la unueca homaro vojas tra kreo de nova unueca valor-sistemo, surbaze de la historiaj valoroj de diversaj kulturoj kaj popoloj. Tial ni devas studi kaj kompreni la spiritan esencon de la grandaj kulturoj de la Okcidento kaj Oriento, kompreni kaj ekami iliajn idealojn.”

Evidente ĉi tiuj celoj donas al la Esperanto-movado grandan agad-terenon. Laŭ iniciato de Moskva Scienca Esperanto-Klubo, dum la 74-a Universala Kongreso en Braĵtono estis pridiskutita kaj akceptita la ideo okazigi dum la Jaro rusan sesion de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, kun kadra temaro: “Lingvo – Kulturo – Ekologio”. Inter-tempe la iniciato rapide progresis, ricevante subtenon de pluraj sovetiaj organizaĵoj.

La 1-an de septembro 1989 okazis en Moskvo la unua kunsido de la organiza komitato. Ĉeestis ĉ. 30 reprezentantoj de 10 organizaĵoj kaj institucioj (foto), inter kiuj troviĝis la ĝenerala direktoro de la JRK-Programo, verkisto-sciencisto Vladislav Len. Ili agnoskis, ke la rusa AIS-sesio povas iĝi perlo de la tuta monda programo, kaj alvokis esperantistojn el-labori por la Jaro propran internacian programon, promesante plenan apogon.

La 18-an de oktobro, prezidi-kunsido de Sovetrespublikara Esperantista Unio pridiskutis tiun Esperanto-programon por la Jaro. Nun ni prezentas ĝin al la legantoj – por amika juĝo kaj plibonigo. Ni esperas, ke ĝiaj gravaj celoj kaj granda kunlabor-skalo inspiras la esperantistaron aktive subteni ĝin kiel kunorganizantoj sur la landa kaj internacia niveloj. Sendube, ĝia sukceso donos strategiajn atingojn por la tuta monda Esperanto-movado, plene akordajn kun la nova strategio de la movado por la dua jarcento de Esperanto. Ĝia ĉefa celo: montri al la mondo Esperanton kiel rimedon por

reciproka pliriĉiĝo de la kulturoj kaj por protekto de la lingva kaj kultura diverseco – unu el la bazaj valoroj de la estonta unueca homaro.

La rusa AIS-sesio estos centra aranĝo. Ĝian sciencan parton gvidas internacie konataj fakuloj el akademias institutoj de la lingvoscienco (S.N. Kuznecov: sekcio “Lingvo”), de la rusa lingvo (V.P. Grigorjev: “Kulturo”), de la geografio (A.D. Armand: “Ekologio”). Al la intelekta potencialo de la

“La kreskigo de la unueca homaro vojas tra kreo de nova unueca valor-sistemo, surbaze de la historiaj valoroj de diversaj kulturoj kaj popoloj. Tial ni devas studi kaj kompreni la spiritan esencon de la grandaj kulturoj de la Okcidento kaj Oriento, kompreni kaj ekami iliajn idealojn.”

organiza komitato kontribuas pliaj 15 doktoroj de filologio, arto, geografio, biologio, kemio kaj aliaj sciencoj. Ni estas dankaj al bulgaro Cvetan Kardaŝev, kiu iĝis scienca sekretario de la sekcio “Ekologio” (dum la sesio konsiderota ĉefe de la humanisma aspekto: ekologio de la lingvoj kaj kulturoj) kaj invitas novajn sinproponojn de eksterlandaj fakuloj pretaj internaciigi la aranĝon.

La rusa AIS-sesio enhavos enkondukajn kaj specialajn kursojn por studentoj kaj universitatanoj, same kiel unuopajn prelegojn kaj forumojn pri i.a. jenaj temoj:

- rolo de la rusaj lingvo kaj kulturo en la tutmonda kulturo;
- lingvo-evoluoj kaj interkomunikado;
- lingvo- kaj kultur-protekto;
- medi-protekto = natur-protekto + kultur-protekto.

Ni petas kontribuontojn laŭeble frue sinanonci por jam kiel eble plej frue prezenti al la sovetiaj aŭtoritatoj la tutan projekton.

Krom la sesio mem, okazos kiel

preludo internacia simpozio kadre de la 27-a Baltia Esperanto-Tendaro (Jelgava, Latvio, 11-19 julio 1990). La temo estas “La rolo de Esperanto en protekto kaj riĉiĝo de la naciaj kulturoj”. Ronda tablo pri la sama temo, kadre de la AIS-sesio mem, ebligos kvazaŭ resumi la Jaron. La simpoziaj kaj sesiaj tezaroj kaj sesiaj studoj estos publikigitaj ruse kaj en Esperanto – la laboraj lingvoj de ambaŭ aranĝoj. Ilia respondeca organizanto estas Moskva Scienca Esperanto-Klubo, Sadovaja Kudrinskaja 18, SU-103001 Moskvo; tel. 291 30 18.

En la proponita Esperanto-programo troviĝas ankaŭ jenaj agadoj: katalogado de la rusa literaturo en Esperanto kaj eldono de la plej bona(j) verko(j) (sendu ĉiujn rilatajn materialojn al SEU-prezidanto Vladimir Samodaj); internacia ekspedicio laŭ la vivovojo de la blinda E-poeto Vasilij Eroŝenko, okaze de la 100-jariĝo de lia naskiĝo en 1990; pretigo de la rusa-Esperanto-rusa konversaciilo kaj de multlingva ekologia vortaro kun difinoj en Esperanto. Ĉio ĉi estos resumita dum la sesio.

Trionon de la programo okupas ekologiaj aranĝoj en la formo de internaciaj ekspedicioj laŭ Nigra Maro, Atlantiko kaj eble ankaŭ Pacifiko. Kadre de ili okazos JRK-programeroj. Tiuj aranĝoj elvokis la plej grandan interesigon de neesperantistaj organizaĵoj kaj eble iĝos la plej grand-skala propagandilo de Esperanto kiel labora kaj punta lingvo. Plej frukto-dona povus iĝi apliko de Esperanto en la Nigramara baseno. Al esperantistoj apartenas la honoro esti iniciatintoj de la internacia movado “Ni Savu la Nigran Maron”. Ĉu Bulgara Esperantista Asocio, kies ekologia sekcio subskribis la unua la Alvokon al Loĝantoj de la Nigramara Baseno, ne kuraĝos iĝi centro de la tuta movado!? Tio havus grandan internacian resonon!

Nun plej atendataj estas resumaj tezoj por la Simpozio kaj Sesio. Ili estu tajpitaj kun 1,5 interspacoj. Sub la titolo necesas indiki la aŭtoran nomon, sciencan gradon, landon; sub la teksto en la piednoto – la reprezentatan institucion kaj la adreson. La simpoziaj tezoj estos akceptataj ĝis 1 majo 1990, la sesiaj – ĝis 1 januaro 1991, dezirinde en ambaŭ lingvoj, ĉiu sur 1 paĝo. Materialo por publikigo en la sesiaj studoj estos akceptata ĝis 25 decembro 1991.

L.V. Medvedev
direktoraro de JRK – 1991
a.k. 15, 117449 Moskvo, Sovetunio

Tradukoj:

Kune kun Havel

La pola monata revuo *Literatura na Świecie* (Literaturo en la mondo) publikigis en sia numero 8-9/1989 centpaĝan materialon dediĉitan al Esperanto. La internacilingvan literaturon reprezentas poemoj de William Auld, Albert Goodheir, Kris Long, Baldur Ragnarsson kaj du prozaĵoj de Endre Tóth. Inter ili elstaras la tradukaĵoj el W. Auld ("La infana raso" I kaj IV, "Anna"), per kiuj Roman Kwiatkowski venkis antaŭ kelkaj jaroj en konkurso pri poligo de Esperantaj poemoj. La tradukajn specimenojn prikomentas eseoj de Vilmos Benczik ("Teoriaj problemoj de la Esperanto-literaturo"), Kris Long (artikolo pri la evoluo de la poezio, verkita speciale por la revuo), Wojciech Usakiewicz (skizo pri la prozo). La tuton kompletigas kunmetaĵo farita el intervjuoj kun Esperantaj verkistoj.

Al la realigo de tiu projekto kontribuis kiel tradukintoj: Tomasz Chmielik, Jan Kos, Roman Kwiatkowski, Izabela Sawoyka, Barbara Sokalówna, Wojciech Usakiewicz kaj ankaŭ Kris Long, kun la subteno kaj helpo de kelkaj aliaj personoj. La revuo certe disvendiĝos rapide, ĉar en la sama numero ĉeftemas la verkaro de Václav Havel.

Wojciech Usakiewicz (Pollando)

Kulturo:

Nek estrarano nek redaktoro

Dum la Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo, jar-komence, ni faris enketon inter la ĉeestantoj pri la "movadulo de la 80-aj jaroj". Ĉiu, kiu ĉeestis la silvestran (novjaran) balon (temas pri proksimume 200 homoj) ricevis voĉdonilon kaj devis surskribi 2 nomojn: la personon de la 80-aj, kaj la esperantiston de la 80-aj. Persono de la 80-aj fariĝis Gorbaĉov (67 voĉoj) antaŭ Miki-muso (9 voĉoj), el kio vi vidas, ke eble ne ĉiuj prenis la baloton tre serioze.

Ne tiom klara estis la rezulto ĉe la esperantistoj:

Se vi kreas novstilan revuon kaj regule aperigas numerojn tra tuta jar-deko (Stefan Maul), aŭ se per servado

al la movado dum sep tagoj ĉiusemajne vi akiras la titolon de ĉefdirektoro (Simo Milojević), aŭ se vi sukcesas trian fojon fariĝi UEA-prezidanto (Humphrey Tonkin) – la movado ne aprezas tion. Ĉiuj tiuj tri elstaruloj ricevis nur po 2 voĉojn.

Eble pro la averaĝe juna aĝo de la voĉdonintoj la 24-jara Thomas Pusch el Bonn akiris la 3-an lokon kun 14 voĉoj: li dum jaroj ĉeforganizis la Internaciajn Seminariojn kaj redaktis *Koncize*, ekzemple. Sed por atingi plej altajn honortitolojn ne necesas esti estrarano aŭ redaktoro, eĉ ne poeto; plej gravas aliaj kvalitoj. Gunther Neue el Marburg (FRG) okupis rangon 2 en tiu listo, kun 15 voĉoj, ĉar ĉiunokte dum tiu 33-a IS, kiam fermiĝis la oficiala bufedo, Gunther komencis kaŝe kaj private pluvendi bieron.

Sed kiu estas la esperantisto de la 80-aj, proklamita la 31-an de decembro 1989 je la 23-a horo kaj 45 minutoj? – Kim Henriksen el Kopenhago. Li ja alportis ion tute novan al la Esperanto-movado: rok-muzikon. Jam en la 70-aj jaroj Kim saltis tra kongresejoj kun sia akordiono, ludante kaj kantante de angulo al angulo. En la 80-aj jaroj tiu lia agemo akiris iom pli altan kvaliton: kun kelkaj amikoj Kim fondis la Esperantan rok-grupon "Amplifiki", kiu komponis, kantis kaj koncertis en multaj landoj. Intertempe fondiĝis multaj aliaj rok-grupoj en la movado, kaj Amplifiki-kantojn kiel "Sola" aŭ "Tute ne gravas" multaj junaj esperantistoj konas pli bone ol "La Espero". Eĉ se tiun evoluon ne ŝatas ĉiuj – tio ja pruvas, ke Kim vere influis la Esperanto-kulturon.

Thomas Bormann (FR Germanio)

Nekrologo:

Paul Ariste (1905-1990)

La 2-an de februaro 1990 mortis Paul Ariste, eminenta finn-ugra lingvisto, pioniro de la estona Esperanto-movado kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

Paul Berg (la nomon Ariste li adoptis en 1927) naskiĝis la 3-an de februaro 1905 en la estona urbo Torma, norde de Tartu, kaj ekde 1916 edukiĝis en Tallinn. 14-jara li eklernis Esperanton de Hilda Dresen. En la nova lingvo li verkis siajn unuajn sciencajn studojn, pri la malgranda liva popolo kaj pri esperantologiaj temoj. Ankoraŭ tre juna, li kunlaboris en la verkado de Esperanta ŝlosilo por estonoj (1923) kaj ampleksa Esperanto-estona vortaro (1927). Ĝis la ricevo de sia universitata diplomo en 1929 li restis aktiva en la estona movado.

De tiam dum pluraj jaroj lia kariero ricevis prioritaton, kaj en relative mallonga tempo li fariĝis unu el la plej brilaj steloj de la eŭropa lingvoscienco. Li okupiĝis pri ĉiuj aspektoj de la lingvoj en sia regiono, ne nur la finn-ugraj sed ankaŭ la ĝermanaj (precipe la sveda), la rusa, latva, juda kaj cigana, verkante pri iliaj fonetiko, sociologio, literaturo kaj folkloro. (Dum sia vivo li akiris aktivan scion de 26 lingvoj, kaj pasivan konon de tri-deko.) Ekde 1932 li okupis diversajn



postenojn en la Universitato de Tartu, fariĝante profesoro en 1944. En 1954 li estis elektita al la Estona Akademio de Sciencoj; en postaj jaroj kaj la finna, kaj la hungara akademioj nomis lin honora membro, kiel faris multaj aliaj sciencaj societoj kaj institutoj.

Paul Ariste aperigis entute pli ol mil sciencajn studojn, inkluzive de pli ol 40 libroj. En 1956 komencis denove aperi liaj artikoloj pri Esperanto, kiun li instruis kaj propagandis kadre de sia universitato. De antaŭ deko da jaroj li patronis la gravan interlingvistikan revuon *Interlinguistica Tartuensis*, kiun iniciatis lia kolego A. Duliĉenko. Precipe tia patroneco estis grava apogo al la estona kaj sovetia movadoj dum malfacilaj jaroj.

Al Kubo kongrese!

*Tra la maro de l' antiloj
naĝas ŝip' papere blanka
navigas ĝi, navigadas
pilotomanka.*

– Nicolás Guillén

Onirakonte, la dudek-sepan de oktobro 1492, kiam la ĝenova navigisto Kristoforo Kolumbo elŝipiĝis ĉe ankoraŭ ne tro precize konata punkto sur la nordorienta marbordo de Kubo, li eksklamis forte impresite de ĝia sovaĝa bunteco: "Jen la plej bela lando, kiun homaj okuloj iam vidis." Ĉu post preskaŭ kvincent jaroj ankoraŭ eŭropano, alvenante ĉi tien, ekkrius same?

Eble ne. Fakte, post tiu tiel nomata "civiliziga invado", la natura medio rapide detruigis. Jam ne plu ekzistas densaj arbaregoj, nek grandaj multkoloraj papagoj (nur escepte en naciaj parkoj kaj zoologiaj ĝardenoj), nek la noblaj grandokulaj indianoj. Tamen restas, tute samaspektaj, la intense blua maro, la brile pura ĉielo kaj ia aera kristaleco, kiuj ankoraŭ ravas la vizitantojn. Kaj varmakore atendas ilin popolo tute miksitaj el eŭropaj, afrikaj kaj aziaj radikoj, tamen nacie kaj lingve homogena.


Kiel kutime, en tiu ĉi numero de *Esperanto* la venontkongresa lando sin prezentas. Kompreneble, mi volas inklini ĉiujn al partopreno en nia 75a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Havano de la 14a ĝis la 21a de julio, kvankam mi plene konscias pri kelkaj malfacilaĵoj en la vojaĝado por la cetero ne tro monhava esperantistaro.

Turisma paradizo

Kaj tamen, unue mi devas rimarkigi, ke Kubo estas lando ideala por turismo. Lastatempe la nacia ekonomia politiko prioritatis la disvolvon de giganta tiurilata industrio. Iom post iom la kubaj turismejoj akiras renomon tutmonde. Naturaj kondiĉoj certe ne mankas.

Insulo situanta sur la Kankra Tropiko, Kubo ĝuas milde varman veteron la tutan jaron. Eĉ dum la plej sunplenaj monatoj, de junio ĝis aŭgusto, la moderiga efiko de la ĉie ĉirkaŭanta maro ebligas senĝenan restadon ie ajn tra la lando. Sed maro ĉi tie sinonimas al plaĝoj. Ili etendiĝas centojn da kilometroj, blanksablaj, ĉe

ambaŭ marbordoj kaj ricevas en ĉiu sezono svarmojn de en- kaj eksterlandanoj. Pleje elstaras inter la plaĝoj la mondkonata Varadero, pro siaj fajnegaj sablo, malprofunda kaj travidebla lazura akvo, kie de tempo al tempo petole preternaĝos vinaroj de gem-similaj fiŝetoj, kaj ankaŭ pro la komfortaj hoteloj, moteloj kaj vilaoj... Kaj krom Varadero? Ni menciuj nur Cayo Largo, Cayo Levisa, Santa María del Mar, Santa Lucía, Guardalavaca, El Ancón, Playa Colorada kaj multajn aliajn, speciale Playa Girón, historiplenan regionon apud Marĉo Zapata, lokon de la 46-a IJK.



*La plaĝo
Varadero.*

Kaj krom plaĝoj? Alian nepran allogon vi trovos en Havano, Trinidad, Camagüey, Santiago de Cuba, vide al multnombraj arkitekturaj juveloj, rakontantaj pri la gloro kaj oro de la tempoj de hispana kolonio. Bone konservitaj aŭ lerte riparitaj, foje ili tiel impresos vin, ke vi kredos vojaĝi en la pasinteco.

Vizitindas ankaŭ diversaj banlokoj de varmaj kaj kuracaj akvoj, kaj ripozejoj sur la relative malaltaj montaroj. Inter tiuj troviĝas la internacia Esperanto-centro Hanabanilla, apud la samnoma diglago en la montaro Escambray: paradiza loko, kie ILEI okazigos sian konferencon.

Kaj jen Havano, dumiliona ĉefurbo, kultura kaj politika centro de la lando. Krom la jam menciita historia kvartalo gravas ankaŭ la moderna arkitekturo, kiu inkluzivas la luksajn ĉefurbajn hotelojn gastigontajn plejparton de la kongresanaro, la faman kabaredon Tropicana, kie la kontaĝa ritmo de la kuba folkloro dancigos vin

ĝis noktomezo, aliajn amuzejojn, teatrojn, kinejojn kaj kial ne, la imponan kongresejon, kie la reprezentantoj de la tutmonda Esperanto-parolantaro esploros kaj mem spertos la realajn eblecojn ekstereŭropigi la Internacian Lingvon.

Ŝlosiloj de la kuba miraklo

Ĉar ne malpli frappe ol la turismaĵoj efikos la nacia Esperanto-movado kaj ĝenerale la kuba socikultura disvolvo. La invitanta landa asocio, Kuba Esperanto-Asocio, nur dekjaras! Estus interese por movadologoj kaj esperantologoj malkovri la ŝlosilojn de la kuba

miraklo: kiel estigi movadon kapablan organizi Universalan Kongreson nur dek jarojn post sia formiĝo? Bonvolu ne forgesi enketi pri la relative tre alta eduka kaj kultura nivelo de popolo sen analfabetoj, pri la dissemado de solidareca kaj pacama spirito, celanta integriĝon kontinentan kaj pli larĝe triamandan, pri la defio al altrudita izoligo kaj la serĉo de vojoj por sentigi Kubon en la internacia komunumo, kaj pri aliaj gravaj faktoroj, kiuj kondiĉas la "verdan eksplodon" ĉi tiean.

Sed ne lasu min rakonti plu, konstatu propraokule, ke ĉi tie ne temas pri blaga propagando. Eble mi tro emfazis la turisman flankon de la kongresvojaĝo, sed vere mi imagas ĝin decidiga faktoro. Ni certas, ke reveninte en viaj landoj vi fariĝos favoraj publicistoj pri Kubo, pri ĝiaj vidindaĵoj kaj pri la atingoj kaj mankoj de tiu ĉi internaciema kaj gastama popolo: kaj plue pri la disvolvo de la sudo.

Orlando Raola González

Kubanoj sin prezentas:

500 jaroj da miksetna kunvivado

La elŝipiĝo de Kristoforo Kolumbo en 1492 enkondukis unu el la unuaj kulturaj kolizioj inter la aŭtoktona loĝantaro de la Novaj Teroj kaj la eŭropanoj. La hispanoj starigis regon super la indiĝenoj, kiuj estis devigataj prilabori oran sablon, okupiĝi pri dommastra ekonomio de la hispanoj kaj plenumi aliajn, pli pezajn laborojn. Pro ekspluatado, malsato kaj malsanoj, al kiuj ĝi foje rezistis per amasa memmortigo, la indiana loĝantaro iom-post-iome malaperis. Ankoraŭ tamen troveblas ĝia influo en la kampara arkitekturo, kuiriloj kaj kutimoj de la kubanoj.

Intertempe komenciĝis alfluo de afrikanoj. Oni instigis la negrajn virojn edziĝi nur kun negrinoj, kaj kaze de seksa rilato kun indiana virino ili estis kruele punitaj. Tamen aperis tre baldaŭ idoj de miksrasaj geedziĝoj. Tiujn entenantajn miksaĵon de negra sango oni nomis mulatoj. Same kiel ili, ankaŭ la gefiloj de blankuloj kaj indianinoj rajtis nek loĝi inter la indianoj nek labori kiel notarioj.

Komence de la 17-a jarcento la kuba loĝantaro kreskis ĝis 20 000 personoj, el kiuj duono loĝis en Havano – jam la ĉefurbo kaj centro de la naskiĝanta sukerindustrio. La tiama episkopo informis la hispanan reĝon, ke laŭ lia takso la indianoj kaj mestizoj estas komplete asimilitaj de la hispana loĝantaro. Tiel profunde progresis la miksiĝo! La landanoj komencis nomi sin “kreolaj”, estante ĉu negroj, ĉu mulatoj, ĉu blankuloj: kio indikas la estiĝon de unueco-sento en la tiamaj insulaj loĝantoj.

Fine de la 18-a jarcento la loĝantaro fariĝis 273-mila. Ankoraŭ regis la hispana kulturo, sed la afrik-devenaj kubanoj, spertinte tiun kulturan asimiliĝon, neniel rifuzis siajn proprajn kulturajn tradiciojn. En la kuba karaktero formiĝis relative stabilaj kulturaj kaj psikaj trajtoj, naskitaj de 300 jaroj da kunvivado. Dum la dudekaj jaroj de la 19-a jarcento estiĝis la politika kuba elmigrantaro, kies elstaraj reprezentantoj esprimis la evoluantan nacian memkonscion.

En la jaro 1886 estis abolita la sklaveco en Kubo. Salajrata laboro anstataŭis la sklavan laboron, dum diversaj militoj (1868-78, 1895-99, 1906 kaj poste) markis krizan periodon en la politika formiĝo de la

lando. La dudeka jarcento kunportis plurajn periodojn de pseŭdorepublika ŝtato, ĝis la triumfo de popola revolucio la 1-an de januaro 1959. Tiu ĉi iom post iom restrukturis la landon kaj strebas evoluigi ĝin spite al ĉiuj specaj malfacilaĵoj.

La etnaj trajtoj, kiuj diferencigas la kubanojn, reliefiĝas en ties materia kaj spirita kulturo. Kelkaj manifestaĵoj de tradiciaj moroj restas ne tiom evidantaj: ekzemple, oni ne plu konstruas palmdomojn sur niaj kampaj ebenaĵoj. Jam en la pasinta jarcento estiĝis nacia kostumo, kies ĉefa peco estas la “güajabero”, eleganta ĉemizo havanta plurajn butonojn, poŝojn kaj vertikalajn faldaĵojn. Nuntempe ĝi estas la vira vestaĵo uzata por festoj kaj solenaĵoj. En oficiala medio ĝi anstataŭas jakon.

La kubanoj, nun ĉirkaŭ 11 milionoj, kondutas tre singardeme, ĝentile kaj pacience. Ĉiam ili pretas doni infor-

mojn al turistoj kaj samideanoj: neniuj devas timi perdiĝon en la antikvaj stratoj de la Malnova Urbo aŭ la svarmanta urbocentro! Ili tre aprezas bonhumoron; sed trajto nedisigebla de ilia karaktero estas muzikeco enradikiĝinta en la kamparaj kaj urbaj loĝantoj.

La hispana lingvo parolata en Kubo posedas preskaŭ ĉiujn deflankiĝojn de la hispana normo, simile al ĉiuj latin-amerikaj landoj, sed samtempe ĝi posedas specifan leksikan riĉecon kaj originalan melodion. Oni konsideras normo la parolmanieron de la havanaj loĝantoj. En la orientaj provincoj oni parolas pli malrapide kaj klare ol en la okcidenta regiono. Kubismoj forpasas tiel rapide, kiel ili estiĝas. En la ĉiutaga parolado oni uzas tre ofte lokajn vortojn, kies signifo kaj derivaĵoj akiras figuran sencon. La kubanoj parolgestas laŭ tre esprimpova maniero kaj emas al amuzaj proverboj kaj kromnomoj.

Kongresi en Kubo estos unika ŝanco konatiĝi kun kubanoj. Ankaŭ ni sopiras je vi!

Maritza Gutiérrez

Zamenhof pri Kubo

Ĉi tie mi nur supraĵe ekparolos pri la longa kaj interesa historio de nia movado en Kubo. Tiu fakte ne komenciĝis nur kun la fonda de Kuba Esperanto-Asocio en 1979. En la novkolonia Respubliko Kubo dum la fruaj jardekoj de ĉi tiu jarcento neniam mankis iom da poresperanta agado kaj propagando. Ankaŭ ni konstatas kun admiro kiom da klopodoj kaj luktoj diversaj personoj efektivigis por diskonigi la internacian lingvon, kiel pioniroj de tiu kultura movado ligita al idealo paca kaj amikeca.

Sed kredeble la plej bona komenco de tiu historio konsistas en demando malofte aŭdita en niaj rondoj: Kiam unuafoje la insulo Kubo estas menciita en Esperanto?

La respondo troviĝas en klasika libro de la Esperanta literaturo, nome la *Fundamenta krestomatio*. La tekstoj en tiu libro konsistas grandparte el artikoloj publikigitaj en la unua gazeto en nia lingvo. Ekde septembro 1889 aperadis *La Esperantisto*, kaj la redaktolaboron faris d-ro Zamenhof mem, tasko prefere plenumata kun cigaredoj ĉemane. Koincide kun tiu laboro okazis la 400-a datreveno de la renkonto kun Ameriko en 1492. Tiu aktualaĵo instigis nian iniciatinton verki artikolon pri “Jubileo de tabako”. Legante ĝin ni kubanoj memoras nian infanaĝon en elementa lernejo, ĉar simile al kubaj instruistinoj Zamenhof priskribas la renkontiĝon de Kolumbo kun ĉi tiu insulo per jenaj vortoj:

“La glora maristo alvenis kun sia ŝiparo al la bordoj de Kubo. La Hindoj, ekvidinte de malproksime blankajn homojn, forkuris. Tiam Kolumbo

Ĉu vi vojaĝis ĉine?

Se ne, aŭ se vi sopiras reiri, rigardu la dorsan kovrilon!



sendis post ili du ŝipanojn, kiuj, veninte en la hindan vilaĝon, ekvidis multajn hindojn, kiuj tenis en la buŝo iajn torditajn kaj ekbruligitajn foliojn, kies fumon ili elspiradis. En tia maniero estas eltrovita la tabako, kiu de tiu tempo ricevis multajn amikojn kaj kontraŭulojn.”

Kaj niaflanke jen nepra komentario. Kolumbo kaj Zamenhof faris la saman eraron: ili ambaŭ utiligis la vorton “hindo” kiel nomon por tiuj praloĝantoj de Kubo. Kolumbo iusence pravis, laŭ sia vidpunkto de maristo: lia plano estis trovi Hindion per konstanta navigado okcidenten. Tial li pensis kaj parolis pri “hindo”. Bedaŭrinde la malĝusta vorto uzita de Kolumbo restis kiel heredaĵo por postaj generacioj. Tiu termino “hindo” estas plu uzata en pluraj lingvoj por aludi homon de la brunhaŭtaj gentoj en la Nova Mondo. Eĉ la iniciatinto de nia lingvo daŭrigis la saman konfuzon okaze de siaj provoj krei originalan literaturon. Tamen pro lingva evoluo aperis poste anstataŭa termino, t.e. “indiano”.

Tiel la unua mencio pri la insulo Kubo en Esperanto aperis en la januara numero 1893 de la gazeto *La Esperantisto*, okaze de la 400-a jubileo de la eltrovo de Ameriko kaj samtempe de tabako.

Raúl Juárez Sedeño

Karnavalumi kun la “kuba sono”

“La popolmuziko ne estas nur teksaĵo de artaj sonoj; ĝi estas io portanta en siaj kadencoj kaj ritmoj la neforgeblan kanzonon per kiu nia sankta patrino susuris nin ĉe la lulilo inter kisoj kaj karesoj... ĉar ĝi estas pli ol arta voĉo, estas voĉo de tuta popolo, la komuna animo de l’ generacioj.”

– Fernando Ortiz

La tradicia kuba muziko estas tro vasta temo por resumi ĝin per nur kelkaj linioj. Tamen mi klopodos supraĵe pritrakti la plej elstaran ĝenron: la tiel nomatan “son’ kubano”, kiu originis en la kamparo fine de la 19-a jarcento. Komence oni ĝin ludis per gitaro de tri kordoj, “bongoo” – instrumento konsistanta el du tamburoj fiksitaj per lignopeco, marimbo por la basa akompano, kaj “lignokleoj”, kiuj konsistas el du cilindraj lignopecoj iom longaj, kiujn oni batas unu kontraŭ la alian por certigi la ritman ekvilibron. Poste oni enkondukis plian gitaron kaj paron de marakoj.

“La son’” iom post iom integriĝis en la repertuaro de ĉiuj muzikaj ensembloj kaj multe influis la kuban ritmon. Fakte ĝi fariĝis absoluta reĝo inter ĉiuj ĝenroj poste disvolviĝintaj en la kuba muziko.

Inter la tradiciaj ritmoj, formantaj buntan mozaikon, estas ekzemple “la danzono”, “ĉa-ĉa-ĉa”, “bolero” kaj “mambo”. Ĉiuj estiĝis en diversaj etapoj dum ĉi tiu jarcento, kiel variantoj de “la son’” kun sendependa personeco, escepte de “la danzono”. Elstaraj interpretistoj de la diversaj ritmoj prezentigas en kulturaj eventoj tra la jaro, inkluzive la naciajn festivalojn de “bolero”, “ĉa-ĉa-ĉa” kaj “son’”. Kvankam ja aliaj influoj eniras nuntempe la muzikan universon de nia kariba insulo, tamen “la son’” neniam perdis aktualecon. Eĉ oni disvastigas ĝin en diversaj landoj ĉi-kontinente sub la nomo “salso”, kiu estas esence nia sama “son’”.

Julio estas festa monato en Kubo, kiam okazas la karnavaloj en Havano, kiel poste en la dua grava urbo Santiago de Kubo en aŭgusto. Eksterlandaj esperantistoj neniel enuos dum tiuj tagoj en Havano, ĉar krom partopreni la kongresajn aranĝojn pri la kuba kulturo, ili povos karnavalumi tra la marbordaj havanaj stratoj dum noktoj stelplenaj, homvarmaj kaj ritmotropikaj. Kial ne veni al Kubo por danci en bela somera nokto laŭ la ritmo de “la son’ kubano”?

mg

Kulturo:

José Martí, poeto kun popolo

“La lando de José Martí”: prave oni povas tiel nomi Kubon. Ĉi tie oni nomas lin majstro, apostolo de la sendependeco, nacia heroo. Ekde la infanaĝo kubanoj lernas lian biografion, deklamas liajn versojn, legas liajn rakontojn, ĉar li ne nur batalis ĝismorte por sia patrio, sed ja en la poezio pioniris la modernismon, tradukis brile kaj sukcese la verkojn de Victor Hugo, Lordo Byron, Thomas Moore, Helen Hunt Jackson, faris elstaran ĵurnalismon kiu influis tutan kontinenton, estis kritikisto pri arto, regis kelkajn lingvojn eĉ verkante en ili, reprezentis diplomate Urugvajon, Argentinon kaj Paragvajon, kaj plu senfine.

*pensvidu flornaskiĝojn
inter la dornaj formoj.*


Pro la klopodoj de la mastro de la ŝtonminejo li ne elsuferis la tutan puntempon en ĝi, kaj post kelktempa restado sur la Insulo de la Junularo oni ekzilis lin al Hispanio. Tie li finis siajn studojn kaj verkis siajn unuajn broŝurojn politikajn. Poste li reiris al Ameriko, kaj la kulturen kaj politikan etoson de ties landoj, kiuj lasis en li gravajn spurojn, li reciproke stampis per sia personeco. Li fine iris loĝi en Usono, kaj ne troas aserti, ke de tie per siaj ĵurnalaj artikoloj li influis ĉiujn tiuepokajn talentulojn de Latina Ameriko. Krome li publikigis siajn famajn poemarojn *Ismaelillo*, *Simplaj versoj* kaj *Liberaj versoj*, kaj redaktis la revuon *La ora aĝo* por amerikaj infanoj.

En lia multflanka personeco plej elstaras lia patriotisma doktrino kaj lia poeziemo. Lia patriotismo entute ne diverĝas de la esperantista ekde

estas la vere nevenkebla koncepto pri patrujo.... La patrujo estas homaro, tiu parto de la homaro, kiun ni vidas de plej proksime kaj en kiu ni naskiĝis; nek oni devas permesi, ke per tiu trompo pri sankta nomo oni defendu neutilajn monarkiojn, dikventrajn religiojn aŭ senhontajn kaj malsataĉajn politikojn, nek, ĉar ĉi tiujn pekojn oni ofte nomas per la nomo Patrujo, la homo devas rifuzi plenumi sian homan devon en la parto plej proksima.”

Martí transpasis sian epokon per la heredigo de sia doktrino latin-amerikisma. Cent jarojn post lia naskiĝo generacio de kubanoj sin nomis “la generacio de la centjariĝo” kaj batalis lianome kontraŭ la tirano Batista, perdante pli ol 20 000 viktimojn survoje. Longe poste, la usona kantisto Pete Seeger elplukis el liaj *Simplaj versoj* strofojn kaj famigis tutmonde la kanton “Guantanamo”. Lia duobla identeco, kiel patrioto kaj poeto, troviĝas jam en ties unua strofo:

*De malliberulo ĝis nacia heroo:
la vivo de José Martí inspiris la
sendependigajn strebojn en pluraj
latinamerikaj landoj.*



Kiam eksplodis la unua milito por la sendependeco de la insularo en 1868 li aĝis nur 15 jarojn. Sub la preteksto de skribita letero, sed precipe pro lia patriotisma sento oni kondamnis lin al trudlaboro, kiu malsanigis lin por ĉiam. Sur foto el tiu periodo, simila al la apuda, li skribis dediĉe al sia patrino:

*Rigardu min, patrino,
kaj do ne ploru ame:
Se sklave de l' doktrino
reganta ĉi-tiame
vian martiran koron
plenigis mi per dornoj,*

Zamenhof, ĉar Martí, predikante “militon sen malamo” kontraŭ la koloniismaj registaroj kaj celante respublikon “kun ĉiuj kaj por la bono de ĉiuj”, klarigis sian koncepton ankaŭ jene:

“Ĉiu devas meti sin al la kreado de la mondo en tio plej proksima, ne ĉar la propra estas, ĉar propra, supera al tio fremda, pli fajna aŭ virta, sed ja ĉar la influo de la homo efikas pli bone kaj pli nature sur tion konatan, el kiu senpere venas la sufero aŭ la plaĉo: tia distribuo de la homa laboro kaj ne alio

*De kie kreskas la palmoj
mi venas, homo sincera,
por kanti simplajn kor-kantojn
al nia mondo mizera.*

Kiam vi venos al Kubo vi havos la ŝancon ekkoni lin pli. Lia monumento la plej grava troviĝas en la fama Placo de la Revolucio en Havano. Proksime de la fervojstacio staras kiel muzeo la humila domo en kiu li naskiĝis. Via rendevuo julia estos kun tiu, kiu diris “La patrujo estas homaro”, kaj kun ĝuste lia homar-parto.

Arnoldo Aguila

Insulo de la Junularo:

Edukejo de Kubo kaj la mondo

Sude de Kubo situas insulo, kies areo estas ĉ. 2 331 kvadrataj kilometroj, nomita hispanlingve unue “La Evangelita”, sekve “Reina Amalia”, “Isla de Pinos” kaj nun “Isla de la Juventad” aŭ Junulara Insulo.

Dum jarcentoj ĝi servis kiel rifuĝejo de korsaroj kaj piratoj, kaj tial oni nomis ĝin “Insulo de la Trezoro”. Poste ĝi fariĝis ekzilejo – unue por ordinaj malliberuloj, kaj sekve por patriotoj kiel José Martí, kiuj batalis por la kuba sendependeco. Dum la Novkolonia Respubliko oni konstruis sur ĝi la t.n. “Modelan Prizonon”, grandega konstruaĵo por loĝigi 5 000 punatojn. La batalantoj kontraŭ Batista sub la gvido de Fidel Castro ankaŭ “gastis” en tiu malliberejo.

Post la revolucia venko, en 1959, komenciĝis transformo de la insulo. Ĝia loĝantaro kreskis de 11 000 ĝis 70 000, samtempe oni konstruis kaj pligrandigis diversajn industriojn (unuavice la marmorminadon kaj la ceramikon) kaj plivastigis la citrus-arbejojn. Tamen plej mirinda estis la eduka disvolviĝo, kiu donis al la insulo ĝian nunan nomon. Preskaŭ 50 000 gejunuloj studas tie, el kiuj duono venis el 37 landoj de Afriko, Azio kaj Latinameriko. Tiu ĉi solidara laboro rezultigas la konstantan pliklerigadon de, ekzemple, miloj da afrikanoj (3 500 el Angolo, 2 200 el Mozambiko k.s.), kiuj revenas kun tiuj konoj por rekonstrui siajn landojn sangantajn pro la militoj kaj la koloniismo. Antaŭnelonge reiris hejmen aro da junaj namibianoj, por partopreni en la unua balotado kondukanta ilin al sendependeco.

La lernejoj por eksterlandaj studentoj evoluis i.a. el la nacia sperto pri forigo de la nelegipovo en Kubo. Kvankam la lando mem ne disponas pri grandaj financaj rimedoj, ĝi sukcesis krei la plej edukitan popolon en Latinameriko. (Ne senkaŭze la TEJO-kongreso elektis por si la temon “alfabetigo”!) La studentoj sur la Junulara Insulo cetere ne nur studas, sed ankaŭ laboras – kiel okazas en ĉiuj lernejoj tra Kubo. Alveninte 12- aŭ 13-jaraj, ili pasigas ĝis kvin jarojn en tre intensa kursaro: unue pri la hispana, poste pri aliaj studobjektoj precipe en la hispana sed pri historio

kaj kulturo en sia propra lingvo. Tri horojn tage ili laboras sur la kampoj aŭ pri la citruskultivo. La san- kaj instru-niveleoj estas ĝenerale tre altaj, kaj kiel forta motiva faktoro efikas la konscio de la studentoj, kian privilegion ili ĝuas kompare kun la plimulto de siaj samlandanoj. Krom en la gimnazioj, troviĝas eksterlandaj studentoj ankaŭ en la politeknikoj, universitatoj kaj trejnejoj por instruistoj.

La insulo plu disvolvas la turismon, ĉar kiel forĝejon de la junaj generacioj en Azio, Afriko kaj Latinameriko ĝin inspektas ĉiuj vizitantaj registroj el tiuj

landoj, kaj ankaŭ multaj turistoj deziras vidi propraokule tiun grandegan metiejon de solidareco kaj frateco. Mi ankaŭ rekomendas ĝin al la atento de la esperantistoj. Ĉu tiu insulo ne estus ideala loko, kie akiri por la Esperanto-movado la afrikan kontinenton? Kaj ĉu ne eblos daŭrigi la vojon komencitan ĉe la ILEI-konferenco en E-centro “Hanabanilla” per io farota en tiu Junulara Insulo?

José René Fernández
kun aldonaj informoj de mf

La iama loĝejo de José Martí sur la Junulara Insulo estas nun muzeo.



Kongresa temo:

Pri kultura evoluo – Havane kaj Uneske

“En 1990, kiam ni kongresas unuafoje en Kubo, taŭge ni pritraktos la temon de kultura diverseco kaj ekonomia evoluo.... Nia intenco estas uzi tiun ĉi okazon por vere pligrandigi nian konon de la procezo de ekonomia evoluo en nia hodiaŭa ŝanĝiĝanta mondo, pere de laborgrupoj kun difinitaj celoj, kiuj utiligos la sperton de nia membraro kaj de la komunumo en Havano.

“Ni konsideros la temon de kultura diverseco duflanke: kun specifa aludo al la landoj kaj kulturoj de t.n. Latinameriko, kaj kun rigardo al la aliaj kontinentoj, inkluzive Orientan kaj Okcidentan Eŭropon.... Certe ni multon lernos pri la interesejaj kulturoj de la indiĝenaj popoloj de Latinameriko, de la amazona ĝangalo ĝis la aztekoj kaj majaoj de Meksikio. Ni ankaŭ parolos pri la rezultoj de la

diversaj evoluplanoj de la regiono, kaj klopodos kompreni la multajn politikajn kaj ekonomiajn kialojn de difinitaj alternativoj. Sur tiu ĉi bazo, ni demandas kio estas kaj kio devus esti la rolo de Esperanto en la ŝirmo de la minoritataj kulturoj, kaj eĉ demandas nin, ĉu nia movado faras sian eblon por plenumi tiun ĉi tre zamenhofan celon.”

Tiel Jane Edwards enkondukas la temon de la 75-a UK: “Esperanto, evoluo, kultura diverseco”, komence de la Dua Kongresa Bulteno. En Havano okazos la tria evolulanda UK de la jardeko 1981-1990, kaj kiel UEA-prezidanto John Wells jam atentigis en sia novjara mesaĝo, ĝi signas interalie la kreskantan tutmondiĝon de Esperanto. En mondo kie tri kvaronoj de la loĝantaro vivas en malriĉeco, ĉiam pli premataj de la komerca kaj

kultura dinamismo de la riĉaj landoj, tia temo kaj tia loko akiris centran signifon. Ne nur por la movado, cetere. La Monda Jardeko de Kultura Evoluo, proklamita de Unesko kaj UN por 1988-1997, direktas atenton ĝuste al tiuj demandoj, pri kiuj okupiĝos la kongreso en Havano.


La celo de la Jardeko estas altigi konscion pri la fundamenta rolo de kulturo en la homa kaj socia vivo, kaj pri la rilatoj – pozitivaj kaj negativaj – inter kulturo kaj evoluo. Laŭ priskribo de la ĝenerala direktoro de Unesko, Federico Major: “El interdependeco nedubeble fontas reciproka riĉiĝo, sentemo, inciatemo kaj kreado, sed ĝi ankaŭ povas subfosi la kulturan identecon. Kvankam evoluo signifas ŝanĝon, ĝi devas ne damaĝi la plej integran memkomprenon de kulturoj kaj individuoj. Male ol obstakli la evoluon, la kulturo aktive kontribuas al ĝi, kontraŭante per sia senlima vario la tendencon al unuformigo.”

En siaj programoj por stimuli evoluon kaj kulturan diversecon, Unesko identigis kelkajn prioritatojn: la legipovo-kampanjon, pri kiu ni jam skribis ĉi-revue; la provizadon de scienca kaj teknika scio al la evolu-landoj, kaj ĝian aplikon al la protekto de ilia natura kaj kultura heredaĵoj; la stimolon de interkulturaj kontaktoj, kaj la kolektadon kaj interŝanĝon de kultura scio.

Unesko ankaŭ patronas kelkajn grandajn projektojn lige kun la Jardeko. Inter tiuj troviĝas unu tre proksime ligita kun Kubo: la solenado de la 500-a datreveno de la renkontiĝo inter Eŭropo kaj Ameriko. Antaŭ nelonge Unesko lanĉis tiun programon, kaj apude ni redonas la alvokon de ĝia ĝenerala direktoro. Eble la fina aludo al “havenoj” memorigos kelkajn pri la metaforo de Probal Daŝgupto: ĉu ni konceptu Esperanton kiel tian havenon, kie la kulturoj trankvile renkontiĝas? Havano nepre kontribuos al evoluigo de tiu ideo.

Rekone al la profunda paraleleco inter la temo kaj celoj de la Jardeko kaj tiuj de la Esperanto-movado, la nova estraro de UEA antaŭnelonge nomis apartan komisiiton por ĝi, sinon Elisabeth Schwarzer (FRG). En multaj rilatoj la kongreso en Kubo signalos la lanĉon de nia partopreno. Se la malfermiĝo de UEA kaj la movado al la evoluanta mondo daŭre progresos kiel en la pasinta jardeko, la Jardeko estos vere jardeko ankaŭ de Esperanto!

mf



La alteriĝo de Kolumbo inspiris eŭropajn artistojn tra kvin jarcentoj.

La renkontiĝo inter du mondoj

La 12-an de oktobro 1492 tri hispanaj karaveloj: la “Santa Maria”, la “Pinta” kaj la “Niña”, sub la gvido de Kristoforo Kolumbo, malkovris kariban insuleton. La navigistoj, ekserĉintaj la okcidentan marvojon ĝis Hindio kaj Ĉinio, senvole eltrovis la vojon ĝis Ameriko.

Tiu evento lanĉis novan aventuron en la homa historio. Albordiĝante, la ŝipoj de Kristoforo Kolumbo finkonstruis la unuan ponton inter du hemisferoj. Naskiĝis pri la mondo nova bildo ĉiam pli klare formiĝonta, bildo pri mondo samtempe unueca kaj multeca. Komenciĝis procezo, kiu ebligis al ĉiuj popoloj malkovradi unu la alian, fari interŝanĝon kaj intermiksiĝi.

Kiel firma ankro por la renkontiĝo de kulturoj kaj grava fokuso por la kunlaboro inter popoloj, Unesko esperas ke la 500-a datreveno de tiu sortoporta malkovro estos okazo por atingi pli bonan komprenon de la radikalaj ŝanĝoj kiujn ĝi venigis al la tuta homaro. Ĝi esperas precipe, ke tiu datreveno estos okazo por forĝi novajn ligojn de solidareco inter ĉiuj popoloj kaj kulturoj de la mondo.

Akorde kun la principoj entenataj en la Statuto de Unesko, konforme kun la celoj de la Monda Jardeko por Kultura Evoluo kaj surbaze de decido de sia Estraro, la Organizo direktos sian kunsolenadon de la renkontiĝo inter du mondoj al la stimulado de

interŝanĝoj kaj interkulturaj kontaktoj, bazitaj sur la elmontrado de popola kultura identeco.

Tiu iniciato jam vekis grandan intereson; dum proksimiĝas 1992, al Unesko venas ĉiam pli da projektproponoj.

Pro tio mi lanĉas solenan alvokon al la internacia komunumo, invitante Ŝtatojn-Membrojn, interregistarajn organizaĵojn, neregistarajn organizaĵojn, oficialajn kaj privatajn instituciojn kaj ĉiujn, kiuj volas stimuli la rilatojn kaj interŝanĝojn inter popoloj, aliĝi al Unesko por helpi al la atingo de la tri celoj, kiujn ĝi fiksas por si okaze de tiu datreveno: prilumi la profundajn ŝanĝojn, kiujn tra la globo enkondukis la epoko de malkovrado; kunmeti atestojn pri la indiĝenaj kulturoj de Ameriko; kaj firmigi kaj konservi la kulturan heredaĵon de la Nova Mondo.

Estas mia espero ke, per viaj malavaraj kontribuoj, Unesko povos realigi nian komunan celon: partoprenigi la tutan mondon en la solenado de evento laŭrezulte kaj laŭsignife universala, kiu por ĉiam aliigis nian komunan sorton. Mi esperas ke la jaro 1992 tiumaniere malfermos al la popoloj de la mondo novajn vojojn kaj novajn havenojn de ŝirmo kaj trankvilo.

Federico Major
Ĝenerala Direktoro de Unesko

Kongresa Komunikado



75-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Havano (Kubo), 14-21 julio 1990

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Adreso de LKK: Kuba Esperanto-Asocio, Apartado postal 2018, 10200 La Habana 2, Kubo

Aliĝoj: Ĝis la fino de februaro aliĝis pli ol 1100 kongresanoj, el kiuj ĉ. ducent kubanoj. Estas anoncitaj pluraj grandaj grupoj el Japanio kaj Koreujo, kaj ankaŭ el Pollando, Bulgario kaj Hungario (ankoraŭ ne aliĝintaj). La intereso pri la kongreso daŭre kreskas. Estas aparte notinde, ke aliĝis pluraj dekoj da brazilaj kaj meksikaj esperantistoj.

Dua Bulteno: Tiu ĉi longe atendita praktika gvidilo al la kongreso fine aperis kaj dissendiĝis al la aliĝintoj meze de februaro. En ĝi troviĝas multaj utilaj informoj kaj bazaj sciigoj pri loĝado kaj ekskursoj (inkluzive de la mendiloj).

Loĝado: Prezoj por la loĝado ĉi-jare estas vere malaltaj. La plej multekosta aranĝo en unulita ĉambro kostas nur 90,00 gld. kaj loko en komforta studenta domo nur 35,00 gld. tage. Ĉiuj prezoj inkluzivas abundan manĝon kaj ĉiutagan transporton al la kongresejo kaj reen, same kiel transporton inter la flughaveno kaj la loĝejo. La samo validas ankaŭ por la amasloĝejo, kiu kostas 25 gld. tage.

Ekskursoj: Estas malfacile elekti inter ses allogaj tuttagaj ekskursoj, kiuj gvidas jen al kristalaj akvofaloj aŭ farmo de orkideoj, jen al tipa kamparana festo, rekonstruita antaŭkolumba indiana vilaĝo, sunplenaj plaĝoj de Varadero aŭ – plej ekskluzive – al la unikaj vidaĵoj de la Longa Insulo (Cayo Largo), atingota aviadile post nelonga flugo. Ne mankos ankaŭ ĉiutagaj kelkhoraj ekskursoj al cigarfabriko, kamparana komunumo, fiŝkaptado surŝipe, promeno tra la ĉefurbo aŭ simpla banado kaj sunumado ĉe la proksimaj strandoj. Kubo estas ankaŭ patrujo de pluraj famaj kokteloj, kion eblos sperti dum la allogaj vesperaj ekskursoj.

Flugoj: Kun la Dua Bulteno dissendiĝis aparta mendilo pri pli ol 10 flugvojaĝoj el diversaj eŭropaj urboj al Havano. La prezoj de revenbileto varias inter 1500 kaj iom pli ol 2000

gld. Ekzistas eblo, ke UEA ofertas baldaŭ pliajn flugaranĝojn por la 75-a UK kaj la ĉirkaŭaj aranĝoj en Kubo kaj Meksikio. Se vi interesiĝas, petu ekzempleron de "Flugfolio" de la CO de UEA.

Honora Komitato: HK de la 75-a UK nun havas ĉ. 30 membrojn, elektitajn inter eminentuloj de ĉiuj tavoloj de la kuba socio. La prezidanto de la HK estas d-ro Armando Hart Dávalos, Ministro pri Kulturo. Unu el la lastaj akceptintoj estas Alberto Juantorena, mondfama atleto.

Programo: La ĉefa atento estos dediĉita al la kongresa temo "Esperanto, evoluo, kultura diverseco", kies pri-trakton kunordigas d-rino Jane Edwards, el Usono. Krom diskutoj en la pleno, oni antaŭvidas laborgrupojn pri la subtemoj kaj dulingvan simpozion pri la evoluo en la latinamerika kunteksto. Ankaŭ pluraj fakaj asocioj (pli ol tridek jam mendis kunvenojn!)

(IKU). Kompreneble, ne mankos riĉaj kultura kaj amuza programoj, ĉi-foje kun specife latin-amerikaj kaj kubaj koloroj.

Radio-amatoroj: La Asocio de Radio-Amatoroj de Kubo organizos specialan internacian konkurson omaĝe al la 75-a UK. La konkurso komenciĝos dimanĉon, la 15-an de julio.

Kotizoj: Ekde aprilo validas la sekvaj kotizoj (en gld.): individua membro (IM) de UEA, 270 gld.; ne-individua membro de UEA, 315; kunulo/junulo/handikapulo IM de UEA, 180; kunulo/junulo/handikapulo ne-IM de UEA, 225. Kotizoj por la landoj el grupo B estas duone rabatitaj.

Internacia Junulara Kongreso: La preparoj por la 46-a IJK, kun nova, freŝa kaj agema LKK, marŝas tre bone kaj promesas interesan programon, konstruitan ĉirkaŭ la kongresa temo "Alfabetigo". Tamen, kiel kutime,



La turisma centro Guamá, celo de kongresa tagekskurso, donas impreson pri la indiana vivo kaj kulturo.

traktos diversajn aspektojn de la kongresa temo. Kelkaj fakuloj prelegos ekster la kongresejo en la Universitato de Havano, ĉe kubaj fakaj asocioj k.s. pri diversaj temoj. Estos ankaŭ tre interesa programo de la 43-a sesio de Internacia Kongresa Universitato

restos sufiĉe da tempo por amuzo kaj ripozo (inkluzive de pluraj sport-ebloj) en la subtropika trankvilo de Playa Girón. Aliĝilo haveblas de la konstanta adreso; la plena kosto por tuta semajno estas inter 340 kaj 625 gld., depende de la aĝo kaj dato de aliĝo.



Esperantotur-direkcio, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando

Internacia Kultura kaj Kleriga Centro, Sobotské námestie, CS-05801 Poprad, Ĉeĥoslovakio

Espertur, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario; tel. (1) 156-0244; telekso 226490 "Műszaki Könyvkiadó/Espertur"

Esperanto-sekcio de Vojaĝoficejo Express, Pf. 567, H-1395 Budapest 62, Hungario; tel. (1) 132-3945 kaj (1) 131-7777/22; telekso 225384 turex h; telefakso (1) 153-1715

Kultura Centro Esperantista (KCE), Pf. 771, CH-2301 La-Chaux-de-Fonds, Svislando
Esperantoturist, str. Positano 40, BG-1000 Sofio, Bulgario; tel. (003592) 882472; telekso 23599 kabini bg.

tra la jaro

Konstanta Internacia Esperanto-Lernejo, Bidgoŝto, Pollando: 50-foje po unu semajno (Esperantotur, adreso supre)

Ĉebaltaj Esperanto-feriadoj: semajnaj restadoj dum la tuta jaro (Esperantotur, pl. Piastowski 4A, PL-85-067 Bydgoszcz)

Internaciaj Feriadoj kun Esperanto-kursoj, kuraĉloko Ciechocinek, Pollando: 6-foje po du semajnoj en majo, junio kaj septembro (Esperantotur, str. Szeroka 38, PL-87-100 Toruń)

Internaciaj Esperantistaj Kurac-Feriadoj, Krynica (Beskida montaro), Pollando: 4-foje po du semajnoj en majo kaj septembro (Esperantotur, Pk. 519, PL-30-960 Kraków 2)

Someraj Ĉebaltaj Esperanto-Feriadoj, Sopot, Pollando: 4-foje po du semajnoj en julio kaj aŭgusto (Esperantotur, p/a Danuta Krygier, str. plk. Dabka 54/2, PL-81-107 Gdynia)

Budapeŝtaj Restadoj, Hungario: kvintagaj programoj dum la tuta jaro, modifeblaj laŭbezono (E-sekcio de Express, adreso supre; peras ankaŭ restadojn en aliaj partoj de la lando)

Ferioj kaj konatiĝo kun kultur-historiaj vidindaĵoj, Bulgario: kiam ajn inter majo kaj oktobro (Koopturist, E-Fako, str. Rakovski 99, BG-1000 Sofia)

Esperanto-feriadoj ĉe Nigra Maro: du-semajnaj restadoj dum la tuta jaro (Koopturist, E-fako, str. Rakovski 99, BG-1000 Sofia)

Internaciaj Beneluksaj Renkontiĝoj: semajnaj vojaĝoj 20-foje dum la jaro (Esperantotur, Schotlandstr. 73, B-1060 Bruselo, Belgio)

Esperanto-staĝoj por komencantoj kaj progresantoj, KCE, Svislando: lasta plena semajno de ĉiu monato (mar. 19-24, apr. 23-28 ktp) kaj iam ajn dum la jaro, se alvenos minimume 5 aliĝoj (KCE, adreso supre)

Studaj semajnfinoj, KCE, Svislando: ĝenerale okazas post la Esperanto-staĝoj (KCE, adreso supre)

aprilo

06-08: Junulara Esperanto-Renkonto, Ungvár, Sovetunio (apud la hungara limo; Hungara E-Junularo, Pf. 193, H-1368 Budapest)

08-13: 6-a Internacia Simpozio "Eŭropa Esperanto-Turismo", Bruselo, Belgio (Monda Turismo, Schotlandstr. 73, B-1060 Bruselo)

08-15: Varsovia Esperanto-Printempo, Pollando (Esperantotur, str. Krucza 38/42, PL-00-512 Varsovio)

09-17: Amikeca Turismo (inkluzivas internacian kurson por komencantoj), Zagrebo, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, Pk. 499, YU-41000 Zagreb)

11-17: 14-a Internacia Junulara Festivalo, San Giovanni di Valle Aurina, Bolzano, Italio (Itala E-Junularo, via Villorresi 38, I-20143 Milano; temo "Ludoj")

11-20: Praktika formado de Esperanto-instruantoj kaj Internacia Renkonto de Infanoj, Grésillon, Francio (Esperanto-domo, Grésillon, F-49150 Baugé)

13-15: 85-a Skota Kongreso de Esperanto, Carberry Tower Conference Centre, apud Edinburgo (R. Calder, 92 Liberton Brae, Edinburgh, Britio EH16 6LB)

13-16: Sveda Esperanto-Kongreso, Karlskoga, Svedio (Sveda E-Federacio, Brunnsgratan 21, S-111 38 Stockholm)

13-16: Paska Junulara Renkontiĝo, Vierhouten, Nederlando (Lilian v.d. Burgt, Postbus 528, NL-6200 AM Maastricht; temo "Arto")

13-16: La montaro Ĵuraso ekprintempe, KCE, Svislando (KCE, adreso supre; tuttagaj ekskursoj sub la gvido de Claude Gacond)

13-20: 6-a Printempa Semajno Internacia (paska porfamilia aranĝo), montara vilaĝo Todtmoos, FR Germanio (Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-str. 2a, D-4418 Nordwalde; tel. 25 73 626)

14-17: 45-a SAT-Amikara Kongreso, Bondy (Parizo), Francio (SAT-Amikaro, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris)

16-21: Intensiva pretiĝo al trapaso de Esperanto-ekzamenoj, KCE, Svislando (KCE, adreso supre; instruos Claude Gacond, François Degoul kaj Stefan MacGill; fine de la kurso okazos sesio de la Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI)

18-22: 12-a TEJO-PSEK-Seminario, Zielona Góra, Pollando (Esperanto, Pk. 43, PL-65-958 Zielona Góra; temo "Aktivula trejnado")

22-22: SATEB-Jarkonferenco, Barlaston, Britio (SAT en Britio, 29 Farrance Road, Romford, Essex RM6 6EB)

24-28: Unuaj Kunsidoj de la Tutmondismo "La Iganta Mondo", Tours, Francio (Organiza Komitato, Pf. 0631, F-37006 Tours CEDEX; prelegoj kaj debatoj pri paco, evoluo, ekologio, demokratio)

27-04: Esperanta Semajno pri Sano kaj Resanigo, Lingfield, Britio (Martin Howard, Webbs Cottage, Woolpits Road, Great Saling, Braintree, Essex CM7 5DZ)

27-05: 18-a Scienca Interlingvistika Simpozio, Varsovio, Pollando (Akademia Centro Interlingvistika, Rada Naczelna ZSP, ul. Ordynacka 9, PL-00-950 Warszawa; temo "Lingvo-planado en teorio kaj praktiko")

27-05: Internacia faka seminario, Bad Saarow, Germana DR (GDREA, Otto-Nuschke-Str. 1, DDR-1080 Berlin; tel. 2 82 63 43; temo "Esperanto – objekto de akademia instruado kaj esploro")

27-06: 9-a Berlina Arbara Renkontiĝo, apud Bad Münden (Hanovro), FR Germanio (Michael Peters, Courbièrstr. 6, D-1000 Berlin 30; tel. 030-213 75 01)

28-01: Internacia Esperanto-Renkontiĝo "Maĥaĥkala 90", Dagestano, Sovetunio (T. Alijev, ab. ja. 074, SU-367012 Maĥaĥkala)

28-01: Kongreso de la Franca Katolika Esperanto-Asocio, Bouresse (Poitiers), Francio (J. Vincent, 26 bis Rue Milngavie, F-49150 Baugé)

29-01: Unuamaja Renkontiĝo de Jugoslavio Esperanto-Junularo, Ljubuski, Jugoslavio (URJEJ, str. D. Ozme 7/iv, YU-71000 Sarajevo)

majo

01-10, 11-20, 21-30: Feriadoj serve al via hobbio, IEK-Pisanica, Bulgario (Esperantoturist, adreso supre)

02-09: Soveti-Internacia Esperanto-Festivalo, Volĵskij, Sovetunio (EOLA 90, ab. ja. 73, SU-404130 Volĵskij 30, Volgogradskaja obl.; internaciaj muziko, teatro ks.)

03-06: 23-a Tutlanda Kunloĝado de Esperantistoj, Tokio, Japanio (NEO-Tokio, p/a Kawamoto Hiromi, 165 Tōkyō-to, Nakano-ku, Wakamiya 1-40-6, Yokoyama-sō; tel. 03-336-7765)

04-07: 74-a Brita Kongreso de Esperanto, Oksfordo, Britio (K.M. Hall, 37 Granville Court, Oksfordo OX3 0HS)

07-11: 13-a Internacia Turisma Renkontiĝo de Esperantistoj en Ercmontaro, Schwarzenberg, Germana DR (Esperanto, Karlsbader Str. 03, DDR-9430 Schwarzenberg)

11-13: Zamenhofa Internacia Pacmarŝo (ZIP), Zebegény, Hungario (Budapeŝta Komitato de HEA, Pf. 153, H-1443 Budapest)

11-13: 3-a Nacia Seminario de IEF, Tirrenia (Pisa), Italio (Pisa E-Grupo,


- via Oberdan 57, I-56100 Pisa; temo "Instruado de Esperanto: teknikoj kaj metodoj")
- 11-13: **35-a Kultura Semajnfino**, Kardinal-Wendel-Haus, Homburg/Saar, FR Germanio (Sarlanda E-Ligo, Querstr. 11, D-6607 Quierschied; temo "La vivo kaj verko de Zamenhof"/Ed Borsboom)
- 11-24: **Amikeca Turismo por Pliaĝuloj**, Zadar, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, Pk. 499, YU-41000 Zagreb)
- 12-18: **8-a Sesio de Internacia Printempa Esperanto-Universitato**, Veliko Târnovo, Bulgario (E-ista societo "Lumo", Pk. 121, BG-5000 Veliko Târnovo; temo "La kontribuo de la E-movado al la jardeko de kultura evoluo")
- 18-20: **29-a Hungarlanda Esperanto-Kongreso**, Budapeŝto, Hungario (Espertur, adreso supre; limdato 24 aprilo)
- 18-20: **Esperantaj Tagoj de Swidnica**, Pollando (Esperantotur, str. Sikorskiego 31, PL-58-105 Swidnica)
- 21-27: **13-a Ĉebalta Esperantista Printempo**, Łazy apud Koszalin, Pol-

- 25-27: **5-a Centra Renkontiĝo** (landa kongreso), Brandenburg, Germana DR (GDREA, Otto-Nuschke-Str. 1, DDR-1080 Berlin)
- 25-27: **10-a Internacia Deklamkonkurso de poezio de Ĥristo Botev en Esperanto**, Vraca, Bulgario (Esperanto, Pk. 66, BG-3000 Vraca)
- 31-10: **Vojaĝo tra la historiaj kaj renesancaj urbetoj de Bulgario** (Esperantoturist, adreso supre)

junio

- 01-04: **68-a Germana Esperanto-Kongreso**, Freiburg, FR Germanio (Konrad Gramelspacher, Rimsinger Str. 13, D-7812 Bad Krozingen 4)
- 01-05: **82-a Franca Kongreso de Esperanto**, kastelo de Blois, Francio (Roger Pons, 24 Mail Pierre Charlot, F-41000 Blois)
- 01-14: **Feriosemajnoj en Abel-Reglando**, Kamianna (Beskida montaro), Pollando (Esperantotur, str. Krucza 38/42, PL-00-512 Varsovio)
- 02-04: **Studa semajnfino pri arbaro** (en arbaro kun arbaristo), KCE, Svislando (KCE, adreso supre; gvidos Luigi Barbana, Italio)

- Instituto, 1 Hao 1 Duan Taisnahlu, Huangguqu, Shenyang; kursoj pri uŝuo kaj tajĝiĉuano)
- 06-12: **Kafoklaĉa Internacia Somera Tendaro (KISO)**, Marburg, FR Germanio (Gunter Neue, Wilhelmstr. 25, D-3550 Marburg)
- 08-10: **Kafejo Zagrebo** (urba aranĝo kie bonvenas eksterlandaj gastoj), Zagreb, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, Amruŝeva 5/1, Pf. 499, YU-41000 Zagreb)
- 11-15: **Internaciaj Esperanto-kursoj**, Nordia Popolaltlernejo, Kungälv, Svedio (Märta Andréasson, 2265 Tolsered, S-425 90 Hisings Kärä; limdato 30 aprilo; instruos Andrzej Pettyn, Pollando, Stefan MacGill, Hungario, kaj Spomenka Ŝtimec, Jugoslavio)
- 15-02: **Internacia Amika Renkonto**, Grésillon, Francio (Esperanto-domo, Grésillon, F-49150 Baugé)
- 18-06: **Somera Kursaro**, Ŝtata Universitato de Sanfrancisko, Usono (Cathy Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, CA 94010; kursoj je kvar niveloj; instruos Grant Goodall, Usono, Stefan MacGill, Hungario, kaj Jovan Zarković, Jugoslavio)
- 20-30: **Internacia Muzika Semajno** (inkl. Jubilean Feston de la Internacia Esperanto-Horo), IEK-Pisanica, Bulgario (Esperantoturist, adreso supre)
- 21-28: **Internacia Renkontiĝo por Memzorgantoj**, Baks (Szeged), Hungario (Ŝoma, H-6768 Baks; malmultekosta kampara/vilaĝa ekskursado, naĝado ktp)
- 22-24: **Sudeta Esperanto-Somero**, Wałbrzych, Pollando (Esperantotur, Pk. P-16, PL-50-952 Wrocław 17)
- 22-30: **3-a Internacia Esperantista Junulara Renkontiĝo**, Arĥangelsk, Sovetunio (Fondaĵo de Esperantistaj Junularaj Aranĝoj, pr. Kalinina 14, SU-103885 Moskvo; temo "Esperanto kaj la mondo"; rabato haveblas por evolulandaj partoprenantoj)
- 23-30: **Junpionira Esperanto-Somero**, Sarajevo-Stambulĉiĉ, Jugoslavio (JES, str. D. Ozme 7/iv, YU-71000 Sarajevo)
- 24-01: **Internacia Renkontiĝo "Blankaj Noktoj"**, Leningrad, Sovetunio (Esperanto, ul. Partizana Germana 15-1-98, SU-198329 Leningrad)
- 25-29: **Esperanto-semajno**, praarbaro Rautavaara, Finnlando (E-Asocio de Finnlando, Pengerkatu 18 A 86, SF-00500 Helsinki; prelegas i.a. Povilas Jegorovas, Litovio, kaj Zsuzsa Barcsay, Hungario)
- 25-30: **"La Infana Raso" de William Auld**, KCE, Svislando (KCE, adreso supre; gvidos István Ertl, Hungario)
- 28-03: **42-a Nacia Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio**, Ŝumen, Bulgario (Esperantoturist, adreso supre)
- 29-01: **26-a Landa Amika Renkonto**, Zalaegerszeg, Hungario (Fervojist



- lando (PEA-filio, Pk. 30, PL-75-950 Koszalin)
- 23-27: **Ĉielira Renkontiĝo**, Bakkum (Castricum), Nederlando (Willemien Dorleijn, Bolderikkamp 196, NL-2353 GZ Leiderdorp; kursoj, ekskursoj, tendumado)
- 24-27: **Junulara Semajnfina Turisma Renkontiĝo**, Prago, Ĉeĥoslovakio (Ĉeĥa E-Junularo, Jilská 10, CS-110 01 Praha 1)
- 24-27: **3-a Kultura Esperanto-Festivalo**, Västerås, Svedio (KEF3, Brunnsgatan 21, S-111 38 Stokholm; teatro, muziko, literaturo k.a.)
- 24-27: **1-a Kolonja Esperanto-Semajnfino/Preparseminario "Kubo"**, Köln, FR Germanio (Christian Nietzsche, Wehrstr. 69 C3, D-4200 Oberhausen)

- 02-04: **Printempa Esperantista Renkontiĝo sub Altaj Tatroj**, Poprad, Ĉeĥoslovakio (Slovakia E-Asocio, Sobotské námestie, CS-05801 Poprad)
- 02-08: **42-a IFEF-Kongreso**, Hamar, Norvegio (Karudveien 1, N-2340 Løten)
- 02-09: **2-a Dunivela Esperanto-seminario**, Wolfsburg, FR Germanio (HaJo Heilgeist, Bokemeyerstr. 3, D-3340 Wolfenbüttel; temo "De malpermesita lingvo al la lingvo por Eŭropo")
- 04-09: **5-a Seminario pri nomoj de sovaĝaj plantoj**, KCE, Svislando (KCE, adreso supre; gvidos Bernhard Eichkorn, FRG, kaj Ru Bossong, Nederlando)
- 05-20: **1-a Internacia Esperanta Kurso de Ĉina Luktarto**, Shenyang, Ĉinio (Zhao Xuegang, Shenyang-a Sporta

Sekcio de HEA, Pf. 7, H-1378
Budapest; limdato 31 majo)

- 29-06: **Internacia Esperanto-Semajno**, Nico, Francio (Groupe espérantiste de Nice, "Les Hortensias 2", 121B Bvd. Napoléon III, F-06200 Nice)
- 29-06: **26-a Somera Esperanto-Universitato**, Gyula, Hungario (48-as u. 11, H-5700 Gyula; limdato 31 majo)

julio

iam en julio: **Renkontiĝo de Montŝatantoj**, Moskvo/Kaukazio, Sovetunio (detalojn petu antaŭ 1 aprilo de E-klubo "Edelvejso", ul. 2-Siničkina 19, SU-111020 Moskvo)

Internacia Zbruĉ-renkonto, Zbruĉ, Ukrainio (UkrEA, ab. ja. 165, SU-252001 Kiev)

unua duono de julio: **1-a Internacia Tendaro Esperantista Maramika**, Maĥaĥkala (Dagestano, apud Kaspia Maro), Sovetunio (E-centro, ab. ja. 11, SU-367013 Maĥaĥkala 13)

dum julio kaj aŭgusto: **Somera Esperanto-Lernejo**, Poprad, Ĉeĥoslovakio: 4-foje po du semajnoj (IKKC-Poprad, adreso supre)

- 01-06: **23-a Somera Esperanto-Kurso**, Jyväskylä, Finnlando (Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, SF-40630 Jyväskylä; limdato 15 junio)
- 01-09: **2-a Internacia Perbicikla Feriado**, Szalafő, Hungario (Ernő Csiszár, Kulich Gy. u. 25 V. 16, H-8100 Várpalota; limdato 1 majo)
- 01-10: **Somera Esperanto-Lernejo**, Sarajevo-Stambulčić, Jugoslavio (SEL, str. D. Ozme 7/iv, YU-71000 Sarajevo)
- 01-14: **Somera Esperanto-Tendaro** (1-a etapo), Lančov, Ĉeĥoslovakio (Esperanto, CS-674 01 Třebíč)
- 01-14: **Rondo en Kebekio**, Kanado (E-Societo Kebekia, Pk. 126, Succ. Beaubien, Montréal, QC. H2G 3C8; busa kaj bicikla veturoj)
- 01-15: **Internacia Pedagogia Kurso por Esperanto-Instruantoj**, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur-direkcio, adreso supre)
- 01-20: **Internacia biciklado Kaunas-Leningrad**, Sovetunio (Litova E-Asocio, Pk. 167, SU-233000 Kaunas)
- 02-07: **Seminario "Lajos Tárkony kaj la Budapeŝta Skolo"**, KCE, Svislando (KCE, adreso, supre; gvidos István Ertl)
- 02-16: **Prelegoj kaj kursoj**, Grésillon, Francio (Esperanto-domo, Grésillon, F-49150 Baugé)
- 02-22: **Internaciaj Esperanto-Kursoj**, IEK-Pisanica, Bulgario (Esperantoturist, adreso supre)
- 04-09: **Festivalo de Internacia Kulturo kaj Konferenco "Celo kaj strategio de la Esperanto-movado"**, Budapeŝto, Hungario (Espertur, Pf. 193, H-1368 Budapest; kun ekspozicioj,

ekskursoj, koncertoj, E-filmoj ks.)

- 06-10: **26-a Brazila Kongreso de Esperanto**, Salvador, Brazilo (Pk. 2550, BR-40021 Salvador (BA); temo "Esperanto, kulturo kaj disvolviĝo")
- 06-13: **Esperanto-Lingvotendaro**, Kilián-telep (Balatono), Hungario (E-Sekcio de Express, adreso supre; diversaj niveloj)
- 07-17: **2-a Junulara Esperanto-Renkontiĝo en Alpoj-Adrio**, Zadar, Jugoslavio (Kroatia E-Ligo, Amruševa 5, YU-41000 Zagreb; temo "Ekologio")
- 09-14: **Seminario "Lertiĝo en la tradukarto kun tradukisto"**, KCE, Svislando (KCE, adreso supre; instruos Tomasz Chmielik)
- 11-16: **50-a Hispana Esperanto-Kongreso**, Sant Cugat del Vallès, Katalunio (Grupo de Esperanto "Jozefo Anglès", Apartado 336, E-08190 Sant Cugat del Vallès)
- 11-19: **27-a Baltia Esperanto-Tendaro**, Jelgava, Latvio (Organiza Komitato

Muzikaj kaj teatraj grupoj el pluraj eŭropaj landoj.
Usono, Hindio kaj... Sovet-Unio.
2-9 de majo, urbo Voljskij, Internacia Lerta Festivalo.



de BET-27, p/k 150, SU-226050 Riga 50)

- 14-21: **75-a Universala Kongreso de Esperanto**, Havano, Kubo (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando)
- 14-23: **23-a Internacia Renkontiĝo Naturamika (IREN)**, Abaliget (Pécs), Hungario (HEA-filio, Pf. 2, H-7601 Pécs; limdato 1 junio)
- 15-21: **Internacia Leningrada Junulara Renkontiĝo**, Leningrad, Sovetunio (Esperanto, ul. Partizana Germana 15-1-98, SU-198329 Leningrad)
- 15-22: **Junulara Esperanto-Semajno**, Košice, Ĉeĥoslovakio (Milan Ivan, Šturova 43, CS-059 21 Svit)
- 15-28: **Laborbrigado kaj Biciklado "Sumava en Selo"**, praarbaro Boubin, Ĉeĥoslovakio (E-klubo Aqualica, str. Vsehradova 6, CS-11800 Praha 1)

- 15-28: **Somera Esperanto-Tendaro** (2-a etapo), Lančov, Ĉeĥoslovakio (Esperanto, CS-674 01 Třebíč)
- 15-30: **Turisma Esperanto-Renkontiĝo**, Montara Šorio, Taŝtagol, Sovetunio (Junulara E-Centro, SU-652970 Taŝtagol, Kemerovskaja obl.)
- 16-21: **Seminario "Kiel formiĝis la interna ideo de esperantistoj"**, KCE, Svislando (KCE, adreso supre; gvidos Tomasz Chmielik)
- 16-21: **Esperanto-feriado por infanoj kaj familioj**, KCE, Svislando (KCE, adreso supre; por "praktiki la lingvon en vivplenaj situacioj"; daŭras ankaŭ duan semajnon)
- 16-23: **Internacia Esperanto-Konferenco**, Tainach, Aŭstrio (Vinko Ošlak, Viktringer Ring 25 I 3, A-9020 Kagenfurt; temo "Esperanto kaj ideologioj"; prelegos i.a. Mayer, Tišlar, Thierry, De Zilah)
- 16-23: **40-a KELI-Kongreso**, Neuchâtel, Svislando (Kristana E-ista Ligo Internacia, E. van Dijk-Kuypers, Koningsmantel 4, NL-2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando)
- 17-31: **Lernu kaj praktiku (1)**, Grésillon, Francio (Esperanto-domo, Grésillon, F-49150 Baugé)
- 20-29: **Internacia renkontiĝo de Freinet-instruistoj**, Pohja, Finnlando (Riitta Launis-Mäkinen, Sorsapuisto 1 F 61, SF-33500 Tampere; vd. ankaŭ 1-11 aŭgusto)
- 20-30: **Internacia Labortendaro**, Odorheiu Secuiesc, Rumanio (SZISZ, R-4150 Székelyudvarhely)
- 21-27: **Turisma Semajno**, Slovakia Paradizo (Peter Pavuk, str. Jilemnického 17/9, CS-05201 Spišská Nova Ves)
- 21-28: **46-a Internacia Junulara Kongreso**, Playa Giron, Kubo (46-a IJK, Pk. 2018, C-10200 La Habana 2)
- 21-28: **24-a ILEI-Konferenco**, Hanabanila, Kubo (Malcolm Jones, 41 Causeway, Chippenham, Wiltshire, Britio SN15 3DD)
- 23-28: **Seminario "La recenzo-arto en Esperanto"**, KCE, Svislando (KCE, adreso supre; instruos E. Borsboom)
- 23-28: **Prelegaro "La religia evoluo de Edmond Privat al homarana kvakerismo"**, KCE, Svislando (KCE, adreso supre; prelegos i.a. Claude Gacond, Marie-Louise Münger, Giorgio Silber)
- 23-28: **Esperanto-feriado por infanoj kaj familioj**, KCE, Svislando (KCE, adreso supre; por "praktiki la lingvon en vivplenaj situacioj"; vidu ankaŭ la antaŭan semajnon)
- 23-29: **Kvinpinta Semajno**, Finnlando (Riitta Pulli, Kulkustie 3 B I4 SF-36240 Kangasala, Finnlando; junulara renkontiĝo, temo "Nordio")
- 28-03: **12-aj Turismaj Tagoj**, Žilina, Ĉeĥoslovakio (Juraj Gondzur, str. Levocská 3, CS-010.08 Žilina)
- 28-04: **TANEF-Ferisemajno**, Maria Alm, Aŭstrio (Max Finkenzeller, Troststr. 27/10/2, A-1100 Vieno)

- 28-05: **Amikeca Turismo por Gejunuloj**, Split, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, Pk. 499, YU-41000 Zagreb)
- 29-05: **58-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj**, Sarajevo, Jugoslavio (58-a IKBE, ul. D. Ozme 7/IV, YU-71000 Sarajevo; brajlaj leteroj al Željko Bajić, ul. Akifa Šeremeta 11, YU-71000 Sarajevo; temo "Specifeco kaj problemoj komunikaj de la vidhandikapuloj")
- 29-11: **Somera Esperanto-Tendaro** (3-a etapo), Lančov, Ĉeĥoslovakio (Esperanto, CS-674 01 Třebíč)
- 30-04: **Seminario "La svisgermana literaturo – ĝiaj tendencoj kaj reprezentantoj"**, KCE, Svislando (KCE, adreso supre; instruos Tomasz Chmielik)
- 30-04: **Intensiva pedagogia-metodika kurso pri la Esperanto-instruado perbildita**, KCE, Svislando (KCE, adreso supre; instruos Claude Gacond)

aŭgusto

- iam dum aŭgusto: **1-a Internacia E-Biciklado tra Orienta Ukrainio** (D. Cibulevskij, ul. Ĉajkovskogo N. 25 kv. 11, SU-310024 Ĥarkovo; limdato 1 junio)
- 01-09: **TERVAS '90** (Internacia Skolta Tendaro), Kannonkoski, Finnlando (Esperanto-tendargrupon organizas Carola Antskog, Källkullen, SF-25700 Kimito)
- 01-11: **Internacia E-renkontiĝo de Freinet-instruistoj**, Småland, Svedio (Paul Poisson, 239 rue Victor Hugo, F-37540 St-Cyr-sur-Loire, Francio)
- 01-15: **Lernu kaj praktiku** (2), Grésillon, Francio (Esperanto-domo, Grésillon, F-49150 Baugé)
- 03-09: **Internacia Junulara Semajno**, Sződliget (apud Budapeŝto), Hungario (Lingvo-Studio, László Szilvási, Pf. 87, H-1675 Budapest; koncertoj, filmoj, tradicia balo, politikaj kaj movadaj diskutoj)
- 04-08: **Panonia Kultura Esperanto-Renkontiĝo**, Győr, Hungario (HEA-filio, Pf. 228, H-9002 Győr; limdato 1 majo)
- 04-11: **63-a SAT-Kongreso**, Linz, Aŭstrio (Max Hollinger, Gruberstr. 65, A-4020 Linz)
- 05-14: **Someraj Esperanto-Kursoj en Lingvolaboratorio**, Szombathely, Hungario (HEA-filio, Pf. 47, H-9701 Szombathely; limdato 10 julio)
- 05-15: **Pilgrimado de Varsovio ĝis Częstochowa**, Pollando (Zbigniew Kowalski, ul. Anielewicza 24 m 1, PL-01-052 Warszawa)
- 06-11: **Seminario "La muzika kulturo en Esperanto"**, KCE, Svislando (KCE, adreso supre; gvidos Nicole Pairoux [Nikolin'])
- 06-18: **3-a Intensiva Pedagogia-Metodika Kurso**, KCE, Svislando (KCE, adreso supre; trejnado por instruistoj laŭ la programo de UEA/ILEI,

cele al rajtiga atestilo; gvidos Irena Szanser)

- 08-14: **Konferenco de la Sovetia Junulara Esperanto-Movado (SEJM)**, Ivanovo, Sovetunio (E. Lebedeva, ul. 3 Nagornaja 24-82, SU-153003 Ivanovo)
- 10-12: **9-a Komuna Seminario inter Japanaj kaj Korea Junularoj**, Paĝu (Seulo), Koreio (Korea E-Junularo, C.P.O. Kesto 4258, Seoul 100-642; temo "Kion ni povos fari por la azia movado?")
- 10-25: **Oomoto-Lernejo de Japanaj Tradiciaj Artoj**, Kameoka, Japanio (Oomoto, Kameoka-si, Kyoto-hu, 621 Japanio; frua aliĝo petata)
- 10-30: **Internaciaj Esperanto-Kursoj**, IEK-Pisanica, Bulgario (Esperantoturist, adreso supre)
- 11-17: **Barlastonaj Internaciaj Kursoj**, Barlaston, Britio (D-ro D. Tatton, Warden, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DG)
- 11-18: **Internacia Feria Restado**, Vieno, Aŭstrio (Max Finkenzeller, Troststr. 27/10/2, A-1100 Vieno)



- 11-20: **"Ni serĉas la naturon piede"**, Pirinmontaro, Petrić, Bulgario (Esperantoturist, adreso supre)
- 12-25: **Internacia Konstrutendaro**, Bedrichov apud Liberec, Ĉeĥoslovakio (Ĉeĥa E-Junularo, str. Jilská 10, CS-11001 Praha 1)
- 12-25: **Internacia Lernejo por Esperanto-Funkciuloj**, Poprad, Ĉeĥoslovakio (Slovakia E-Asocio, Sobotské námestie, CS-05801 Poprad)
- 14-27: **31-a Okcident-Sovetia Esperantista Junulara Tendaro**, Ivanovo, Sovetunio (E. Lebedeva, ul. 3 Nagornaja 24-82, SU-153003 Ivanovo)
- 16-31: **Somera lernejo**, Grésillon, Francio (Esperanto-domo, Grésillon, F-49150 Baugé)
- 18: **2-a Internacia Esperanta Tablotenis-konkurso**, Hódmezővásárhely,

Hungario (Medicina Esperanto-Fakgrupo, Pf. 89, H-6801 Hódmezővásárhely; limdato 31 julio)

- 18-25: **Vojaĝo tra sudokcidenta Bulgario** (Esperantoturist, adreso supre)
- 18-25: **Somera Esperantista Feria/Familia Tendaro**, Feldberg, Germana DR (Werner Pfennig, Fohlenwinkel 13, DDR-2000 Neubrandenburg)
- 19-26: **8-a Ĝenerala Konferenco de Monda Turismo**, Istanbul, Turkio (Esperanto-Turizm, Inonu caddesi, Inegol carsisi 27, Bursa)
- 20-25: **Seminario "Redaktado de Esperanto-periodaĵoj"**, KCE, Svislando (KCE, adreso supre; instruos Perla Martinelli)
- 20-25: **Seminario "Sinjoro Tadeo, ĉefverko de la pola kaj de la Esperanta poezioj"**, KCE, Svislando (KCE, adreso supre; instruos Giorgio Silfer)
- 23-25: **Internacia Kooperativa Esperanto-Konferenco**, Fót, Hungario (Kooperativa E-Komisiono, Pf. 193, H-1368 Budapest; temo "Renaskiĝo de la kooperativa movado"; frua aliĝo petata)
- 23-26: **Vina Seminario**, Strážnice, Ĉeĥoslovakio (Ĉeĥa E-Junularo, str. Jilská 10, CS-11001 Praha 1)
- 24-26: **77-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj**, Yokohama, Japanio (Jokohama Esperanto-Rondo, 18-14 Saido 1-ĉoome, Koonan-ku, Yokohama 233; ofertas senpagan restadon por eksterlandanoj)
- 24-30: **3-a Internacia Turisma Semajno en Malto** (Esperanto-Societo (Malta), PO Box 142, Valletta, Malto)
- 24-31: **61-a Itala Kongreso de Esperanto**, Padova, Italio (Gruppo Esperantista Padovano, Via Barbieri 18, I-35126 Padova; tel. 49 757 699; temo "Eŭropo kaj enmigrintoj: la rolo de Esperanto")
- 25-26: **Studa semajnfino "Konkludo al la centjara jubileo de Edmond Privat"**, KCE, Svislando (KCE, adreso supre)
- 25-01: **12-a Somera Studenta Esperanto-Renkonto**, Toruń, Pollando (Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj, RU ZSP UMK, ul. Monuszki 16/20, PL-87-200 Toruń)
- 30-04: **23-a Pupteatra Internacia Festivalo kaj Renkontiĝo de Esperanto-Lernantoj**, Zagreb, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb; tel. (041) 424-660; telefakso (041) 421-294)

septembro

- tutmonate: **Internacia Laborbrigado**, Gelengik, Sovetunio (V. Kosolapov, ab. ja. 30, SU-353470 Gelengik)
- 07-09: **Kvinlanda Internacia Esperanto-Renkonto**, Koszeg, Hungario (Societo "Monda Turismo" de HEA, Pf. 153, H-1443 Budapest; limdato 7 aŭgusto)

- 12-14: **Interkibernetik-90**, Poprad, Ĉeĥoslovakio (IKKC, adreso supre; konferenco de TAKIS)
- 14-16: **15-a Kultura-Metodika Foiro**, Mártély, Hungario (Medicina Esperanto-Fakgrupo, Pf. 89, H-6801 Hódmezővásárhely; limdato 31 aŭgusto)
- 14-16: **7-a Pola Fervojista Esperanto-Kongreso**, Książ apud Walbrzych, Pollando (Esperantotur, str. Sikorskiego 31, PL-58-105 Swidnica)
- 14-17: **Aŭtuna Slavjanska Esperanto-Renkontiĝo**, Sovetunio (Slavjanska E-Klubo, Pk. 17, SU-343206 Slavjansk)
- 14-21: **4-a Pola AIS-Sesio**, Bjalistoko, Pollando (T. Tyblewski, B. Zwyciezcy 11/1, PL-58-500 Jelenia Góra)
- 15-17: **Migrada Plilongigita Semajnfino**, KCE, Svislando (KCE, adreso supre)
- 15-20: **Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj-Mikologoj**, Poprad, Ĉeĥoslovakio (Slovakia E-Asocio, Sobotské námestie, CS-05801 Poprad)
- 15-22: **Verda Kupidono** (semajno por gefraŭloj), Rila-montaro, Borovec, Bulgario (Esperantoturist, adreso supre)
- 16-22: **Montara Amikeca Migrado Esperantista**, Zakopane, Pollando (Esperantotur, str. Krucza 38/42, PL-00-512 Varsovio)
- 16-30: **Rodopaj Esperanto-Feriadoj**, Cepele, Bulgario (Koopturist, E-fako, str. Rakovski 99, BG-1000 Sofia)
- 18-28: **Internacia Renkontiĝo**, Velingrad, Bulgario (Esperantoturist, adreso supre)
- 23-29: **16-a Internacia Foiro de Esperanto-Turismo**, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur-direkcio, adreso supre)
- 28-30: **11-a Kongreso de Slovaka Esperanto-Asocio**, Poprad, Ĉeĥoslovakio (Slovaka Esperanto-Asocio, Sobotské námestie, CS-05801 Poprad)
- 28-01: **Internacia Amikeca Renkontiĝo**, Aylesford (Maidstone), Anglio (Bertram Russell, 103 South Coast Road, Peacehaven, Newhaven, East Sussex, Britio BN10 8QU)

oktobro

- iun semajnon dum oktobro: **5-a Esperantista Speleologia Tendaro**, Podolio, Ukrainio, USSR (E. Laiconas, Pk. 203, SU-233000 Kaunas, Litovio)
- 01-15: **Renkontiĝo kun Koro** (feriado por soleculoj), Krynica, Pollando (Esperantotur, str. Krucza 38/42, PL-00-512 Varsovio)
- 05-07: **Didaktika Seminario**, Poprad, Ĉeĥoslovakio (Slovakia E-Asocio, Sobotské námestie, CS-05801 Poprad)

- 07-09: **Regiona Renkontiĝo de Esperanto**, Promissão (SP), Brazilo (Organiza Komitato, Rua Olivio Pereira Ramos 48, BR-16370 Promissão (SP))
- 07-09: **5-a Sudbrazila Renkontiĝo de Esperanto**, Santa Maria (RS), Brazilo (Organiza Komitato, Caixa Postal 1415, BR-90001 Porto Alegre (RS))
- 07-14: **8-a Andaluzia Kongreso de Esperanto**, Torrox (Malago), Hispanio (Andalazia E-Unuiĝo, Avda. El Faro, Edificio Esperanto V-7-D, E-29793 Torrox-Costa, Malaga)
- 07-20: **Aŭtuna Esperanto-Lernejo**, Poprad, Ĉeĥoslovakio (IKKC, adreso supre; diversaj niveloj)
- 08-11: **Tagoj de Tibor Sekelj**, Zagreb, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, Amruševa 5/1, Pf. 499, YU-41000 Zagreb; renkonto de afrikaj kaj latinamerikaj kulturoj per prelegoj, filmoj, ekspozicio)
- 08-13: **4-a Kristana Esperanto-Kultur-semajno**, KCE, Svislando (Bernhard Eichkorn, Romäusring 20, D-7730 VS-Villingen)



- 16-21: **Fakvojaĝo "Plantokulturado, Koopturist kaj Publika Nutrado"**, suda Bulgario (Koopturist, E-fako, str. Rakovski 99, BG-1000 Sofia)
- 19-21: **9-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto (ARKONES '90)**, Poznań, Pollando (Kultura Esperanto-Centro "Orbita", os. Kosmonautów 118, PL-61-461 Poznań)
- 19-21: **Internacia Scienca Seminario "Kosmo - homo - lingvo"**, Vraca, Bulgario (Esperanto, Pk. 66, BG-3000 Vraca)
- 20-26: **Aŭtuna Subtrata Turisma Semajno**, Poprad, Ĉeĥoslovakio (IKKC, adreso supre)

- 23-29: **Fakvojaĝo "Koopturist kaj Publika Nutrado"**, okcidenta Bulgario (Koopturist, E-fako, str. Rakovski 99, BG-1000 Sofia)
- 25-28: **Internacia Muzika Renkontiĝo**, Ostrava, Ĉeĥoslovakio (Ĉeĥa E-Junularo, str. Jilská 10, CS-11001 Praha 1)
- 26-28: **Akademio Landegg (Esperanto-semajnfino)**, Wienacht, Svislando (Akademio Landegg, CH-9405 Wienacht; temo "Paŝoj al tutmonda socio")
- 27-29: **1-a Esperanta Renkontiĝo de Rio de Janeiro**, Tres Rios (RJ), Brazilo (Organiza Komitato, Rua Moreira Cesar 220, BR-25850 Paraiba do Sul (RJ))

novembro

- 05-11: **8-a Internacia Metodika Seminario**, Kaunas, Litovio (Litova E-Asocio, Pk. 167, SU-233000 Kaunas; temoj "Psikaj faktoroj en fremdlingva instruado; Enlingvaj interferoj en Esperanto; La rolo de la lernolibro"; limdato 1 sept.)
- 09-11: **Internacia Tradukista Seminario**, Bučovice (Vyškov), Ĉeĥoslovakio (Miroslav Malovec, Charkovská 7, CS-625 00 Brno)
- 10-23: **Amikeca Turismo por Pliaĝuloj**, Zagreb, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, Amruševa 5/1, Pf. 499, YU-41000 Zagreb)
- 23-25: **Kulturaj Esperanto-Tagoj**, Poprad, Ĉeĥoslovakio (IKKC, adreso supre)

decembro

- 07-09: **36-a Kultura Semajnfino**, Kardinal-Wendel-Haus, Homburg/Saar, FR Germanio (Sarlanda E-Ligo, Querstr. 11, D-6607 Quierschied; temo "Japanio kiel mezono inter okcidento kaj oriento"/Yosimi Umeda)
- 26-03: **Vintro-Feriado**, KCE, Svislando (KCE, adreso supre)
- 27-03: **Silvestra Esperanto-Renkonto**, ie en la montaro, Pollando (Graż yna Mirkiewicz, Ul. Hubska 119/34, PL-50-501 Wrocław)
- 28-02: **20-a Vintra Esperanto-Ferio**, Budapeŝto, Hungario (Budapeŝta Komitato de HEA, Pf. 143, H-1443 Budapeŝto; limdato 30 novembro)

januaro 1991

- 03-04: **Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI**, KCE, Svislando (KCE, adreso supre)
- 07-19: **Aŭstralia Esperanta Somer-Lernejo**, Adelaide (Sud-Aŭstralio) (Office of Continuing Education, University of Adelaide, Box 498, GPO, Adelaide, South Australia 5001; telefakso 618-22-40464; telekso 618-univadaa-89141; limdato 10 decembro 1990)

Informado 3

Sepppppppp

Merkatistoj konsilas en ĉiu agado al la ekstera publiko atenti pri harmonia kombino de sep diversaj elementoj. Por helpi la memoron, ni – foje iom tordite – uzas sep vortojn, kiuj komenciĝas per la sama litero: publiko, produkto, prezo, profito, prezentejo, personaro, propagando. Tiu, kiu malatentas tiun ekvilibron, ofte malkonstruas en la dua tago, kion li pene konstruis en la unua. Ĉi-sube sekvas kelkaj klarigoj pri ĉiuj elementoj.

1. Publiko. Ni sciu, kiujn ni jam atingis per nia informado kaj kiujn ankoraŭ ne. Spertoj pruvis, ke la sukcesoj de informado kreskas proporcie al la preciza difino de la celgrupo(j). Esploro povas klarigi, kiajn homojn ni atingas (sociodemografio) aŭ la kialojn de (ne)motivigo (psikografio). Ĉe tiu lasta ĉefe gravas la kaŝitaj kaj emociaj motivoj: plej nobla movada celo ofte falas ĉe psikologia barilo. Mi spertis ekz., ke multaj varbitoj finfine tamen ne aperis en kursoj, ĉar kelkaj parencoj aŭ amikoj ridindigis Esperanton.

2. Produkto. Ni sciu, kion ni reale povas liveri kaj kion ne. Fakte ni liveras ne produkton, sed servon, kiu valoras nur tiom, kiom la varbato taksas ĝin!

3. Prezo. La prezo, kiun frontas varbota esperantisto, konsistas ne nur el mono por aĉeti lernolibron aŭ enskribiĝi en kurso, sed ankaŭ el rezisto al malkonsiloj de aliaj homoj, el disponigo de libera tempo kaj el intelekta kaj fizika streĉoj.

4. Profito. Kompense por la prezo ni devas konsideri, kiujn avantaĝojn ni ofertas al nia celgrupo. Denove mi emfazas, ke gravas nur tio, kion ili kaj ne kion ni pensas.

5. Prezentejo. La loko de ĉio, kion ni organizas, havas grandegan influon sur la bildo kiu formiĝas pri nia movado. Malatento al tio povas fiaskigi promesplenajn iniciatojn. Inviti ĵurnaliston de laborista gazeto en renome burĝa hotelo, varbi studentojn por kurso en domo por maljunuloj, inviti alt-rangulon por informa kunveno en domaĉo... estas malsukcesigaj eraroj.

6. Personaro. Sukcesa informado postulas ankaŭ bonajn kontaktojn kun ĉiuj dungitoj kaj kun ĉiuj volontuloj, kiuj aktivis. Se iu skribas al gazeto pri “epokfara” atingo de Esperanto, kaj poste interesita ĵurnalista aŭdas en la


Esperanto-centro, ke oficisto aŭ estrarano scias nenion pri tio, tiam la novaĵo fariĝas senvalora.

7. Propagando. Nur post konsidero de ĉiuj supraj demandoj ni povas formuli nian strategion. Ĝi postulas multan penslaboron. Tiuj, kiuj okupiĝas pri informado havas duoblan rolon: niaj celgrupoj estas unuflanke la ĵurnalistoj kaj la komunikiloj kaj aliflanke la ekstera publiko. Antaŭ ol

proponi ion (novaĵon, kurson...) ni bone sciu, al kiu ni direktas nin, kian bildon tiu grupo havas pri ni (kaj ĉu ĝi harmonias kun nia informo), kion ni ofertas, kion ni postulas, kiuj argumentoj plej trafas por tia publiko, kion ni nun komuniku, laŭ kiuj kanaloj (ĉu per cirkulero, letero aŭ per personaj kontaktoj), kie haveblas pliaj informoj, kaj kiu estas la plej taŭga momento.

Ĉiuj tiuj punktoj povas esti temo de pli profunda pristudo. Sed ĉi tie ne aperas kurso. Mi nur volas skizi al vi la eblecon efikigi vian laboron per plia studado.

Ivo Durwael
Estrarano pri Informado



“Rusa sovetia verkisto kaj klerigisto, esperantisto V. J. Eroŝenko” tekstas la Esperanta klarigo sur dulingva memoriga koverto.

Jaro de Eroŝenko, ne nur por ni!

Oni ne pretervidu la fakton, ke la plej signifaj jubileoj de la Esperanta kulturo provizas bonan okazon por turni nin eksteren. Post la Jubilea Jaro, elstaran ekzemplon provizis la telefaksa dissendo de *La Esperantisto* okaze de ties centjariĝo. Ankaŭ la svisaj iniciatintoj de la Jaro de Privat lerte vekis atenton, prezentante lin kiel pioniron de la eŭropa unuiĝo. Tia agado kompreneble ne devas anstataŭi nian festadon kaj taksadon de la signifo de tiaj eventoj kaj homoj por nia propra kulturo. Ĝi tamen bele komplementas ĝin.

UEA aŭspicias nun du pliajn jubileojn, taŭgajn por tia ekstera prezento. Antaŭ cent jaroj naskiĝis Vasilij Eroŝenko, eksterordinara poeto kaj novelisto kiu, kvankam blinda, vojaĝis de Rusio tra la landoj de Eŭropo kaj orienta Azio, verkante atentindajn

rakontojn ne nur en sia denaska lingvo kaj Esperanto, sed ankaŭ en la ĉina kaj la japana. En la landoj, kie li vojaĝis, liaj admirantoj jam eksolenas tiun datrevenon (vidu la ilustraĵon de sur sovetia koverto), dum siaparte UEA aperigos artikolon kaj Esperanto-dokumenton por disvastigi la konon de Eroŝenko inter la monda esperantistaro. Ni aparte invitas literaturamantojn prepari samtemajn artikolojn kaj tradukojn por naciaj revuoj.

Tian diskonigon meritas ankaŭ la genia hungara duopo, kies centjariĝon ni festos en 1891. Julio Baghy kaj Kálman Kálocsay apartenas al tiu eta verkista elito, kiun konas preskaŭ ĉiu esperantisto. En la programo de Hungara Esperanto-Asocio jam troviĝas aranĝoj en Hungario mem kaj ĉe la Universala Kongreso en Bergeno.

mf

UEA ne forlasis nin

Tute ne! La ruinigo de la subprema, entute anakronisma reĝimo en nia lando forigis kiun ajn dubon. Post interrompo de kelkaj jaroj, la unua kortuŝa kuriero el okcidento kiu penetris ĉi tiun longe fermitan zonon estis la decembra numero de *Esperanto*. Je nia granda surprizo, baldaŭ post tio nin, la malnovajn membrojn de UEA, atingis la tuta jarkolekto 1989 kaj la unua numero de 1990. La normalaj rilatoj estis tiel tute reprenitaj.

El la interesa artikolo "UEA forlasis nin" de pasinta oktobro ni povis ekscii, ke ankaŭ la esperantistoj, pere de UEA, kontribuis al nia liberiĝo. La nomo de la kuraĝa aŭtoro de tiu artikolo devus nun esti konata. Kun aldonado de la reago de Ionel Onet (decembra numero) ni konstatas ke, male ol forlasi nin, UEA grandanime helpis la reaktivadon kaj la venontan floradon de nia landa movado.

Prof. Toma Macovei (Rumanio)

Konstrui sur lingva stabilo

Mi plene konsentas kun – kaj ŝatus kunlabori por – la membrokampanjo "Por dek milo post tri jaroj". Sed necesas pripensi *kial* la membro-nombro de UEA stagnas. Mi sincere pensas ke unu kaŭzo estas la simpla fakto ke nia Asocio ne sufiĉe defendas, tiel kiel preskribas ĝia statuto, la zamenhofan lingvon Esperanto kiel difinitan per la Fundamento. Anstataŭ gardi la firme establitan lingvouzon, UEA pere de sia centra organo allasis lingvajn kverelojn kaj disputojn, kio ne nur endanĝerigas la ekziston mem de Esperanto kiel unueca lingvo, sed ankaŭ kreas konfuzon kaj skeptikecon inter la esperantistoj kaj tiel fariĝas grava obstaklo por plua laŭnombra progreso.

Jam 40 jarojn seninterrompe mi estas individua membro de UEA, sed kiam mi legis kiel la revuo *Esperanto* diskonigas la lingvajn kapricojn de Bernard Golden kaj Alan Towsey pri la uzo de verboj (n-roj 11/88 kaj 3/89), mi serioze pensis: "Estas vane kontinui; kial ne ekŝiĝi?" Unu afero estas ke kelkaj esperantistoj bedaŭrinde trovas la mirindan precizecon de la Esperantaj verboj malfacila, eble ĝuste pro la malklareco kaj neprecizeco de siaj propraj gepatraj lingvoj; sed tute alia afero estas ke ili volas enkonduki la

dubosencojn kaj ambiguecojn de tiuj naciaj lingvoj en Esperanton kaj tiel subfosi centjaran nuancitan lingvouzon enradikiĝintan surbaze de la Fundamento. Mi timas ke iliaj proponitaj ŝanĝoj estas nur la komenco. Laŭ la principo aŭ preteksto de "neceso kaj sufiĉo" kial ne diri: "La knabo bolas la kafo", ĉar evidente la senco de la frazo restas klara: nur la knabo povas boligi kafon, sed kafo ne povas boligi knabon. Alivorte baldaŭ ni verŝajne ankaŭ devos "toleri" ke oni forĵetas la akuzativon!

Kiam fine la esperantistoj komprenos ke Esperanto ne estas ludilo, nek nura nematura lingvoprojekto, kiun oni povas ŝanĝi aŭ modli laŭplaĉe, sed vivanta kaj ekzistanta lingvo fundamente netuŝebla? Nur se UEA senkompromise defendos la stabilecon kaj la kontinuecon de Esperanto, precipe bezonatajn por juna lingvo parolata kaj parolata inter anoj de la plej malsamaj lingvogrupoj, nia Asocio povas esperi allogi novajn membrojn kaj eviti la ekŝiĝon de malnovaj.

Eskil Svane (Francio)

Persona partoprenigo

Tre granda malplaĉo estis por mi ekscii, ke pro malfeliĉa miskompreno aperis anonceto en via revuo *Esperanto* 1989/p.217 pri EXPO '92 kaj mi mem.

EXPO '92 laŭ sia regularo uzas nur la hispanan, kiu estas ĝia oficiala lingvo; krom tiu estas permesataj ankaŭ la angla, kiel helpa laborlingvo, kaj la franca, kiu estas la oficiala lingvo de la BIE (Internacia Organizaĵo pri Ekzpozicioj).

Kiu ajn korespondo kun tutmondaj samideanoj estos ĉiam persone mia, kiel esperantisto, sed neniam oficiala.

Manuel Moraleda (Hispanio)

Rekonstrui el nulo

Iom malfrue, tamen mi ŝatus reagi al la artikolo de A. Künzli aperinta en la novembra numero de *Esperanto*.

Nenia unueco detruigis en USSR. La unueco, kiu ekzistis, estis formala, kreita por la sola celo: kontroli suspektindan movadeton. En ASE, same kiel en la tuta lando, la membroj ne havis eblecon influi la ĝeneralan politikon. La movado reprezentis amason unuecan en sia senrajteco.... Por fari ion ajn surloke ni bezonis permeson de Moskvo – temas pri ĉio, kio antaŭvidis kunvenon de esperantistoj el

kelkaj urboj. Mem ASE nenion faris por kunordigi la movadon, sed ajna loka iniciato bezonis rezolucion de ASE "permesate". Pro tio vivi ekster ASE estis neeble....

Kompreneble, dum la 10 jaroj ASE ne perlaboris amon, nek kreis labor-strukturojn, kiuj povus iĝi bazo por kunagado sur la nuna etapo. Fakte, la movado en USSR jam la tioman fojon devas rekonstrui la strukturojn de nulo. Kaj estas tute nature, ke en tia vasta lando unuavice formiĝas lokaj asocioj – ofte sur teritorioj pli grandaj ol Okcidenta Eŭropo. La provoj estigi tutlandan asocion malgraŭ pluraj proklamitaj "tutlandaj" E-unuiĝoj ankoraŭ ne rezultigis ion tiel nomindan. SEU baziĝas sur la rusiaj E-klubo kaj nemultaj grupoj el aliaj respublikoj kun malforta movado. TUEK estas tute papera kreaĵo, kiun fondis SEU por havi oficialecan kanalon ĝis sia jura reagnosko. SEJM estas sendependa unuiĝo precipe de junaj SEU-aktivuloj. Aliaj landnivela organizadoj estas aŭ fakaj, aŭ mikroskope esplrendaj.

Antaŭvidi kio evoluos el la nuna situacio estas apenaŭ eble, ĉar la sovetia movado estas influata de la samaj tendencoj, kiuj disŝiras nun la tutan landon. Neniu povas antaŭdiri, kian ŝtatan strukturon ni havos post perestrojko: ĉu unu integran Union, ĉu aron da sendependaj socioj, politikaj arenoj kaj ekonomiaj merkatoj? De tio dependas, ĉu diversregionaj kaj divers-respublikaj esperantistoj havos realan stimulon kunlabori kaj krei ĉu federacion, ĉu konfederacion sur la teritorio de la nuna USSR.

Andrej Ananjin
(SEU- kaj SEJM-aktivulo, Sovetunio)

Por plia profesieco

Kelkfoje kaj kelkloke en Esperanto post la brajtona kongreso mi legis kun intereso kaj ĝenerala konsento unu-du akrajn komentojn pri la artnivelo de iuj el la tieaj koncerteroj. Kiel klarnetisto kiu ludis en la Nacia kaj Internacia Vesperoj, kaj ankaŭ proponis ludi en plifrua UK, mi ŝatus aldoni proprajn komentojn.

La plendo ke ne troviĝas sufiĉe da profesieco ĉe movadaj distraĵoj leviĝas el la simpla fakto, ke la movado ne enhavas sufiĉe da profesiuloj, eĉ da sufiĉe spertaj neprofesiuloj. Kiom da esperantistoj estas ankaŭ profesiaj

ludistoj, pretaj por ludi preskaŭ senpage? Mi mem, kiel "duonprofesia" ludisto, ankaŭ ege preferas ludi grupe ol soliste, sed kiel antaŭe eltrovi aliajn taŭgajn kungrupulojn? Mi jam petis de MEL liston de movadaj ludistoj/-antoj, sed ŝajne tia ne ekzistas. Mi povis kunlabori kun mialandano Malcolm Jones (flutisto), sed ja preferus ludi plimultope. Kiel aranĝi tion?

Nu, ankaŭ mi plendas pri neprofesieco – neprofesieco flanke de la aranĝantoj. Rilate la brajtonan kongreson, Malcolm kaj mi proponis nin kelkajn monatojn antaŭ la kongreso, sed ne eksciis definitive antaŭ la kongresa semajno, eĉ la vesperoj mem, ĉu aŭ ne oni akceptis niajn proponojn. Mi scias ke ja leviĝis apartaj malfacilaĵoj antaŭ ĉi-lastata kongreso, sed io simila okazis (aŭ ne okazis!) rilate la varsovian kongreson. Al mia frua propono ludi, neniun respondis aŭ de Roterdamo aŭ de Varsovio, kaj kiam mi demandis ĉe la kongreso mem, iu virino "nebule memoris" mian leteron sed ĝentile opiniis ke Brahms, aŭ eĉ Mozart, estus "tro peza" por la aŭskultantaro, kaj alia virineto, supozeble miskomprenante, donis al mi oreplenon da malagrablo pro mia "provo trudi min en la aranĝojn".

Ni legas ke "en Havano funkcios multe pli rigora selektoprocezo". Bone, ja; kaj multe pli rigore profesieca traktado de la sinproponintoj?

Douglas Kershaw (Anglio)

Ĉu nur por nobeloj?


En *Esperanto*, januaro 1990, mi legis anoncon pri *La familio de Pascual Duarte*. Mi legis tiun libron dum pasinta novembro, kaj mi estis surprizita trovi en ĝi multajn vortojn, kiuj ŝajnis al mi strangaj. Jam de pli ol 30 jaroj mi kutimas legi ĉiujare plurajn librojn en Esperanto, sed neniam mi frontis al tiom da neologismoj aŭ vortoj nekonataj.

En tiu romano, ĉirkaŭ 150 paĝoj entenantaj ĉirkaŭ 15 000 vortojn, mi kalkulis 430 vortojn aŭ neologismajn, aŭ ne trovitajn en PIV kaj ĝia suplemento. Mia demando estas: ĉu tia literaturo estas rezervata por iu parto de la esperantistaro (literaturistoj, lingvistoj, gramatikuloj, snoboj)?

Domaĝe! La enhavo de tiu romano estas interesa. Ne alloga pro la speguliĝo de tiu epoko, sed trafa pentraĵo de la kampara vivo kaj vivkondiĉoj tiutempe en Hispanio. Laŭ mi la traduko estas vera fuŝaĵo, kaj de Esperanto, kaj de Nobelpremio.

Gilbert Gerrier (Francio)

Laste aperis...



Akada (asirobabilona) leksikono. André Cherpillod. Nanterre: la aŭtoro, 1989 (dua eldono). 86p. ISBN 2 906134 00 7. 21cm. Akada-Esperanta vortaro, kun parencaj vortoj el la hebrea, siriaka, araba, malta, aramea kaj amhara, kun notoj kaj klarigoj pri la araba, hebrea-aramaea kaj siriaka alfabetoj. 10,20 gld.

Aŭtografoj de Ludoviko. Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, kromkajero 4. Kioto: Ludovikito, 1989. 408p. 22cm. 178 fotoreproduktitaj manskribaĵoj de la aŭtoro de Esperanto, plus fragmentoj el la manuskriptoj de "La batalo de l' vivo" kaj "La rabistoj". 48,00 gld.

Esperantigita Hun Min Ĝong Um (1446). Seĝong (1397-1450), el la korea trad. kaj komentariis Bak Ĝiŭan. Seoul: Korea Lingva Societo, 1989. 144p. 22cm. La origina libro pri la korea alfabeto, unika pro sia kombino de altnivela lingvistiko kaj antikva filozofio. Enestas ankaŭ la ideograma originalo. 21,60 gld.

Esperanto por ni. Helena kaj Jozefo Mikuláš. Budapeŝt: Hungara Esperanto-Asocio, 1989. 264p. ISBN 963 571 304 5. 23cm. 4-voluma internacia kurso por infanoj, kun vigla kaj varia enhavo. 39,60 gld.

Eta princo, La (1943). Antoine de Saint-Exupéry (1900-1944). El la franca trad.



Pierre Delaire. Montrealo: Kanada Esperanto-Asocio, 1989 (2a eld.). 93p. ISBN 0 15 246503 0. 23cm. Kolorilustris la aŭtoro. Bind. Mondfama fabela rakonto, kies humanisma filozofio "en ĉarma maniero tuŝas la spiriton kaj koron". 27,00 gld.

Evangelio de la horo, La (1909). Paul Berthelot (1880-1910). Esperantigita el portugallingva versio de Osvaldo Pires de Holanda. Chapecó: Gilbert R. Ledon, 1990. 36p. 21cm. Prezento de la anarkismo per fabelo pri anonima profeto. 4,80 gld.

Granatoj. Ĉina popolarakonto, adaptis Ŝjaŭ Ding. Beijing: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1989. 38p. ISBN 7-5050-0012-7. 20cm. Kolorilus. Inter du fratoj, malavaro triumfas super avido. 4,20 gld.

Gvidlibro de internacia korespondado por esperantistoj. Krizantemo (ps.).

Tokio: Japana Esperanta Librokooperativo, 1989. 167p. 17cm. Tre detala konsilaro en Esperanto kaj la japana. Inkluzivas regulojn pri latinlitera transskribo de japanaj adresoj. 13,20 gld.

Korea eksprese. Facila aliro al korea lingvo. Bak Ĝiŭan. Seulo: Hanshin, 1989. 242p. 22cm. Bind. Detala kurso speciale verkita por esperantistoj. 33,00 gld.

Lanĉo. Emilija Lapenna. Zagreb: Zagreba Esperanto-Ligo, 1989. 24p. 14cm. Teatraĵeto pri la komencaj tagoj de Esperanto. 2,10 gld.

Nigraj herboj (1970). Radmila Trifunovska (1939-). El la makedona trad. Tatjana Ropajkova. Skopje: Makedonia Esperanto-Ligo, 1988. 48p. 20cm. Simplaj poemoj, esprimantaj la triston de soleco. 8,40 gld.

Scienca bukedo el Francio (2). Div. aŭtoroj, red. Christian Bertin. Cesson-Sevigne: CFAES, 1989. 56p. 21cm. Studoj en la kampoj de agronomio, likenologio, biokemia instruado, socia ekonomio, religia arkeologio. 9,60 gld.

Trezoro. La Esperanta novelarto, 1887-1986. Div. aŭtoroj, red. Reto Rossetti kaj Henri Vatré. Budapeŝt: Hungara Esperanto-Asocio, 1989. 948p. ISBN 963 571 107 7. 21cm. Duvoluma. Jubilea Kolekto n-ro 4. Riĉa kolekto de prozaĵoj (ne nur noveloj, sed ankaŭ romanfragmentoj kaj aliaj), celanta doni superrigardon pri la amplekso kaj vario de unu jarcento da originala verkado. 69,00 gld.

Turista kantaro 2. Red. T. Kereszthegy, M. Juhász kaj J. Zsidi. Pécs: Monda Turismo, 1989 (senindike). 68p. 20cm. 42 kantoj tradiciaj kaj popolaj, kun muziknotoj. 9,90 gld.

DIVERSAĴOJ

Esperantaj paroligaj ludoj. Ses vortludoj en Esperanto por paroligi kaj amuzi la ludantojn kaj pligrandigi ilian vortscion. Marjorie Ellyard. Page: la aŭtoro, 1989 (senindike). Ses kartaroj, kun ludproponoj, pri la kategorioj "iloj", "ejoj", "maloj", "paroj" (laŭ funkcio kaj laŭ deveno), "korporpartoj". 26,40 gld.

Vidbendo: Bonvenon al Bjalistoko. Roman Dobrzyński. Interpress, 1989. 50 min. VHS-PAL. Originala dokumenta filmo pri la naskiĝurbo de Zamenhof, kiu donas interesan rigardon al lia socia kaj kultura fono. 59,70 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18,5% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!



Ne nur inkubsonĝo

Postmilita japana antologio. Kompilis Odagiri H., Miyamoto M. kaj Konisi G. Osako: Japana Esperanta Libro-kooperativo, 1988. 318p. 21cm. Bind. 51,60 gld.

Kun neatendita emocio mi legis ĉi tiun antologion. Temas pri dek du tekstoj, ĉefe noveloj, sed enestas unu radio-teatraĵeto kaj fragmento el romano, kiujn kunigis ne nur la redaktantoj sed ankaŭ ilia etoso. Tiu epiteto "post-milita" ja signifas multe pli ol nur "modern-epoka": ĝi indikas la sube troviĝantan temon. Kvankam ne ĉiuj rakontoj disvolviĝas dum ĝi, militistoj kaj ties agoj ne estas centraj, tamen la Dua Mondmilito ĉiam ĉeestas tra la tuta libro.

Komence kompreneble troviĝas persona travivaĵo sub la atom-bombado, *Floroj en somero*. Aliaj eroj montras kiel misformiĝas homaj psikoj sub premo de teruro kaj mizero (*Korbi-kuloj*), aŭ traktas la sistemon mal-homigan de la militkaptiteco (*N-ro 36*: la kaptitoj tuttage devige sidantaj en unu sola pozo, inkuba necerteco, ĉu komdamniĝo aŭ ne; obsede rakontite). *La juĝo* estas eble la plej impresa el ĉiuj: monstra bildo de tio, kion kapablas homo, kiu en normalaj cirkonstancoj estis bonkorulo edukita sed sub militaj influoj fariĝas sensentulo, murdante nur por amuziĝo aŭ – eble pli terure – fakte sen ajna kialo, kaj samtempe restas am-plena fianĉo. Nur kiam lia amatino ne plu kapablas "gluti" la faktojn, okazas funda mensa ŝanĝiĝo. *La tombo de lampiroj* trafe pentras la seneliran vagadon kaj pereon de du miltorfoj: laŭ la post-parolo, ĉi tiu rakonto estis inter la unuaj, kiuj trablegis la distingon ĝistiaman inter "alta literaturo" kaj "nura amuzaĵa verkado". Se mi bone komprenis, ĝi stile apartenas al la dua, sed enhave nepre al la unua kategorio.

La sola verketo kiu spiras tute alian etoson estas *La aŭdipova kufo*. Teme ĝi ja ligiĝas al la milito, sed etose ĝi estas ĉarmega popoldramo, kvazaŭ folkloro riĉa kaj bunta. Ege bonfara oazo en ĉi tiu libro.

Tamen, oni ne ekhavu la impreson, kvazaŭ legado de ĉi tiu antologio estus nura inkubsonĝa sperto. Nepre ne. La aŭtoroj tiel vive montras siajn "hero-

ojn", ke oni kvazaŭ sentas sin ene de ilia menso, kunrezonante kun sentoj de timo, devo, abomeno ktp. En *Ĝis mi estis kaptita*, ekzemple, la ĉef-persono je iu momento decidas, ke li sin mortigos. Tamen lin tiom obsedas la soifo (kaj legante oni kun-soifas), ke li unue devas trovi ion por trinki, ĉar eĉ morto devos iel deci. Kaj ĝuste pro sia deziro unue gluti iom da akvo, li estas "savita" – por iĝi militkaptito. Tiom da rezonadoj, sentpriskriboj, mensaj ŝanceliĝoj: legante oni eĉ forgesas, ke la japanoj tiuepoke por multaj estis "malamikoj", ilin oni spertas nur homoj, kun ĉio grandioza kaj ĉio plej aĉa, kion tiu vorto enhavas.

Kiel tradukon mi ne povas juĝi la verkon, sed la lingvaĵo kutime legiĝas tre klare. Tamen ie tie mi trafis frazon, kies senco ne fariĝis tute komprenebla: ĉu nur pro la fama preskoboldo aŭ ĉu ankaŭ pro lingva pretervido, ne ĉiam estas eble decidi. Entute: valorega verko, nepre leginda.

Gerrit Berveling (Nederlando)

Pordo al fascina nekonatejo

Koreaj eseoj, noveloj kaj popolarakontoj, 1932-1967. Tradukis Hajpin Li (1917-). Seulo: Libera Biblioteko, 1987. 222p. 21cm. 12,90 gld.

Vane mi serĉis germanan vortaron por la korea lingvo, kiam, en oktobro 1987, mi preparis min por vojaĝi al la Lando de la Matena Kvieto. Eĉ por la plej renoma vortar-eldonejo de mia lando, la korea simple ne ekzistis. Sed jam nun, post la Olimpikoj en Seulo, multaj komencis rimarki, ke Koreo signifas pli ol teruran militon kiu disigis duoninsulon en du partojn, egale nekonatajn en la okcidenta mondo.

Esperantistoj ne devis atendi ĝis la Ludoj. Iam kaj iam voĉo el la fora lando penetris sur la paĝojn de nia gazetaro, aŭ aperis en la persono de korea kongresano. Nun Hajpin Li, konata en sia lando kiel aŭtoro de du tre ampleksaj vortaroj, provizis al ni eniran pordon al la korea literaturo, enhave iom hazardecan kaj ne tre

aktualan, tamen kvazaŭ unuan ŝtupon survoje al antologio komparebla kun la renomaj verkoj de Literatura Mondo kaj poste. Papero, tipografio, preso, aranĝo – ĉio estas unuaklasa, vere montrebla kaj montrinda.

Oni povas eklegi kie ajn, tamen plej facile ĉe la popolarakontoj en la lasta dekonio de la verko: kvin fabeloj, foje specifaj koreaj laŭ etoso, foje similaj al aliaj tra la tuta mondo, pri servistinoj kaj princoj, maliculoj kaj bonkoruloj, amo kaj angoro. La centran parton formas la noveloj aŭ noveletoj de kvin aŭtoroj (bedaŭrinde mankas ĉia biografia indiko pri ili). La plej longa inter ili, "Eĥo", fluas malrapide kaj larĝe, apenaŭ rivelante surprizojn, kaj



tamen mi legis kun daŭra intereso, kun la impresio ke mi povus renkonti tian paron, kia la kamparano Dong-uk kaj lia edzino, evidente rifuĝintoj kiuj pene kaj persiste luktas por vivteni sin, kultivante forlasitan terpecon en la montoj. Tre ĉarme efikas multa loka koloro – kiam nia nigra teo estas ruĝa kaj verŝajne sinonimas kun PIV-a bruna, aŭ kiam la hundo bojas "kong-kong". Cetere oni devas scii – aŭ serĉi – multajn plant- kaj bestonomojn por bone kompreni la tekstojn.

La eseetoj, tradukitaj ĉefe el ĵurnaloj, parte tro klare montras sian tempon (1960-64). La leganto dezirus ian daŭrigon por atingi la nuntempon, ekzemple kiam temas pri la muzika heredaĵo de la lando.

La lingvaĵo ĝenerale fluas agrable, tamen restas pli ol unu punkto kiu bezonas poluron kaj korekton. Angla influo ŝajnas kulpi pri makuloj kiel

“aktuale” por efektive (p.60), “miris” por scivolis (p.98), “post” anstataŭ post kiam (p.72, 73. 75...), same pri adjektiva uzo de nomoj: Gorjo dinastio, Ĉon Su pordego, Li reĝimo ktp. Simpla ligo-streko riparus la aferon. Evidente oni povos senprobleme elsarki tiajn malglataĵojn sume bagatelajn, kiam venos la momento por iu pli ampleksa, laŭ temoj, epokoj kaj paĝoj, Korea Antologio, kiun Hajpin Li mem sopiras en sia antaŭparolo. Ĝis tiam ni povos almenaŭ transiri la sojlon kaj ĵeti rigardon en la unuan salonon de fascina kulturo tro longe kaŝita kaj nun, helpe de Esperanto, parte alirebla.

Adolf Burkhardt (FR Germanio)



Dialektoj de la amo

Itala antologio, ekde la 13-a ĝis la 19-a jarcentoj. Redaktis Giordano Azzi. Milano: Cooperativa Editoriale Esperanto, 1988. 477p. 21cm. Ilus. 45,00 gld.

Jam antaŭ la dua mondmilito *Literatura mondo* lanĉis la projekton de ĉi tiu antologio. En la kvindekaj jaroj, kelkaj junaj italaj tradukemuloj transprenis la laborojn sub la gvido de Giordano Azzi, sed kiam la projekto ŝajnis efektiviĝonta la redaktado denove interrompiĝis dum la sepdekaj jaroj. Finfine la centjariĝo de Esperanto instigis Azzi kaj liajn kunlaborantojn daŭrigi kaj fini la laboron. La rezulto de tiu multjara kovado estas jena elstara libro.

Al ĉiu jarcento de la itala literaturo, de la 13-a ĝis la 19-a, dediĉiĝas aparta ĉapitro. Pli ol duono de la tradukitaj verkoj estas poeziaj, dum teatraĵoj nur tre sporade aperas. La ĉefa temo de la prezentita literaturo koncernas la amon, laŭ ĝiaj multifacetaj aspektoj. La diverseco ja estas granda. Jen pompas solena stilo, jen plaŭdas kanzonaj versetoj. Jen triumfas aforisma saĝo, jen angorigas profunda tragiko. Jen petolas la satirulo, jen ĉarmas naiva konfeso.

Krom la tradukojn mem, la libro enhavas ĝeneralan enkondukon kaj akompanajn tekstojn, kiuj priskribas la historian fonon kaj prezentas la aŭtorojn kaj iliajn verkojn. Aldone, multaj piednotoj helpas la komprenon. Kelkfoje tamen, tiuj klarigoj donas lernejan literaturhistorian impreson, kaj ne ĉiam helpus homojn, kiuj ne hejmas en la eŭropa kulturhistorio. La libro povas cetere utili kiel verkista

leksikono, des pli ĉar multaj aŭtoroj estas bildigitaj.

Speciale ĝojiga estas tio, ke la malpli konata t.n. dialekta literaturo trovis lokon en tiu antologio. Verki itallingve ĉiam estis lingvopolitika elpaŝo, ĉar la lingvo, kiun Dante elektis kiel literaturan, ne estas la sola “itala”. En la antologio ni trovas poeziaĵojn de Porta (milana), Belli (roma) kaj Di Giacomo (napola). Mi dezirus pli multe de tiu specife itala ĝenro: kial mankas ekzemple Trilussa, samtempulo de D’Annunzio?

La antologio estas kolektiva verkaĵo de almenaŭ 29 tradukintoj, inter kiuj troviĝas korifeoj de nia literaturo, i.a. Kalocsay kaj Waringhien. Pro la fakto, ke tiom da diversstilaj kunlaborantoj estigis la tradukojn dum duono de la ekzistoperiodo de Esperanto, la libro estas antologio ne nur de la itala literaturo, sed ankaŭ de la Esperanta tradukarto.

Martin Haase

Nemalgranda kulturo de malgranda popolo

Antologio de maltaj poetoj. Tradukis Carmel Mallia. Żabbar: la tradukinto, 1986. 168p. 21cm. 17,70 gld.

Pri Malto mi sciis, ke ĝi estas mediteranea insulo apud Italio, ankaŭ samnoma respubliko kelkfoje nomita en la gazetaro. Pligrandiĝis mia intereso, kiam per enciklopedio mi eksciis, ke Malto estas preskaŭ dekkvinoble malpli granda ol mia hejmlando kaj la popolo nombras nur trionon de la estona.

La antologio komenciĝas per du eposoj. Tiu de Dun Karm prezentas la internan animan etoson de la aŭtoro per ĝuigaj strofoj, kun multaj religiaj motivoj kaj filozofio. La duan, *La turka ĉefgalero*, la tradukinto karakterizas kiel “malgrandan eposon, verkitan per nemulte konata lingvo de tre malgranda popolo”. La temo koncernas la konflikton inter du religioj, samtempe politikaj potencoj – la kristanismo kaj la islamismo.

Inter la prezentitaj 43 aŭtoroj nur tri estas poetinoj, do mi ne atendis abundan ampoezion, kaj fakte tri el la kvar ampoemoj, kiujn mi notis, apartenis al aliaj. Tamen serĉu tiujn rarajn perlojn, ili “envolvos vin en sia rava revo” (p.157). Naturmotivojn prezentas kelkaj, majstre filozofieme, aparte Gorg Pisani per *La bovo* kaj ties medi-

tigaj lastaj strofoj: “La bov’ rigardis milde l’ mortiganton/ kvazaŭ por demandeti ‘kial, kial?’”

Multajn maltajn poetojn inspiris la nuntempa maltrankvila kaj streĉita mondo, “tragedie malsana homaro” (p.8). Abundas sociaj kaj socifilozofiaj motivoj: Carmel Calleja, “...la vivo ne estas nur blanka/ aŭ nigra/ – sed diverskolora!” (p.105); Lino Spitteri, “Sola/ mi revas pri Demokratio/ sed ĉie/ senlacas/ la Tiraneco” (p.153). Tiaj citaĵoj eble estas mallonga resumo socitema de la antologio.

La libro, ekstere plaĉa kaj pres-teknike bonkvalita, vere estas modelo. La elektitaj eroj montras altan poetikan kulturon egalvaloran al moderna poezio de kiu ajn popolo. Multaj eroj estas nesimplaj laŭ sia vortumo, sporade malfacile kompreneblaj por ankoraŭ nematura esperantisto, postulantaj ripetan legadon. La traduko estas bona, sen neologismoj, kaj troviĝas malmultaj preseraroj (mi rimarkis dekon). Bedaŭrinde troviĝas ankaŭ kelkaj lingvaj stumbloj, ĉefe koncerne transitivecon kaj la akuza-tivon de direkto.

Jen plia pruvo, ke ekzistas malgrandaj popoloj, sed ne ekzistas malgrandaj kulturoj. Fieru, Malto!

N. Laanoja (Estonio)

• **ASISTI:** En la lasta kongresa numero ni menciis la fondon de Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj, kiu celas "pli bonan interreligian komprenon, ĉefe per la disvastigo de spiritaj valoroj entenataj en ĉiuj religioj de la mondo". Ties organo *Asistilo* intertempe atingis jam sian 4-an numeron. Tajpita sen pretendoj al grafika belo, ĝi enhavas amason da informoj: nur el la tria numero, eblas citi dekon da paĝoj pri la religia situacio en Tibeto, kvar paĝojn pri la Mondaj Konferencoj pri Religioj kaj Paco, kvin paĝojn pri la miljarigo de la rusa kristanismo... kaj krome mallongajn komentojn kaj raportojn pri diversaj Esperantaj iniciatoj. La asocio kaj revuo estas malfermitaj ankaŭ al nekredantoj. Aperas plurpaĝa franclingva suplemento. Jarabonon de 35 FF oni sendu al la sekretario-redaktoro Ch. Lavarenne, "Les Margaillans", Lignane, F-13540 Puyricard, Francio (pĝk 6 491 49 L Marseille).

• **Honorindaj:** Estas bele vidi, ke la honoraj membroj de UEA ne ĉesas aktivi post sia laŭriĝo. HM Oene Hoekstra (Nederlando) atentigis nin pri verko en atentinda metodika serio ĉe la germana eldonejo Gunter Narr: Temas pri anglalingva prezento de Wil Knibbeler pri la "Esplorkreiva Vojo" – lingvoinstrumento, kiun ili kune evoluigis tra jaroj da praktiko por "maksimume apelacii al la kapabloj kaj emoj de la lernantoj". Laŭ HM G.F. Makkink "ĝi postulas multfacetan sindonon de la instruisto.... Prezentante kartojn kun vortoj, gazetojn, senbendojn, mallongajn taskojn ktp, la instruisto stimulas la lernantojn al propra serĉado, eltrovado, eksperimentado, uzante la cellingvon.... Leginte la libron mi emas nomi la metodon Super-Cseh-metodo." La aŭtoro cetere uzas Esperanton en siaj ekzemploj.

De HM Reto Rossetti, kune kun kolego Henri Vatré, aperis antaŭnelonge la eminenta "proza antologio" en la Jubilea

Kolekto de UEA. Tamen la klopodoj de Hungara E-Asocio, kiu transprenis la eldonon laŭ insisto de Rossetti, ne kontentigis la perfektaman kunkompilinton. Notinte malkonsenton pri la titolo *Trezoro*, Rossetti plu sciigas: "La kompilintoj ne ricevis presprovaĵojn el la presejo, sed post kontrolo de la preta verko ili trovis 244 preserarojn, kiujn ili diskrete reduktis al 90 el la plej gravaj kaj tiun liston ili liveris al la eldonejo. Ili konstatis ankaŭ, ke mankas en la libro (a) fontindikoj, kaj (b) listo de klarigoj/glosoj, kiuj akompanis la manuskripton. En unu novelo de Johán Valano, *Veli morten*, elfalis 9 paĝoj el la 15-paĝa teksto, kaj en la biografietoj la noto pri Sam Meyer nur erare ripetas tiun pri Pál Lengyel." Li aldonas sardone: "Kun tiuj aldonaj faktoj la 'numero 4 de la jubilea kolekto de UEA' povas kuraĝe iri al la recenzantoj." Ni esperas, ke ni foje havos okazon recenzi la kolektitan korespondadon de Rossetti en ĉi tiuj paĝoj...

Loke

• **Benino:** Post du jaroj, en kiuj ĝia agado estis malpermesita de la Ministerio de Enlandaj Aferoj, la E-klubo "La Verda Stelo" en Cotonou denove reaktiviĝis sub egido de la Ministerio pri Kulturo. Reaperis ankaŭ la kluba bulteno *La verdulo*, en kiu la anoj dankas pro la daŭra subteno de alilandaj amikoj tra tiu malfacila periodo.

• **Bulgario:** La 3-an de decembro en Sofio estis organizita scienca sesio okaze de la 100-jara jubileo de la bulgara E-movado. La partoprenantoj alvokis por apliko de Esperanto al sciencaj kaj praktikaj celoj, kaj dissendis tiun alvokon al ĉiuj landaj E-asocioj kaj internaciaj E-organizaĵoj. En majo okazos la trijara elektokongreso de BEA, kiu ĉi-foje koincidis kun periodo de rapida socia ŝanĝo kaj, onidire, vasta diskutado inter la esperantistoj pri la taŭgaj formoj de organiziĝo.

• **Germana DR:** Ĝus fondiĝis Esperanto-Centro Halle, en urbo jam fama pro kelkaj originalaj E-agadoj. La gvidanto Hans-Peter Bartos antaŭvidas la okazigon de kursoj kaj ekzamenoj, peradon de turismaj vojaĝoj, kaj daŭrigon de la Arta Semajno kaj la germanlingva per-Esperanta revuo *Die rationelle Sprache*. Adreso: Schleiermacherstr. 37, DDR-4020 Halle.

• **Gvatemalo:** Iama TEJO-aktivulo Anne Amblès raportas, ke sekve de instru- kaj inform-kampanjo lanĉita en januaro fondiĝis Gvatemala Esperanto-Klubo "dank' al la entuziasmo kaj efikeco de la junaj novaj samideanoj". La nova klubo



celas restarigi la landan asocion, dum pluraj anoj aliĝis al TEJO kaj la Pasporta Servo. Por proponi helpon, viziton aŭ simile skribu al Apartado Postal 2155, 01901 Guatemala, Gvatemalo.

• **Sovetunio:** Denove el la vigla bulteno *Eksciu, ke...* ni eksciis, ke...: aperis dua eldono de la rusa-Esperanta vortaro de Bokarev en 50 000 ekzempleroj, dank' al la aktiveco de Firdaus Ŝukurov en Duŝanbe (Taĝikio); aperis ankaŭ du novaj diskoj de E-muziko, de Ĵomart Amzeev kaj la leningrada ensemblo "Eterna muziko", dum la ŝtata muzikeldonejo Melodija planis ekprodukti la diskon "Destino" de V. Soroka en januaro; la 11-an de novembro 1989 la Centra Televido montris 20-minutan futuro-

logian filmon en Esperanto, dublitan rusingve "por akcenti la futurecon de la problemoj en ĝi priskribitaj".

La eldonanto de *Eksciu, ke...*, Junulara E-Centro Taŝtagol, volas interŝanĝi ĝin regule kontraŭ naciaj kaj internaciaj E-informiloj. Ĝi ankaŭ pretas informi pri E-aranĝoj, vojaĝ- kaj prelegebleco en tuta Sovetunio. Skribu al JEC, Taŝtagol, Kemerovskaja dol. SU-652970 (tel. 21477).

• **Zairio:** Por plifortigi la financon bazon de la vigla movado ĉi-lande, UEA sendis al Ngangu Nduantoni-Bakidila, la prezidanto de la landa asocio, bonkvalitan fotokopilon. Ekde la fino de januaro tiu servo alportas regulan enspezon por la Instituto.

LA MEMBRARO DE UEA en 1989

Lando	AM	IM	Sumo	Lando	AM	IM	Sumo	Lando	AM	IM	Sumo
Albanio	0	3	3	Jugoslavio	301	222	523	Turkio	0	5	5
Alĝerio	0	6	6	Kamerunio	0	6	6	Urugvajo	0	3	3
Andoro	0	1	1	Kanado	217	100	317	Usono	233	568	801
Angolo	0	1	1	Kenjo	0	1	1	Vatikano	0	1	1
Argentino	0	40	40	Kolombio	0	31	31	Venezuelo	0	27	27
Aŭstralio	166	87	253	Kongo	0	4	4	Vjetnamio	0	10	10
Aŭstrio	234	62	296	Korea Resp.	422	47	469	Zairio	137	26	163
Bangladeŝo	0	1	1	Kostariko	0	3	3	Zambio	0	1	1
Belgio	884	253	1137	Kubo	450	46	496				
Benino	0	4	4	Luksemburgio	96	12	108	101 landoj	32474	7355	39829
Bolivio	0	2	2	Madagaskaro	200	2	202				
Brazilo	211	403	614	Malajzio	0	3	3				
Britio	787	401	1188	Malto	44	5	49				
Bulgario	5071	77	5148	Meksikio	27	24	51				
Burundio	0	1	1	Mongolio	0	2	2				
Centrafrika Resp.	0	2	2	Nederlando	281	462	743				
Ĉeĥoslovakio	3328	187	3515	Nepalo	0	12	12				
Ĉilio	21	13	34	Niĝerio	0	17	17				
Ĉinio	1085	71	1156	Niĝerlando	0	2	2				
Danio	192	108	300	Nikaragvo	0	5	5				
Dominika Resp.	0	1	1	Norvegio	312	86	398				
Ebura Bordo	0	7	7	Nov-Zelando	71	56	127				
Egiptio	0	1	1	Pakistano	0	14	14				
Ekvadoro	0	1	1	Papuo-Novgvineo	0	2	2				
Filipinoj	0	1	1	Peruo	15	3	18				
Finnlando	584	234	818	Pollando	6021	170	6191				
Francio	623	686	1309	Portugalia	130	25	155				
Gano	0	4	4	Ruando	0	2	2				
Germana DR	500	28	528	Rumanio	0	27	27				
Germanio FR	1079	538	1617	Salvadoro	0	1	1				
Greklando	373	35	408	Saŭd-Arabio	0	1	1				
Gujano	0	1	1	Senegalio	0	4	4				
Gvatemalo	0	1	1	Singapuro	0	14	14				
Haitio	0	1	1	Sirio	0	1	1				
Hinda Unio	0	23	23	Sovetunio	0	165	165				
Hispanio	845	224	1069	Srilanko	0	5	5				
Honkongo	0	5	5	Sud-Afriko	53	23	76				
Hungario	3535	183	3718	Sudano	0	1	1				
Indonezio	0	3	3	Svazilando	0	1	1				
Irano	0	88	88	Svedio	999	344	1343				
Irlando	50	16	66	Svislando	230	150	380				
Islando	52	45	97	Tajlando	0	2	2				
Israelo	265	82	347	Tajvano	0	2	2				
Italio	1262	267	1529	Tanzanio	0	3	3				
Jamajko	0	1	1	Togo	0	20	20				
Japanio	1088	386	1474	Tunizio	0	3	3				

LAŬKATEGORIA RESUMO DE LA MEMBRO-STATISTIKO DE UEA POR 1988 KAJ 1989

Kategorio	1989	1989
Membro-Gvidlibro	671	653
Membro-Jarlibro	1344	1426
Membro-Abonanto	3817	3849
Dumviva Membro	955	959
Honora Membro	34	38
Juna M-Jarlibro	223	249
Juna M-Abonanto	159	181
Individuaj Membroj	7203	7355
Aligitaj Membroj	27638	25164
Junaj Al. Membroj	8307	7310
Membroj entute	43148	39829
Societo Zamenhof	154	164
Abonoj Esperanto	257	266
Kolektivaj ab. Eo	1022	651
Abonoj Kontakto	498	515
Kolektivaj ab. Kto	742	598
Patronoj de TEJO	50	63
Kotizoj entute	45871	42086

Bona bazo por kresko

La falo ĉe aligitaj membroj en 1989 preskaŭ egalas la falon ĉe la plej granda landa asocio, la pola, kiu frontis pagproblemojn. Por du landoj la cifero ĉe AM estas iom proksimuma, kaj ĉe aliaj mankas divido inter junaj kaj nejunaj AM, ĉar la koncernaj asocioj ne deklaris tion per respondilo. Do eĉ nun la fine fina bildo ne prezentiĝas.


Tiu bildo fariĝos pli forta kiam la kvin novaj aliĝintaj landaj asocioj, kiujn ni ne enkalkulis por 1989, aldonos sian AM ekde ĉi tiu jaro. Jam en 1989 estis alfluo (50%-a kresko) de individuaj membroj el Sovetunio. Kvankam ni perdis kvar landojn, ni gajnis ses, kaj tial denove superas 100.

Plej kontentiga estas la gajno, eĉ se malgranda, en ĉiu kategorio de IM krom MG, ĉar tie fontas la pli granda parto de nia kotiza enspezo. La gajno okazis eĉ malgraŭ kotizaltigo, kaj aparte notindas la kresko en junularaj IM. La forfalon ĉe MG eble klarigas ŝanĝo en la kongresa regularo, ĉar tiu kategorio ne plu rajtigas al kongresa rabato.

Oni en 1989 apenaŭ vidas fruktojn de la membrokampanjo, kiu komenciĝis nur malfrue en la jaro. Nun ni tamen ricevadas bonvenan kunlaboron en tiu kampanjo, pri kio ni poste raportos. Do, 1990 estas la jaro por kiu ni devos registri belan salton.

ns

Fake



• **Alfabetigo:** La 12-an de januaro, kadre de la 27-a Aŭstralia E-Kongreso, okazis seminario pri la temo "Esperanto kaj internacia legipovo". Kontribuis i.a. Ralph Harry, Trevor Steele, Vera Payne, K. Enderby kaj Nick Nicholas, kaj partoprenis ankaŭ kelkaj oficistoj de la Aŭstralia UN-Asocio. La seminario konkludis, ke Esperanto faciligas ne nur la lernadon de legado kaj skribado, sed ankaŭ la akiron de tutmonda kultura legipovo. Ĝi rekomendis, ke esperantistoj pliprofundigu sian propran legipovon dum Internacia Alfabetiga Jaro, legante almenaŭ unu libron monate.

• **Amnestio Internacia:** Post la sukcesa uzo de Esperanto por diskonigi la Deklaracion de Homaj Rajtoj en 1988, oni esperis starigi kurson pri la lingvo ĉe la londona sidejo de tiu monda homrajta organizaĵo. Intertempe aperis E-flugfolio pri la bazaj principoj kaj celoj de AI. Tamen, laŭ la honora sekretario de E-Asocio de Britio, Will Green, "niaj esperoj pri la akcepto de Esperanto ne realiĝis.... Nia instruisto, kiu proponis siajn servojn el AI en Londono, ankoraŭ ne ricevis respondon al sia letero.... Ni daŭre premos la ideon."

Plena 30-paĝa bibliografio
de la prelegojn

INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO

dum la lastaj 40 jaroj (1950-1989)

estas mendeblade la Centra Oficejo

kontraŭ 10 guldenoj.

Haveblas ankaŭ pluraj prelegotekstoj,

precipe el la lastaj jaroj, kontraŭ

po 7 gld. inkluzive de sendokostoj.

• **Ekologio:** La eŭroparlamenta grupo Eŭropaj Verduloj estas la sola, kiu diskonigis sian programon ankaŭ en Esperanto okaze de la lasta baloto. Ĝia sekretario Leo Cox nun konfirmis, ke ĝi bonvenigas ĉiujn informojn pri ekologiaj problemoj kaj okazaĵoj, ankaŭ en Esperanto. Sendu tiajn tekstojn, laŭeble klarajn kaj dokumentitajn, al li ĉe Eŭropaj Verduloj, Eŭropa Parlamento, Belliard-str. 97-113, B-1040 Bruselo (tel. +32 2 234 23 15).

• **Flugsekureco:** Ankaŭ en Usono plivastiĝas la konscio, ke problemoj pri la angla kiel internacia lingvo de flugtrafiko ludas signifan rolon en aviadilakcidentoj. La usona Tutlanda Flugadministrado (FAA) identigis "interpersonan komunikadon" kiel la plej gravan unuopan faktoron en lastatempaj paneoj. Ene de tiu rubriko, pro-

blemoj de misprononco kaj tro limigita esprimkapablo ludas signifan rolon. Ĉu ne oportuna temo por interlingvistika esploro?

• **Instruado:** La internacia lerneja reto "Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo", lanĉita antaŭ tri jaroj de Charlotte Kohrs (Kalifornio, Usono), jam starigis kontakton kun infanoj aŭ instruistoj en 46 landoj. Lastatempe aliĝis klaso de infanoj en Amangoua, Ebura Bordo, kiun instruas pri Esperanto Gilles Wallez kaj Kouablan Kouassi Antoine. Por informoj pri la revuo (verkita precipe de la infanoj mem), kursmaterialo k.s. skribu al ICLM, 3876 Belmont Ave., San Diego, California 92116.



• **Islam[ism]o:** Malgranda grupo sub la gvido de Gholam R. Ebadi iniciatis en Irano Tutmondan Islaman Movadon por Esperanto. Informojn petu de Poŝkesto 345, Bandar, Mahshar, Irano.

• **Lingvopolitiko:** La kuba ambasadejo en Kanado, dezirante diskonigi la 75-an UK, lingvopolitike mispaŝis kiam ĝi dissendis anglalingvan informleteron al la landa Esperanto-movado. Esperanto-societo Kebekia respondis per ĝentila peto en Esperanto kaj la franca, ke la ambasadejo bonvolu skribi en unu el ĝiaj oficialaj lingvoj.

• **Muziko:** La slovaka rokgrupo Team', kiu koncertis ĉe la pasintjaraj IJK kaj UK, venkis en la du plej gravaj ĉeĥoslovakaj muzikaj enketoj, de la publiko (la Ora Najtingalo) kaj de la kritikistoj (la Ora Noto). Krom regulaj enlandaj turneoj, la grupo preparas sian trian grandan diskon, ricevis inviton al pluraj mondfamaj muzikaj festivaloj, kaj faris kontraktojn kun anglaj sondiskaj kompanioj.

• **Spiritismo:** Esperanto estis forte reprezentata ĉe la lasta Internacia Spiritisma Kongreso, kiu okazis en la ĉefurbo de Brazilo. Ĉirkaŭ 300 kongresanoj, el 2 300 aliĝintoj, partoprenis en kunsido pri Esperanto, kaj dum la tuta kongreso funkciis E-informbudo. Hispanaj, argentinaj kaj portugalaj spiritismaj grupoj promesis starigi kursojn pri la lingvo.

• **Tradukado aŭtomata:** Sub aŭspicio de la kooperativa "Nauka" (Scienco) en Irkutsk, Siberio, esplorgrupo ellaboris prototipon de duon-aŭtomata traduk-sistemo por personaj komputiloj. La gramatika analizilo de la sistemo baziĝas sur la strukturo de Esperanto. Por pliaj informoj kontaktu Jurij Vajnapel, str. Bauman 252-52, SU-664053 Irkutsk.

• **Turismo:** En Bidgoŝto, la ĉefsidejo de la pola entrepreno Esperantotur, malfermiĝis nova 21-lita Esperanto-hotelo okaze de la 15-a Internacia Foiro de Esperanto-Turismo. Malgraŭ la sukcesa entreprenismo de Esperantotur, ĝian agadon ekmalhelpas la ekonomiaj reformoj en Pollando: siajn kontraktojn pri senvaluta interŝanĝo kun sovetiaj E-centroj ĝi devis nuligi por ĉi tiu jaro.

Al la Centra Oficejo venis novaj prospektoj pri Bilbo/Bilbao, Vaskio (Hispanio); la regiono de la rivero Dyje en Ĉeĥoslovakio; kaj Buchholz, FR Germanio. La kontaktadreso por tiaj prospektoj regule aperas en la Jarlibro.

Fondiĝis lastatempe sendependa turisma agentejo en Jugoslavio, "Es-turist", sub la gvido de Anto Ĉanĉar. Esperantistoj vojaĝontaj en tiu lando povas kontakti lin ĉe Pf. 101, YU-74 270 Teslić; oficeja tel. (074) 736-843.

• **Volanludo:** E-lingvajn kontaktojn kun la nove fondita Rumana Federacio de Volanludo peras Kornelia Nagy, Szegfü bejárt 1, R-4150 Székelyudvarhely.

Solidara helpo kontraŭ inundodetruo

Sendepende unu de la alia, du francaj esperantistoj lastatempe skribis al la Centra Oficejo pri la tragedia situacio de UEA-delegito en Tunizio, Abderrahman Grine. La katastrofaj inundoj de la pasintaj monatoj plejparte detruis lian domon kaj ĉiujn havaĵojn. Al lia vilaĝo Zaouit-el-Arabe, for de la ĉefaj centroj, penetras malmulte da helpo.

Se vi deziras helpi al Grine kaj la 14 personoj, kiuj dependas de li, bonvolu kontakti Claude Martins, BP 152, F-59053 Roubaix Cedex; Gabrielle Tréanton, Saint-Quay-Perros, F-22700 Perros-Guirec; aŭ Grine mem ĉe la adreso en la Jarlibro.

Kontaktojn por Vojaĝo de Amikeco tra Sud- kaj Mez-Ameriko post la 75-a Universala Kongreso en Havano serĉas s-ro K. Ueki, s-ino S. Nakamura kaj s-ro Y. Mizuno. Bonvolu respondi al Yoshiaki Mizuno, Hanazono 1-2418-18, Tokorozawa-shi, 359 Japanio.

Turismo, investo aŭ komerco en Vjetnamio (2 irk por respondo): Nguyen Do Khanh, Esperanto, 19/3 Bui Huu Nghia Q.5, Ho Chi Minh-urbo. Ne koresp.

Mediterranea Maro. Mi ludonas ĉambrojn apud la blua maro. Rigardu en la Jarlibro, p.210.

Kunlaboremuloj pri mina ekspluato (precipe oro kaj diamanto), terkulturo, praarbara ekspluato, skribu al la adreso: Projet d'Exploitation Agricole, Forestière et Minière, B.P. 2019, Kisangani, Zairio.

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas unu guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon.

Anoncetoj

Okaze de la Semajno de Internacia Amikeco 1990, Audrey Childs-Mee resaniĝanta plenkore salutas ĉiujn geamikojn tutmonde, kaj deziras al ĉiuj feliĉon, sanon kaj vivoĝuon.

Pri filmo kaj televido deziras korespondi kun gesamideanoj el okcidentaj kaj amerikaj landoj s-ro Dušan Adnadj, ŝkolska ul. 25, YU-56227 Borovo, Jugoslavio.

Kamerunia komercisto, leĝe registrita, serĉas kontaktojn por importo kaj eksporto. Nepre fidinda. Mboge-Mbele J.-M., B.P. 1816, Douala, Kamerunio.

Lerneja klaso (anoj 8- ĝis 10-jaraj) studas Esperanton kaj mondgeografion. Ni volas interŝanĝi bildpoŝtkartojn kun klasoj en multaj landoj. Bonvolu skribi sur la poŝtkarton ion pri via urbo aŭ lando. Skribu al: La klaso de s-ino Carolyn Goodfellow, c/o Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo, 3876 Belmont Avenue, San Diego, California 92116, Usono.

ALVOKO AL INTERESITOJ

Por ricevi – senpage – Esperantajn broŝurojn pri Bibliaj temoj, ankaŭ studkurson, skribu tuj al: Internacia Biblio-Misio, 28 Partis Way, Bath BA1 3QG, Britio, bv. menciante ref. JEB 101.

GRANDAJ EVENTOJ OKAZAS EN ORIENTEŬROPAJ LANDOJ

Legu en "SENNACIULO"
Monata organo de S.A.T.

- la raportojn
- la artikolojn

de SAT-membroj el tiuj landoj.

Proveksemplero kun abontarifo havebla kontraŭ internacia respondkuponon ĉe:
S.A.T., 67 avenue Gambetta, F-75020 PARIS

Ĉu vi jam konas tiun libron?

Rikardo ŜULCO
L A MAGO

Sur la dekstraj paĝoj: 99 pantunetoj.
Sur la maldekstraj paĝoj: 99 kosmogenezaj agregaĵoj.
Kun antaŭparolo pri la poemformo "pantuno".
Kovrilpaĝa paŝtelo "La mago" de la sama aŭtoro.

213 paĝoj

19,80 DM

Mendu ĉe UEA, ĉe via libroservo aŭ rekte ĉe la eldonejo.

Esperanto-Centro Paderborno
D-4790 Paderborno, Poŝtfako 1450

A.E.U. OFERTAS AL VI

- la diskon KOSMO-INFANO. Modernaj kanzonoj de la muzikisto SOLO (25 gld.)
 - la libron PANDEMONIO, kiu enhavas literaturaĵojn premiitajn ĉe la Belartaj Konkursoj de UEA (14 gld.)
 - INTERNACIAN RENKONTIGON en Torrox (Málaga) ĉe marbordo en la suda Hispanio. 7/14 okt. 90. Loĝigo kaj tri manĝoj, entute 250 gld.
- Informoj/Mendoj/Pagoj ĉe: Andaluza Esperanto-Unuiĝo
PK. 864, E-29080 Málaga (Hispanio)

Jen ĝiestas – la longe atendita libro:

LA INTERNACIA JUBILEA ESPERANTO-KONFERENCO CENT JAROJ DE ESPERANTO-KULTURO

Ampleksa raporto pri la plej grava kultura evento en 1987, enhavanta:

- 1 la lastajn paroladojn de Prof. D-ro Ivo Lapenna kaj de D-ro Paul Neergaard;
- 2 superigardon de la 100-jaraj kulturaj atingoj. Lekciistoj: Albault, Régulo Pérez, Gacond, Marjorie Boulton, Ragnarsson, Neergaard, de Zilah, Mayer, Thierry, Zelazny, Lapenna;
- 3 rezoluciojn, fotoreportaĵon ktp.

Eldonita de "FONDAĴO IVO LAPENNA", redaktita de D-ro Klaus Perko, Aŭstrio.
Formato A5, broŝurita, 170-paĝa, verdkolora, glita kovrilo. Prezo: 175 d.kr. inkl. afranko.

Mendu ĝin ĉe la Libroservo de UEA (50,70 gld.) aŭ rekte ĉe "FONDAĴO IVO LAPENNA",
kasisto: Peter Zacho, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio, pĉk.: København 1190601.

MEMORLIBRO

GRAZ 1987

DUSEMAJNA EKSURSO TRA

ĈINIO



En majo ĉi-jare *El Popola Ĉinio*, la plej impona kaj belaspekta revuo en Esperanto, festos sian 40-jaran ekziston. Tial ĝia redakcio organizas festan ekskurson tra Ĉinio. UEA decidis per tiu ekskurson kaj klopodas kunmeti kiel eble plej internacian grupon.

La itinero de la ekskurso aspektas jene:

mardon, 15 majo	flugo el Amsterdamo je 14h35	
merkredon, 16 majo	alveno en Honkongo je 11h50	
	flugo el Honkongo je 17h40 per CA320 al	Kantono (alveno 18h15)
ĵaŭdon, 17 majo	flugo el Kantono je 19h00 per CA1305 al	Guilin (alveno 19h55)
dimanĉon, 20 majo	flugo el Guilin je 12h20 per CA5356 al	Hangzhou (alveno 14h25)
mardon, 22 majo	trajno el Hangzhou je 16h58 al	Sanhajo (alveno 20h17)
ĵaŭdon, 24 majo	flugo el Sanhajo je 17h00 per CA988 al	Pekino (alveno 18h35)
lundon, 28 majo	flugo el Pekino je 14h20 per CA310 al	Honkongo (alveno 17h30)
mardon, 29 majo	liberata ĝis vespera ŝipkrozaĉo kun vespermanĝo	
merkredon, 30 majo	matena duontaga ekskurso tra la insulo Honkongo	
	flugo el Honkongo je 20h00	
ĵaŭdon, 31 majo	alveno en Amsterdamo matene.	

La prezo de la tuta aranĝo estas 5560 gld. Tiuj prezo inkluzivas ĉiujn menciitajn flugojn, tranoktojn, ĉiujn manĝojn, ĉiujn ekskursojn ktp. La redakcio de EPĈ promesas krome al ĉiuj eksterlandaj partoprenantoj kostajn donacojn, Esperantan ĉiĉeronon kaj kuraciston, kiuj akompanos la grupon dum la tuta vojaĝo. Bonvolu noti, ke la aranĝo en Honkongo inkluzivas nur tranokton kun matenmanĝo kaj la menciitan vespermanĝon dum la ekskurso, ne la aliajn manĝojn. Se vi deziras dum la tuta tempo en Ĉinio kaj en Honkongo loĝi en unuĉambro, necesas krompago de 845 gld. Kiel aliĝi? Simple: Informu tuj letere aŭ telefone la Centran Oficejon de UEA kaj sendu la necesan pagon. UEA helpas en la akiro de la ĉina vizo.

Limdato por aliĝo 20 aprilo 1990

Turisma firmao ĉe Bulgara Esperantista Asocio **esperantoturist**

organizas partoprenon en ekskursoj
kaj aliaj Esperanto-aranĝoj en Bulgario,
riponon ĉe la Nigra Maro,
vizitojn al renesancaj bulgaraj urbetoj,
renkontiĝojn kun esperantistoj en tuta Bulgario.

Adreso:

Str. Pozitano 40
1000 Sofio, Bulgario
tel. 003592-882472, telekso 23599 kabini bg



*Dum la pasintaj jardekoj
okazis diversaj elstaraj
kulturaj aranĝoj en
Hungario. Por daŭrigi
kaj revivigi tiun noblan
tradicion Hungara
Esperanto-Asocio aranĝos
inter la 4-a kaj 9-a de julio
1990 en Budapeŝto*

FESTIVALON DE INTERNACIA KULTURO

kaj konferencon

ĈELO KAJ STRATEGIO DE LA ESPERANTO-MOVADO.

Organizanto: ESPERTUR Turisma Servo de HEA
Pk. 193, 1368 Budapest, Hungario
Tel. 156-0244

Partoprenkotizoj: ĝis la 1-a de junio 275 gld.
kaj en hotelo 363 gld.

Espertur, fondita en novembro 1989, akceptas
ankaŭ dum la tuta jaro mendojn de individuaj
esperantistoj kaj grupoj kun esperantista
gvidanto por restadi en Hungario, kaj serĉas
partnerojn pri la kunlaboro.

Kiu bezonas ion

en Portugalio, ekzemple ferii,
aĉeti domon, terenon, vilaon,
k.t.p., skribu al

Manuel Pinguinha, Apart. 269,
2 503 C. Rainha Codex
PORTUGALIO / Portugal

